Do you correspond with a friend (feminine) abroad? Have you received a letter? What did she write? Where does she live? Does she live in Norway? Where did the friend of Mr Lang see the announcement? What did he write? Did he write in Esperanto? Will Mr. Lang reply soon? What will he write about? What will he send? What are your chief interests? Are you a sportsman? What are you? Do you often re-read letters? Does Mr. Lang often re-read the letter? Do you know Mr. Lang? Do you know where he lives? Do you know whether he has received a letter?

Praktiko 4.6 Vera aŭ malvera? (True or false?)

1. S-ro Lang ricevis nur unu leteron el Norvegujo.
2. Li jam skribis respondon.
3. Edvard loĝas en granda urbo.
4. Li havas tridek unu jarojn.
5. Li loĝas en nova domo.
6. La lago Vangsvatn kuŝas en la mezo de altaj montoj.
7. La urbo Voss havas kelkajn kolegiojn.
8. Precipe la gejunuloj vizitas la urbeton Voss.
9. S-ro Lang ofte relegas la leteron.
10. S-ro Lang loĝas en Newtown.

Dialogo: *Amiko el Norvegujo*

Mr. Lang has invited his penpal Edvard Olsen to spend a holiday in Newtown, and he meets Edvard at the station.

S-ro Lang: Saluton! Ĉu vi estas Edvard?

Edvard: Mia kara Rikardo! Fine mi renkontas vin! Tio estas granda plezuro por mi!

Rikardo: Ankaŭ por mi! Venu; mia aŭto staras ekster la stacidomo.

Edvard: Dankon, Rikardo.

Rikardo: Ĉu vi komforte veturis?

Edvard: Tre komforte, dankon.

* * *

Rikardo: Nu, jen ni ekster mia domo. Envenu, mi petas! Ha, Klara, jen mia norvega amiko Edvard Olsen.

Klara: Vi estas tre bonvena, sinjoro Olsen.

Edvard: Ne “sinjoro”, mi petas! Mi estas Edvard.

Klara: Tre bone, Edvard. Nun, Rikardo montris al vi vian ĉambron, dum mi finos* la vespermanĝon. Ĝi baldaŭ estos preta.

Edvard: Dankon, Klara. Mi vere estas malsata.

Rikardo: Venu, Edvard! ... Jen via dormoĉambro. Mi esperas, ke vi trovos ĝin komforta. Ĉi tiu ŝranko estas je via dispono, kaj ankaŭ tiuj du tirkesto. Kaj la banĉambro estas ĉi tie!

Edvard: Mi scias, ke mi bone dormos ĉi tie.

Rikardo: Nu, venu al la salono kiam vi estos* preta, kaj se la vespermanĝo ne estos* preta, vi sidos komforte dum vi atentos*. Mi helpos Klaran en la kuirejo.

Edvard: Dankon, amiko. Mi baldaŭ estos preta.

Rikardo: Ĝis poste, do!

Edvard: Ĝis poste.

* Note how the future tense is used. In English, some actions that occur in the

future are described with the present tense, e.g. “while I *finish* dinner”. In Esperanto, we always use the future tense.

Demandoj

1. Kie s-ro Lang renkontas la norvegan amikon?
2. Kie staras la aŭto de s-ro Lang?
3. Kiu estas bonvena?
4. Ĉu Edvard komforte veturis?
5. Kion faros s-ino Lang dum Edvard iros al la dormoĉambro?
6. Kiam la vespermanĝo estos preta?
7. Kion s-ro Lang esperas?
8. Ĉu tri tirkesto estas je la dispono de Edvard?
9. Kion faros Edvard kiam li estos preta?
10. Kion la du amikoj faros se la vespermanĝo ne estos preta?

Vortolisto

amiko *friend*

anonco *announcement*

apartamento *apartment*

apud *beside, near to*

atendas *waits for*

bondeziro *good wish(es)*

bonvena, bonvenon! *welcome*

eduko *education*

edzo *husband*; **edzino** *wife*

eksterlando “*outside-land*” (*abroad*)

ekzistas *exists*

el *out of*

esperas *hopes*

feliĉa *happy, fortunate*

finas *finishes*; **fine** *finally, at last*

fiŝo *fish*

forgesas *forgets*

fotografio *photography*

fundamento *foundation, element* (of a subject)

gasto *guest*; **gastejo** *guest house, hostel*

helpas *helps*

historio *history*

informo *information*

jaro *year*

je (see note 2)

ĵus *just* (i.e., something just past):

mi ĵus skribis *I have just written*

kaptas *catch*

kara *dear*

kato *cat*

ke *that* (conjunction)
kolegio *college*
konas *knows* (is acquainted with)
korespondas *corresponds*
koro *heart*; **kora** *cordial*
koverta *envelope*
kun *with*
kuŝas *lies*
lago *lake*
lando *land, country*
leterportisto *postman* (see *poŝtisto*)
libera *free*
lingvo *language*
malsata *hungry* (see *sata*)
muziko *music*
nomo *name*
Norvego *a Norwegian*; **Norvegujo**
 Norway
ofta *frequent*; **ofte** *often*
paĝo *page*
papero *(piece of) paper*
petas *asks*
plezuro *pleasure*
portas *carries*
post *after*; **poste** *afterwards*
poŝto *mail* (note spelling, to
 distinguish it from **post** *after*)
poŝtisto *postal worker*
poŝtkarto *postcard*
poŝtmarko *postage stamp*
precipe *mainly, principally*
preta *ready*
pro *for, because of*

reciproke *reciprocally, in exchange*
renkontas *meets*
revuo *magazine*
ricevas *receives*
rigardas *looks at, watches*
saluto *greeting*; **saluton!** *hello!*
sata *satisfied (of hunger)*; **malsata**
 hungry
scias* *knows (a fact)*
sendas *sends*
serĉas *looks for, seeks*
sincera *sincere*
tempo *time*
tirkesto *drawer*
turisto *tourist*; **turismo** *tourism*
uzas *uses*
venas *comes*
vera *true, real*; **vere** *truly, really*
vespero *evening*
vespermanĝo *evening meal*
vizitas *visits*

Esprimoj:
je via dispono *at your disposal*
mi tre ĝojas *I'm very glad*
envenu, mi petas! *come in, please!*
ĝis poste *till later*

*The combination **sc** can be difficult to pronounce, but it does occur in English words like “firsts” or “pests”. To pronounce **mi ne scias**, try saying “me nest see ahss.”

Ĉapitro 5: Pri via ferio

Movement: to

1 In order to show movement *towards* the place or position indicated by the preposition, **-n** is added to the noun (in English, “to” is sometimes added to “in” and “on”):

La kato saltas sur la tablon. *The cat jumps on to the table.*

La muso kuras sub la liton. *The mouse runs under the bed.*

La viro iras en la domon. *The man goes into the house.*

In each of these examples, the subject starts the action in one place and finishes it in another. Note the difference in meaning between these sentences:

La kato ludis **en** la salono. *The cat was playing in the lounge.*

La kato iris en la salono**n**. *The cat went into the lounge.*

Now notice the difference in meaning if we omit the **-n** from the three sentences above:

La kato saltas sur la tablo means that the cat is on the table, and, while there, is jumping.

La muso kuras sub la lito means that the mouse is under the bed, and is running about.

La viro iras en la domo means that the man is in the house, and is going from one part to another.

Note: -n is never used after al (to) or ĝis (up to), because these words do not indicate a position, and they already show movement to some place.

2 If an *adverb* shows place, adding **-n** shows movement *to* that place:

Mi restis hejme. *I stayed at home.*

Li iris hejmen. *He went home.*

In English we sometimes use “-ward(s)”:

antaŭen *forward*

malantaŭen *backward*

supren *upwards*

malsupren *downwards*

norden *northwards*

suden *southwards*

orienten *eastwards*

okcidenten *westwards*

3 Note the use of **-n** with **kie** and **tie**:

Kien vi iras? *Where are you going (to)?*

Kien li veturis? *Where did he travel to?*

Mi iras tien. *I am going there (to that place).*

Li veturis tien. *He travelled there (to that place).*

Movement: from

4 To show movement *from* a place, we put **de** in front of the preposition showing place (**-n** is *not* used). This is similar to English where we often use “from”:

La kato saltis **de sur** la tablo.

The cat jumped off (= from on) the table.

Li prenis la jakon **de sur** la hoko.
He took the jacket off the hook.

La muso kuris **de sub** la lito.
The mouse ran from under the bed.

However, instead of **de en** (from in = out of), we have a separate preposition with this meaning, **el**:

La viro iris **el** (= de en) la domo.
The man went out of (= from in) the house.

Li trinkis **el** glaso.
He drank from (= out of) a glass.

Changing endings

5 In chapter 3 (note 1) we changed adjectives into adverbs by changing their endings from **-a** to **-e**, and in this chapter (note 2) we changed a noun (**hejmo** a home) to an adverb (**hejme** at home; **hejmen** to one's home, homewards).

Similarly, we can make adjectives from nouns by changing **-o** to **-a**:

muro a wall	mura bildo a wall (mural) picture
urbo a town	urba parko a municipal park
intereso an interest	interesa libro an interesting book

In the same way, from **nordo** (the) north, we can make **norda** northern, **norde** in the north and **norden** to the north, northwards, and from **supro** (the) top we can make **supra** top (adj.), **supre** at the top and **supren** towards the top, upwards.

6 The ending **-u**:

When giving direct commands, the verb ends in **-u**:

Iru al la pordo! *Go to the door!*

Ne iru en la ĝardenon! *Don't go into the garden!*

As in English, the person addressed is not usually named:

Venu rapide! = Vi venu rapide!
Come quickly = You come quickly!

Estu bona! = Vi estu bona!
Be good! = You be good!

We can't give commands to ourselves or directly to a third party, but it's possible to express our will (wish, desire). In English we use the verb "let" for this: "Let me do it", "Let him wait", etc.:

Ni iru al la kinejo. *Let's go to the cinema.*

Ĝi staru en la angulo. *Let it stand in the corner.*

Li atendu. *Let him wait.*

Ili venu al ni. *Let them come to us.*

To say "Let's (do something)" in Esperanto, we say "**Ni ... -u**" Sometimes the meaning is a wish or *exhortation* (in English we sometimes use "may"):

La Nova Jaro estu feliĉa por vi!
May the New Year be happy for you!

Ĉu li atendu?
Shall he wait?

Ĉu ili komencu?
Shall they begin?

Ĉu ni dancu?
Shall we dance?

Dio vin benu!
(May) God bless you!

We can also ask for orders for ourselves and others. In English we usually use “shall”; in Esperanto we use **ĉu** with the above forms:

Ĉu mi faru ĝin?
Shall I do it?

Ĉu mi sendu ĝin?
Shall I send it?

Ĉu ni iru al la kinejo?
Shall we go to the cinema?

Praktiko 5.1: Traduku anglan (Translate into English):

Kien vi iras? Kien iras Andreo? Maria kuras en la manĝoĉambro.
Andreo ne ludas en la infanejo. Iru antaŭen, mi petas, ĝis la ponto super la fervojo. Ni iru al la parko. Ni rigardu ĉi tiujn bildojn. Mi nun estas je via dispono; kien ni iru? Ĉu ni iru al la stacidomo? Kiel ni iru? Ni iru buse! Tiu kato tre plaĉas al mi. Rigardu ĝin; ĝi ludas antaŭ la domo. Kiu estas la fratino de Andreo? Ĉu vi ne scias, ke Maria estas lia fratino, kaj li estas ŝia frato? Parolu al lia patro pri li, mi petas. Mi ne iras al li; li venu al mi! Kion ni faru? Ne faru tion, mi petas! Mi iras hejmen nun; Ĝis revido!

Praktiko 5.2: Traduku esperanten (Translate into Esperanto):

Go to the door, please! Go into the lounge, please! Shall we go to a cinema? Let's read this book! Don't go into the garage! Where is the cat? Where did it go (to)? It went out of the house, into the garden. Go up to the bedroom, please. My sisters went to the cinema, but I stayed at home. The cat came into (entered) the room, and the mouse ran under the bed. This room is at your disposal. Take the doll off the table, please. What shall we do now? Come here! Are you going home now? Goodbye!

Praktiko 5.3: Construct as many meaningful sentences as you can from the table, first using only columns 3, 4 and 5, and then all six columns.

1	2	3	4	5	6
Ĉu	mi li ili	iru restu kuru dancu	al en el sur	la domo la salono la tablo la domon la salonon la tablon	?

Names of countries

7 In naming countries, the world is divided into two parts: the Old World (Europe and Asia) and the New World (America, Africa and Oceania).

In the Old World, the inhabitants give their name to their country, thus **anglo** an *Englishman* and **franco** a *Frenchman*. By adding the suffix **-uj-**, we get **Anglujo** *England* and **Francujo** *France*. (See note 11.)

Although the names of countries (and all proper names) are written with a capital letter as in English, the names of the inhabitants are written with a small letter, and the adjectives derived from them usually take a small letter: **angla** *English*, **franca** *French*.

In just a few Old World countries, the name of the country ends in **-lando**, so **-uj-** is not added and the name of the inhabitant is formed by the addition of the suffix **-an-**.

Irlando <i>Ireland</i>	Irlandano <i>an Irishman</i>
Islando <i>Iceland</i>	Islandano <i>an Icelander</i>
Nederlando <i>Holland</i>	Nederlandano <i>a Dutchman</i>

The ending **-lando** may also be used instead of **-ujo**, but in this case, the root is still the name of the inhabitant:

Dano <i>a Dane</i>	Danlando <i>Denmark</i>
Polo <i>a Pole</i>	Pollando <i>Poland</i>
Sviso <i>a Swiss</i>	Svislando <i>Switzerland</i>

8 Here are some examples:

<i>Inhabitant</i>	<i>Adjective</i>	<i>Country</i>
anglo/ino*	angla	Anglujo
egipto	egipta	Egiptujo
germano	germana	Germanujo
greko	greka	Grekujo
ĉino	ĉina	Ĉinujo
hispano	hispana	Hispanujo
hindo	hinda	Hindujo
italo	itala	Italujo
japano	japana	Japanujo

norvego	norvega	Norvegujo
dano	dana	Danlando
polo	pola	Pollando
ruso	rusa	Rusujo
skoto	skota	Skotlando
irlandano	irlanda	Irlando
islandano	islanda	Islando
Nederlandano	nederlanda	Nederlando

Note that some esperantists use **-io** in place of **-ujo**: **Anglio**, **Francio**, **Germanio**, etc., although this creates confusion with some New World names. For that reason and others, we use the traditional **-ujo** here.

9 In the New World, inhabitants takes their nationality from where they live by the addition of the suffix **-an-** (see note 12).

Alĝerio <i>Algeria</i>	alĝeriano/ianino* <i>an Algerian</i>
Aŭstralio <i>Australia</i>	aŭstraliano <i>an Australian</i>
Brazilo <i>Brazil</i>	brazilano <i>a Brazilian</i>
Kanado <i>Canada</i>	kanadano <i>a Canadian</i>
Novzelando <i>New Zealand</i>	novzelandano <i>a New Zealander</i>
Tunizio <i>Tunisia</i>	tuniziano <i>a Tunisian</i>
Usono <i>USA</i>	usonano <i>an American</i>

* Remember that to make the names explicitly feminine, as with other nouns you can add **-in-**.

Names of cities

10 Some of the largest, best known cities have names in Esperanto form: **Parizo**, **Ĉikago**, **Vieno**, **Moskvo**, **Pekino**, **Novjorko**, **Ŝanhajo** etc.

Names of smaller towns—especially if they are difficult to Esperantise—usually remain unchanged: **Cannes**, **Des Moines**, **Indianapolis**, etc.

Suffixes

11 -uj-

In addition to indicating the name of a country, the suffix **-uj-** is used to denote a *container* for a number or quantity of the articles named by the root:

mono <i>money</i>	monujo <i>purse, wallet, cash-box</i>
inko <i>ink</i>	inkujo <i>inkpot</i>
rubo <i>garbage, rubbish</i>	rubujo <i>trash bin</i>

12 -an-

The suffix **-an-** is used to denote a member, inhabitant, or partisan:

grupo <i>group</i>	grupano <i>group member</i>
vilaĝo <i>village</i>	vilaĝano <i>villager</i>
Parizo <i>Paris</i>	Parizano <i>Parisian</i>
Kristo <i>Christ</i>	Kristano <i>Christian</i>
Londono <i>London</i>	Londonano <i>Londoner</i>
Glasgovo <i>Glasgow</i>	Glasgovano <i>Glaswegian</i>

As in note 9, the feminine ending is -anino.

PRI VIA FERIO EN SVISLANDO

Ĉu vi decidis pri via ferio? Se ne, pensu pri Svislando! Ĝi estas ideala feria lando. Ni scias ke ĝi prezentas tre diversajn allogojn. La Alpoj formas belegan naturspektaklon. La aero estas eksterordinare pura—tiel purega, ke malsanuloj venas el tuta Eŭropo al Svislando. La granda komforto kaj bonega kuirarto de la svisaj hoteloj estas mondfamaj. Konstante okazas interesaj popolfestoj, kun belegaj kostumoj; ankaŭ ekspozicioj, muzikfestoj, sportfestoj, lagofestoj, florfestoj, k.s.¹ Vere, turismo estas la ĉefa industrio de Svislando! Ni menciuj ankaŭ la luksajn butikojn, koncertejoj kaj teatrojn, kaj la gravajn universitatojn, muzeojn kaj bibliotekojn.

Kiel mi iru al Svislando?

Veturu per aŭtomobilo, biciklo, buso aŭ fervojo. Nur ne per ŝipo! La maro mankas al Svislando; sed anstataŭ la maro, ĝi havas la belajn lagojn. Se via ferio ne estas longa, uzu aviadilon! Fluglinioj kondukas rekte de Londono, Manĉestro, Glasgovo kaj aliaj urboj al Berno aŭ Ĝenevo. Vi veturas trans Svislandon ankaŭ al aliaj landoj-orienten² en Aŭstrujon, suden en Italujon, norden en Germanujon, kaj okcidenten en sudan Francujon.

Kio estas la nacia lingvo de Svislando?

Ĉu vi scias, ke en Svislando vi trovos kvar oficialajn lingvojn? La Bernanoj parolas la germanan lingvon; kiam ni iras en okcidentan Svislandon, ni aŭdas nur la francan; kaj la sudaj Svisoj parolas la italan lingvon. Sed en la montaj regionoj de orienta Svislando ekzistas ankaŭ la romanĉa lingvo. Kvankam nur 40,000 homoj parolas ĝin, ĝi tamen estas oficiala ŝtata lingvo, egala al la tri aliaj. Jen la komenco de poemo en la romanĉa; vi vidus, ke ĝi similas la italan lingvon, kaj estas ne malsimila al Esperanto:

Chara lingua de la mamma,
tu sonor rumantsch ladin,
o co t'am eu sainza fin!

(Traduko: Kara lingvo de la patrino,
vi belsona ladina³ romanĉa
ho! kiel mi amas vin sen fino!)

En tiu lingvo ekzistas libroj, gazetoj kaj kalendaroj; kaj infanoj en la lernejo ricevas instruon per romanĉa lingvo. Sed eĉ de tia lingveto ekzistas kvar diversaj dialektoj!

Vi vidas, ke Svislando estas vera Turo de Babelo. Multaj inteligentaj svisoj lernas Esperanton, ĉar ili komprenas, ke ĝi solvos la lingvan problemon. Ĉu vi ne konsentas?

1 **k.s.:** kaj similaj *and the like*.

2 *towards the east*.

3 **dialekto de romanĉa**.



**Por via ferio-
SVISLANDO
belega lando
en la mezo
de Eŭropo**



Praktiko 5.5: Traduku esperanten:

Have you thought about your holiday? Have you thought about Switzerland? Do you know that in Switzerland you will find four official languages? Do you speak German? French? Italian? Romanche? Dutch? Russian? Are you a Londoner (feminine)? A Glaswegian? How shall we go to Switzerland? Shall we travel by car, bicycle, bus or rail? Shall we travel across Switzerland to other countries? Where shall we go? To the north, south, east or west?

Praktiko 5.4: Traduku anglen:

Ĉu vi parolas Esperanton? De kie vi venas? Ĉu vi estas anglino? Ne, mi estas skotino. Mi loĝas en Glasgovo. Kaj kie vi loĝas? Mi estas franco, kaj loĝas en Parizo. Mi estas parizano, kaj mia edzino estas parizano. La francoj parolas la francan lingvon, kaj la italoj parolas la italan. Ĉu Esperanto similas al la itala lingvo? Ĉu vi iras norden de Germanujo al Italujo? Ne, mi iras suden, ĉar Italujo kuŝas sude de Germanujo. Kien ni iru por nia ferio? Mi pensas pri Svislando. Kia lando ĝi estas? Ĝi estas bela lando kun multaj montoj, kaj la aero estas tre pura. Pro tio multaj malsanuloj iras tien. Kiel ni iru tien? Ni veturu per fervojo ĝis la maro, poste per ŝipo ĝis Francujo, kaj de tie per fervojo en Svislandon. Kion ni faros dum ni estos tie? Ni vizitos diversajn interesajn urbojn, kaj vidos la Alpojn.

Praktiko 5.6: Vera aŭ malvera?

1. Svislando ne havas montojn.
2. Svislando ne havas maron.
3. La bernanoj parolas la francan lingvon.
4. Oni iras suden de Germanujo al Svedujo.
5. Popolfestoj ne okazas en Svislando.
6. En Svislando estas kvar oficialaj lingvoj.

7. La romanĉa estas la lingvo de Rumanujo.
8. Nur kvardek mil homoj parolas la romanĉan lingvon.
9. La kuirarto de la svisaj hoteloj estas mondfama.
10. Homo kiu loĝas en Romo estas urbano.

Dialogo: La Esperanto-grupo

Mr. Lang is visiting the local Esperanto group for the first time, and he meets the chairman.

- Prezidanto** Bonan vesperon, kaj bonvenon al la grupo. Ĉu vi loĝas en Newtown, aŭ ĉu vi nur vizitas nian urbon?
- S-ro Lang** Mi loĝas ĉi tie. Mia edzino kaj mi lernas Esperanton hejme, sed ĝis nun ni ne estis liberaj je la vesperoj de viaj kunvenoj. Ni ne venas kune, ĉar unu restas kun la infanoj.
- Prezidanto** Mi tre ĝojas, ke vi venis, kaj mi esperas, ke vi estos membro de la grupo. Kio estas via nomo, mi petas? Mi estas John Danby, kaj mi estas la prezidanto de la grupo.
- S-ro Lang** Mi estas Rikardo Lang.
- Prezidanto** Bone, sinjoro Lang. *(He turns to another member.)* Fraŭlino Jones, jen sinjoro Lang.
- F-ino Jones** Bonan vesperon, sinjoro Lang! Kiel vi fartas?
- S-ro Lang** Tre bone, dankon. Kaj vi?
- F-ino Jones** Bonege, dankon. Ĉu tiu ĉi estas via unua vizito al la grupo?
- S-ro Lang** Jes.
- F-ino Jones** Vi parolas Esperanton tre bone. Kie vi lernis?
- S-ro Lang** Dankon. Mi lernas ĝin hejme. Kion vi faras en la kunvenoj?

F-ino Jones Ho, diversajn aferojn. Ni komencas per mallongaj lecionoj, en klasoj, kaj poste ni havas ludojn en Esperanto, aŭ membro parolas al ni, kelkfoje pri vizito al alia lando. Je aliaj vesperoj ni havas diskutojn, aŭ kune tradukas interesan tekston.

S-ro Lang Kaj kio okazos hodiaŭ?

F-ino Jones Hodiaŭ sinjoro Franks parolos pri Norvegujo kaj Svedujo, kiujn li vizitis.

S-ro Lang Ho, tio estos tre interesa al mi, ĉar mi korespondas kun norvego, kaj li vizitis nin en nia hejmo!

F-ino Jones Do, la kunveno vere estos interesa al vi!

Demandoj

1. Kiun s-ro Lang renkontas unue en la grupo?
2. Ĉu li nur vizitas la urbon Newtown?
3. Kie li lernas Esperanton?
4. Kial li ne vizitis la grupon ĝis nun?
5. Kio estas la nomo de la prezidanto?
6. Kun kiu s-ro Lang poste parolas?
7. Per kio la grupo komencas la kunvenojn?
8. Kio okazos hodiaŭ?
9. Al kiu tio estos interesa?
10. Kial ĝi estos interesa al li?

aero air
afero matter, affair, thing
(al)logas attracts; **allogo** attraction
anstataŭ instead of
aviado aviation; **aviadilo** aircraft
biblioteko library
biciklo bicycle
butiko shop
decidas decides
dialekto dialect
Dio God
diskuto discussion
diversa different, diverse
egala equal
ekspozicio exhibition
fama famous
faras makes, does
ferio holiday
festo festival; **popolfesto** folk festival
flugas flies
formas forms
gazeto periodical, magazine
glaso (drinking) glass
grava important, serious
hodiaŭ today
hoko hook
homo human being; **homoj** people
ideala ideal
industrio industry
instruo instruction; **instruas** teaches

inteligenta intelligent
jako jacket
kalendaro calendar
kelkfoje sometimes
kiam when
komencas begins
komprenas understands
koncerto concert
konsentas agree
konstante constantly, continually
kostumo costume
kuir-arto cuisine, art of cookery
kune together
kunveno meeting; coming together
kuras runs
kvankam although
leciono lesson
linio line
longa long
ludo game
luksa luxurious
mankas is lacking; **la maro**
mankas the sea is lacking (ie. there is no sea)
maro sea
membro member
mencias mentions
mondo world
muso mouse
muzeo museum
nacio nation
natur nature

oficiala official
okazas occurs, takes place
ordinara ordinary
pensas thinks
per by means of
poemo poem
popolo people (in sense of nation);
la svisa popolo the Swiss (people).
poste afterwards
prenas takes; picks up
prezidanto chairman
problemo problem
restas remains, stays
romanĉa Romanche (a language of Switzerland)
saltas jumps
se if
sen without
simila similar; **similas** resembles
solvas solves; **solvo** solution
sono sound
spektaklo spectacle, display
ŝipo ship
ŝtato state (country)
tamen however, nevertheless
teatro theatre
trans across (at the other side of);
trans ... -n across (to the other side of)
trinkas drinks
turo tower
tuta whole, entire

universitato university
unua first
vera true; **vere** truly, really
vespero evening

Esprimoj:
Bonan vesperon! Good evening!
la pasintan jaron last year

Ĉapitro 6: La veter-prognozo

Impersonal verbs

1 With English sentences like “It is old” or “It is beautiful” the word “it” stands for some specific noun (e.g. a house, a book, etc.)

Sometimes, however, the “it” doesn’t stand for anything in particular: e.g., in sentences like “It is raining” or “It is sunny.” In these cases, the English word “it” functions as a kind of artificial subject. In Esperanto, we omit it: **Pluvas** = *It is raining*. When verbs are used without a subject like this, they’re called *impersonal verbs*.

Pluvas. <i>It is raining.</i>	Neĝas. <i>It is snowing.</i>
Pluvis. <i>It was raining.</i>	Neĝis. <i>It was snowing.</i>
Pluvos. <i>It is going to rain.</i>	Neĝos. <i>It is going to snow.</i>
Frosta. <i>It is freezing.</i>	Hajlas. <i>It is hailing.</i>
Frostis. <i>It was freezing.</i>	Hajlis. <i>It was hailing.</i>
Frostos. <i>It will be freezing.</i>	Hajlos. <i>It’s going to hail.</i>

You can make these sentences into negatives or questions by placing **ne** or **ĉu** in front of them:

Ne neĝis. *It wasn’t snowing.* **Ĉu** pluvos? *Is it going to rain?*

2 In the same way we can say:

Estas varme. <i>It is warm.</i>	Estas malvarme. <i>It is cold.</i>
Estas sune. <i>It’s sunny.</i>	Estas bele. <i>It’s beautiful.</i>

But note that because there is no subject, **estas** is followed by an *adverb* (**varme**, **malvarme**, **sune**, **bele**), and not an *adjective*. With a sentence

like **Fajro estas varma**, we use an adjective **varma** to describes the subject **fajro**. In a sentence *without* a subject, we use an adverb to describe the verb. **Estas varme**.

3 Oni

When we’re not referring to any person in particular, we use the indefinite pronoun **oni**, which is similar to the English “one”:

Oni ripetas, kion **oni** legas.
One repeats what one reads.

In English we also use “they,” “it” or even “you” to convey the same idea:

Oni diras, ke vi estas malfeliĉa.
They say that you are unhappy.

Oni diras, ke vi estas riĉa.
It is said that you are rich.

Kiam **oni** estas riĉa, **oni** baldaŭ trovas amikojn.
When you are rich, you soon find friends.

Li estas tiel malgranda, ke **oni** ne rimarkas lin.
He is so small that you don’t notice him.

Correlatives

4 ĉi- words

You’ve already learned a number of correlative words beginning with **ki-** and **ti-**. The **ki-** words generally express “what + something”, and the **ti-** words generally express “that + something”. For example:

kiu <i>who (what person)</i>	tiu <i>that one; that person</i>
kie <i>where (what place)</i>	tie <i>there; that place</i>
kial <i>why (what reason)</i>	tial <i>therefore; for that reason</i>
...	

and so on. In the same way, the **ĉi-** words express “all” or “every”, and the ending tells us whether the word refers to a person, thing, place, etc.

ĉiu <i>every person (everybody, everyone)</i>
ĉio <i>everything</i>
ĉia <i>every kind</i>
ĉie <i>everywhere</i>
ĉiel <i>in every way</i>
ĉial <i>for every reason</i>

5 neni- words

Just as the **ĉi-** words express “all” or “every”, **neni-** words express “no” plus the appropriate ending:

neniu <i>nobody; no one</i>
nenio <i>nothing</i>
nenia <i>no kind of</i>
nenie <i>nowhere</i>
neniel <i>in no way</i>
nenial <i>for no reason</i>

Praktiko 6.1: Traduku anglen:

Ĉu neĝas hodiaŭ? Ĉu pluvis hieraŭ? Ne, hieraŭ ne pluvis, sed eble pluvo hodiaŭ. Kia estas la vetero (*weather*) nun? Estas sune, kaj la ĉielo estas blua, sed ne estas varme. Oni diras, ke Esperanto similas la italan lingvon. Se oni havas feriojn, oni deziras havi belan veteron. Ĉiu scias,

ke Svislando estas monta lando. Ĉu vi ricevis leteron hodiaŭ? Ne, neniu en la familio ricevis leteron hodiaŭ, sed mi ricevis unu hieraŭ de mia frato. Kio estas en ĉi tiu tirkesto? Estas nenio en ĝi; ĝi estas malplena. Mi ĵus rigardis en ĝin, sed mi vidis nenion. Kio estas en la rubujo? Tio ne estas malplena; estas rubo en ĝi.

Praktiko 6.2: Traduku esperanten:

This cupboard is full of all-kinds-of books. Where did you go (to) yesterday? I went (to) nowhere; I stayed at home. I have just received a letter from my sister. She says (that) it is very cold there. It is cold everywhere today. It-is-freezing. They say (that) it-is-going-to-snow. Where was it raining yesterday? Everywhere! If it is sunny, everybody is pleased. Do you have a purse? What is in it? There is nothing in it; it is empty. Every room in the house is at your disposal. Thank you! You are a good friend.

Praktiko 6.3: Using one correlative word for each of the following phrases, translate into Esperanto:

What? Where? In what manner? That person. There. Therefore. Everyone. Every kind of. Nobody. For no reason. What kind of? In that place. Everywhere. (In) no way! Who? Why? That kind of. Thus. For that reason. Nowhere. Like that. Such a ... Which one? How? What a ...! That one. Every. Nothing. For what reason? In that way. Everybody. In every way. No one. Everything. For every reason.

More about adverbs

6 Esperanto is particularly rich in adverbs, because any root can be made into an adverb with **-e**, if the sense permits. Adverbs are more widely

used in Esperanto than in English, and we can use them to express ideas that require two or three words in English. Generally speaking, we can use an adverb in Esperanto where we'd use a preposition and noun in English:

Li parolas saĝe.	<i>He speaks wisely. (with wisdom).</i>
Mi dormas nokte.	<i>I sleep at (during the) night.</i>
Li laboras tage.	<i>He works by (during the) day.</i>
matene	<i>in the morning</i>
vespere	<i>in the evening</i>
fakte	<i>in fact; as a matter of fact</i>
cetere	<i>as for the rest; moreover</i>
ekzemple	<i>for example</i>

Days, months, etc.

7 La tagoj de la semajno (*the days of the week*):

lundo *Monday*, **mardo** *Tuesday*, **merkredo** *Wednesday*,
ĵaŭdo *Thursday*, **vendredo** *Friday*, **sabato** *Saturday*,
dimanĉo *Sunday*.

Note: the days of the week are usually not written with a capital letter.

8 La monatoj de la jaro (*the months of the year*)

Januaro *January*, **Februaro** *February*, **Marto** *March*,
Aprilo *April*, **Majo** *May*, **Junio** *June*, **Julio** *July*,
Aŭgusto *August*, **Septembro** *September*, **Oktobro** *October*,
Novembro *November*, **Decembro** *December*.

The months are considered proper names, and proper names are capitalized, as in English.

9 Further uses of -n

We saw that in expressing movement *to* (see unit 5), **-n** is added to the noun or adverb expressing place. This **-n** can be thought of as taking the place of the preposition **al**:

La kato saltas sur la tablon = La kato saltas **al** sur la tablo.
La viro iras en la domon = La viro iras **al** en la domo.

In fact, **-n** can be used in place of *any* preposition. Here are some practical uses:

Time

Mi iros lundon. = Mi iros **je** lundo.
I will go Monday. *I will go on Monday.*

Mi atendas semajnon = Mi atendas **dum** semajno.
I will wait a week. *I will wait for a week.*

Note that **lundon** means *on Monday*, but if we wish to indicate repetition rather than a single day, we use the adverb form: **lunde** = *on Mondays*.

Mi iris lundon, kvankam kutime mi iras marde.
I went on Monday, although I usually go on Tuesdays.

In accordance with this use of **-n**, when writing the date (at the top of a letter, for instance), we write:

Dimanĉon, la duan (2-an) de Marto

or simply:

La 2-an de Marto

Weights and Measures

10 Here again we can use **-n** to replace a preposition, making the sentence more concise:

La monto estas mil metrojn alta. (La monto estas alta je mil metroj.)
The mountain is a thousand meters high.

La pakaĵo pezas du kilogramojn. (... je/ĝis du kilogramoj)
The package weighs two kilograms.

However, if **-n** is already used to show the object, it might be ambiguous to have two **-ns** together. In that case, put the expression of time or measure first—or use a preposition. So instead of **Mi atendis lin du semajnojn**, it might be better to say **Du semajnojn mi atendis lin**, or **Mi atendis lin dum du semajnoj**.

Suffix

11 -er-

The suffix **-er-** is used to denote a unit of a whole—often **-er-** words denote one of many objects of the same kind:


neĝo	<i>snow</i>	neĝero	<i>snowflake</i>
ĉeno	<i>chain</i>	ĉenero	<i>a link</i>
fajro	<i>fire</i>	fajrero	<i>a spark</i>
mono	<i>money</i>	monero	<i>a coin</i>
hajlo	<i>hail</i>	hajlero	<i>hailstone</i>




Note: an **-er-** word usually denotes something complete in itself. For a mere fragment of something, use **fragmento de**.

Veter-prognozo por morgaŭ:

Londono, lundon, la 1-an de Marto
Sune; tre malvarme

Verŝajna vetero hodiaŭ je la 12-a tagmeze



 pluvo
  neĝo
  nebulo
 Sagoj ← indikas direkton de la vento

La orienta aŭ nordorienta vento daŭre blovos super la Britaj Insuloj. En Skotlando kaj orienta Anglujo neĝos ofte kaj, en kelkaj lokoj, forte. En okcidento estos sune, sed pluvetos de tempo al tempo.

Prognozo por la periodo ĝis noktomezo—


Londono, orienta kaj mezlanda Anglujo: Orienta vento; neĝos, kun sunaj periodoj, estos tre malvarme; frostos aŭ frostegos frumatene kaj nokte.

Cornwall kaj Devon: Nebulos aŭ nebuletos matene; poste, estos sune, kun pluveto aŭ neĝeto. Malvarme, sed verŝajne sen frostos.

Cetera Anglujo: Estos sune kun sporada neĝo. Frostos vespere.

Skotlando: Intense malvarme; forte neĝos kaj frostos.

Temperaturo dum la lasta semajno



Nova neĝodanĝero en Skotlando **Helikopteroj helpas**

En norda Skotlando la neĝo denove izolis plurajn vilaĝojn. Helikopteroj denove helpis izolulojn, kaj portis malsanulon al malsanulejo. Hodiaŭ ili portos nutraĵon por homoj kaj bestoj. Oni diras, ke la situacio estas tiel malbona kiel dum la lasta semajno. Sur la insulo Mull falis hajlo kun grandegaj hajleroj.

Praktiko 6.4: Traduku anglen:

Kia estas la vetero en via urbo? Ĉu ofte pluvas? En Hispanujo ne ofte pluvas. Kia estas la somero en Italujo? Kutime dum somero estas varme tie. En Skotlando ofte estas neĝo dum la vintro, kaj de tempo al tempo ĝi izolas plurajn vilaĝojn. Mi vizitos vin merkredon. Mi atendis tri semajnojn, sed ne ricevis respondon. Tiu muro estas du metrojn alta. Landon mi iros en la urbon. La stacidomo estas unu kilometron for de mia domo. Kia estas la vetero hodiaŭ? Estas sune, kun dolĉa vento. Ĉu vi laboras sabate? Ne, mi laboras de lundo ĝis vendredo ĉiusemajne.

Vetero tra Eŭropo

Aŭstrujo kaj Svislando: Neĝis konstante dum la lastaj tagoj. La sportturboj raportas—kiel dum la tuta vintro—bonegajn kondiĉojn por la ski-sporto.

Francujo: En Parizo, malvarme, sed sen neĝo. El Cannes, oni raportas varman kaj dolĉan printempan veteron.

Italujo: Pluvis en multaj lokoj. Vetero, kiun oni ordinare ricevas dum la aŭtuno.

Hispanujo: Granda kontrasto! Ĉi tie, la vetero estis varma kaj suna kiel en somero. Dum pluraj semajnoj, ne unu pluvero aŭ neĝero falis en suda Hispanujo.

Praktiko 6.5: Traduku Esperanten:

In Italy during the summer it is usually hot. What is the weather like in Paris during the summer? Is it warm, or is it cold? It does not often snow in my town. Do you read the weather forecast? It is usually warm here during the day, and cold during the night. They say it is sunny in Italy during March. Do you often see snow in Spain? February comes after January. Which month comes before June? Do people (does one) usually work on Sundays? No, people usually work during five days of the week, but not on Saturdays or Sundays.

Praktiko 6.6: Complete these sentences by filling in the endings (one ending may consist of one, two, or three letters):

1. La ludiloj de Maria estas nov___ kaj bel___.
2. Ili kuŝ___ sur la grand___ tabl___.
3. Hieraŭ mi vid___ mi___ amik___.
4. S-ro Lang ricev___ leter___ el Norveg___ hieraŭ.
5. La kato saltis de la plank___ sur la tabl___.
6. Morgaŭ mi ir___ en la urb___ kaj sid___ en la park___.
7. Trajno oft___ ir___ tre___ rapid___.
8. Mi ĵus leg___ ti___ libr___. Fakte, mi leg___ ĉi___ el ili.

Dialogo: Nova ideo

Richard Lang has returned from the group meeting, and is chatting with his wife, Clare.

Klara Nu, kiel vi ĝuis la kunvenon?

Rikardo Ho, ĝi estis tre interesa, kaj ĉiuj estis tre afablaj.

Klara Bone, mi ĝojas. Kaj kion oni faris?

Rikardo Nu, komence estis mallonga leciono, kaj oni dividis nin en klasojn. Mi estis en la altgrada klaso. Poste unu membro, sinjoro Franks, parolis pri Norvegujo kaj Svedujo.

Klara Ho, tio certe interesis vin, post la vizito de Edvard! Ĉu li menciis lokojn pri kiuj Edvard jam parolis al ni?

Rikardo Jes, mi rekonis plurajn nomojn. Kaj li veturis per la fervojo de Bergen ĝis Oslo, do li certe iris tra Voss! Li ankaŭ vizitis fervojan muzeon en Hamar, kiu uzas Esperanton en klarigaj tekstoj.

Klara Jes, Edvard diris, ke ankaŭ la fervojoj uzas ĝin en klarigoj sur la hortabeloj.

Rikardo Antaŭ la fino de la kunveno mi aŭdis alian interesan aferon. En Francujo estas kastelo kiu apartenas al la francaj esperantistoj (= *homoj, kiuj parolas Esperanton*), kaj esperantistoj el diversaj landoj vizitas ĝin por ferioj aŭ lecionoj.

Klara Tio estas tre interesa. Kie ĝi estas, kaj kio estas ĝia nomo?

Rikardo Ĝi estas la kastelo Grésillon, aŭ Grezijono, kaj ĝi situas apud urbeto Baugé, sude de Le Mans.

Klara Hmm... ĉu ni iru tien por niaj ferioj?

Rikardo Mi ĝojas, ke vi diris tion, ĉar ankaŭ mi havis tiun ideon!

Klara Do, ni diskutos la aferon poste. Nun estas malfrue; ni iru al la lito. Venu!

Demandoj

1. De kie Rikardo revenis?
2. Kia estis la kunveno?
3. Kiaj estis la membroj?
4. Dum la lecionoj, en kiu klaso estis Rikardo?
5. Kiu poste parolis, kaj pri kio?
6. Kien s-ro Franks veturis de Bergen?
7. Kiu muzeo uzas Esperanton en klarigaj tekstoj?
8. Al kiu apartenas la Kastelo Grezijono?
9. Kie ĝi situas?
10. Kial Rikardo kaj Klara ne diskutas la aferon nun?

afabla kind
altgrada advanced (lit. high-grade)
apartenas belongs
aŭtuno autumn, fall
blovas blows
brilo shine, brilliance
cetera remaining
daŭras lasts, endures;
 daŭre continually
denove again
dividas divides
dolĉa sweet, gentle
eble possibly, perhaps
ekzemplo example
fakto fact
falas falls
for away
frua early; **fru-matene** early in
 the morning
grado grade
ĝuas enjoys
helikoptero helicopter
hor-tabelo time-table, schedule
insulo island
intense intensely
izolas isolates
kastelo castle, château
klarigas explain;
 klarigo explanation;
 klariga explanatory
kondiĉo condition
kontrasto contrast

kutime usually
lasta last (just gone)
loko place, spot
mateno morning
metro meter
monato month
nebulo fog
noktomezo midnight
nutraĵo food, nourishment
oni “one”, people in general
 oni diras it is said; they say
periodo period
pluraj several
pluvo rain; **pluvero** raindrop
printempo spring (season)
raportas reports
rekonas recognizes (knows again)
rivero river
sago arrow
semajno week
situas is situated;
 situo situation (place)
skatolo box
somero summer
sporada sporadic
suno sun; **sunbrilo** sunshine
ŝajnas seems
temperaturo temperature
vento wind
verŝajne probably
 (“seemingly true”)
vintro winter

Ĉapitro 7: Televido kaj radio

Parts of the day

1 To say “on Monday morning”, we use **-n** to express “on Monday,” with an adverb to express the part of the day: **lundon matene** (literally: “on Monday in the morning”). For “this morning” we say **hodiaŭ matene**, or “today in the morning.” (Note that **hodiaŭ** does not take **-n**.)

mardon matene	<i>on Tuesday morning</i>
hodiaŭ posttagmeze	<i>this afternoon</i>
hieraaŭ vespere	<i>yesterday evening</i>
morgaŭ nokte	<i>tomorrow night</i>

post-tag-mezo = *after mid-day (literally, after the day’s middle)*

Ordinals

2 To get the numbers “first”, “second”, “third” etc., we put **-a** on the cardinal numbers **unu**, **du**, **tri**, etc.:

unua	<i>first</i>	sesa	<i>sixth</i>
dua	<i>second</i>	sepa	<i>seventh</i>
tria	<i>third</i>	oka	<i>eighth</i>
kvara	<i>fourth</i>	naŭa	<i>ninth</i>
kvina	<i>fifth</i>	deka	<i>tenth</i>
dudeka	<i>twentieth</i>	trideka	<i>thirtieth</i>

With numbers that are written as two separate words (**dek unu**, **dudek unu**, etc.) the numbers are joined by a hyphen and **-a** is added to the last word:

dek-unua	<i>eleventh</i>
dudek-kvina	<i>twenty-fifth</i>
cent-tridek-naŭa	<i>hundred and thirty-ninth</i>

Ordinals are adjectives, and therefore they must “agree” with their nouns:

la unuaj tagoj de la jaro
the first days of the year

lundon, la dek-unuan de Februaro
on Monday, the eleventh of February

3 The cardinal numbers can be made into nouns by adding **-o**:

unu o	du o	tri o	dek-du o	dudek o
<i>a unit</i>	<i>a couple</i>	<i>a trio</i>	<i>a dozen</i>	<i>a score</i>

...and into adverbs by adding **-e**:

unue	due	trie
<i>firstly</i>	<i>secondly</i>	<i>thirdly</i>

4 To express *how many times* a thing has happened, we add the word **foje** to the numbers:

unufoje	dufoje	trifoje	dekfoje
<i>once</i>	<i>twice</i>	<i>three times</i>	<i>ten times</i>

with an adjective, the noun **fojo** is used:

la unua fojo	la dua fojo	la lasta fojo
<i>the first time</i>	<i>the second time</i>	<i>the last time</i>

Don’t confuse **fojo** with **tempo** (see chapter 4). **Tempo** refers to time as a whole, whereas **fojo** refers to an *occasion* when something happens.

5 The following three suffixes are all used with numbers:

(i) **-obl-** is used to denote multiples of the number:

du	<i>two</i>	duobla	<i>double</i>
tri	<i>three</i>	triobla	<i>triple, threefold</i>
kvar	<i>four</i>	kvarobla	<i>quadruple</i>
dek	<i>ten</i>	dekobla	<i>tenfold</i>

(ii) **-on-** is used to denote fractions:

duono *a half*, **triono** *a third*, **kvarono** *a quarter*,
tri kvaronoj *three-quarters*

(iii) **-op-** is used to denote a collective (a number of things taken together):

duope *two at a time, in twos*, **sesope** *in sixes*,
dudekope *in twenties*

Telling the time

6 To ask and tell the time in Esperanto, you can ask:

Kioma horo estas? *What time is it?*

In Esperanto, as in English, there are several ways of giving the same reply. For 1:15 we can say “quarter past one” or “fifteen minutes past one” or “one fifteen”. It’s best to start by choosing one method and learning it thoroughly, instead of trying to master them all at once.

Estas la unua (horo). *It is one o’clock.*

1:10 La unua (kaj) dek (minutoj)

2:15 La dua (kaj) dek kvin (*or ...kaj kvarono*)

4:30 La kvara (kaj) tridek (*or ...kaj duono*)

6:45 La sesa (kaj) kvardek kvin (*or ...kaj tri kvaronoj*)

Note: The “hour” figure always ends in **-a**; i.e. for “one o’clock” we say “the first hour”. The words **horo** and **minutoj** may be used, but for brevity they are often dropped. **Kaj** may also be dropped except before fractions like **kvarono** and **duono**.

The same method can be used with 24-hour clocks:

21:35 La dudek-unua (kaj) tridek kvin

When we want to say *at* a certain time, we use **je**:

Mi renkontos vin **je** la sepa kaj kvarono.
*I’ll meet you **at** quarter past seven.*

Note that **atm.** (**antaŭtagmeze**) = a.m., and **ptm.** (**posttagmeze**) = p.m.

7 **Antaŭ** before an expression of time is often translated by *ago*:

Mi vidis lin **antaŭ** du jaroj.
*I saw him two years **ago**.*

Antaŭ tri horoj mi estis en la butikoj.
*Three hours **ago** I was in the shop.*

Similarly, **post** is often translated by *in*:

Li estos libera **post** du jaroj.
*He will be free **in** two years.*

Post du horoj mi estos en Londono.
***In** two hours I will be in London.*


Praktiko 7.1: Traduku anglan:

Kioma horo estas? Ĉu estas la sepa? Ankoraŭ ne; estas nur la sesa (kaj kvardek kvin. Kion vi faros hodiaŭ? Hodiaŭ matene mi iros en la urbon. Unue mi iros al la poŝtoŝtacio kaj aĉetos poŝtmarkojn. Poste mi iros al la stacidomo por informoj pri vagonaroj al Londono. Ĉu vi ne iris tien hieraŭ posttagmeze? Jes, sed mi forgesis pri la poŝtmarkoj. Hieraŭ matene mi renkontis malnovan amikon. Mi unue renkontis lin antaŭ tri jaroj en Francujo. Post tridek minutoj estos la deka horo. Do, nun estas la naŭa kaj duono.

Praktiko 7.2: Traduku esperanten:

I am going to the station this morning. When will you come back? I will not come back until twelve o'clock. I met Mr. and Mrs. Lang yesterday evening. Yesterday was the twenty-first of January. What will the date be tomorrow? I have been there three times. I was there four years ago. I will be there again in three months. Where is the meeting-place of the Esperanto group? It is near the town hall. The group meets on Monday evening at half past seven. How long do the meetings last? Usually they last two hours.

Praktiko 7.3: Kioma horo estas? Respondu Esperante. (“Estas la”)



Quantity

8 Da, de, and el

When we want to indicate the *quantity* or *number* of something, the “of” is translated by **da**:

tuno **da** karbo
a ton of coal

dudeko **da** jaroj
a score of years

glaso **da** akvo
a glass of water

kilogramo **da** teo
a kilogram of tea

In other words, **da** is used if the previous word answers the question “How much?” or “How many?” Notice the difference between

taso **de** teo *a cup of tea (not coffee, etc.)*
and taso **da** teo *a cup(ful) of tea (not a potful, etc.)*

However, **da** is used only when we are talking about a quantity or number of something in general. If we are speaking of some particular substance (i.e., if it is defined by **la** or **tiu**) then “of” is translated by **de**:

kilogramo **de** **tiu** teo sako **de** **tiu**j pomoj
a kilogram of that tea *a sack of those apples*

Sometimes we use **da** when “of” is not used in English:

pli **da** pano *more bread*

When we are talking about a few items *out of* a known group, **el** may be used in place of **de**:

duo **el** **la** kukoj tri **el** **tiu**j libroj
a couple of the cakes *three of those books*

9 Kiom, tiom, etc.

Kiom = *how much? how many?* **tiom** = *that/so much, that/so many;*
ĉiom (hardly used) = *all of;* **neniom** = *none, none at all.*

Kiom mi ŝuldas? Tiom mi ŝuldas.
How much do I owe? *I owe so much.*

Kiom de la kuko vi deziras?
How much of the cake do you want?

Mi deziras ĉiom. or Mi deziras neniom.
I want all (of it). *I want none (of it).*

When **tiom**, **kiom** are used together, they are translated by *as much as*, or *as many as*:

Helpu lin **tiom**, **kiom** vi povas.
Help him as much as you can.

Mi havas **tiom**, **kiom** vi.
I have as many as you.

When we ask “How much? / How many?” or express “So much / so many” *of* a named article, the “of” is always included—even though it is omitted in English—and it is translated by **da**:

Kiom da akvo vi havas?
How much water do you have?

Ni vidis tiom da neĝo.
We saw so much snow.

Kiom da jaroj vi havas?
How old are you? (How many years do you have?)

Ŝi havis tiom da infanoj.
She had so many children.

Expressions of time

10 Kiam, tiam, etc.

Kiam = *when;* **tiam** = *then, at that time;* **ĉiam** = *always (all the time);*
neniam = *never (at no time).*

Kiam vi venos?
When will you come?

Tiam li loĝis en Londono.
Then (at that time) he lived in London.

Li ĉiam estas preta.
He is always ready.

Ŝi neniam parolas al mi.
She never speaks to me.

Suffix

11 -aĵ-

The suffix **-aĵ-** is used to denote some concrete *thing* that is made from the root, or possesses the quality of the root:

pakas <i>packs</i>	pak aĵo <i>package, piece of luggage</i>
manĝas <i>eats</i>	manĝ aĵo <i>food</i>
konstruas <i>builds</i>	konstru aĵo <i>a building</i>

In particular, **-aĵ-** indicates the flesh of an animal used for food:

porko <i>a pig</i>	pork aĵo <i>pork</i>
ŝafo <i>a sheep</i>	ŝaf aĵo <i>mutton</i>
bovido <i>a calf</i>	bovid aĵo <i>veal</i>
fiŝo <i>a fish</i>	fiŝ aĵo <i>fish (as food)</i>

It often gives the idea of “a piece of”

muziko <i>music</i>	muzik aĵo <i>a piece of music</i>
nova <i>new</i>	nov aĵo <i>piece of news</i>
teatro <i>theater</i>	teatr aĵo <i>a play, piece</i>
majstro <i>maestro</i>	majstr aĵo <i>masterpiece</i>

Televidprogramo: Studloko en Francujo — 8:30 ptm.

Hodiaŭ nia programo “Studlokoj” vizitas, ne universitaton aŭ kolegion kiel kutime, sed kastelon en Francujo, kiu apartenas al la francaj esperantistoj. Do, ne surprize, oni studas tie ne la francan lingvon, sed Esperanton! Kutime okazas tri diversgradaj kursoj, el kiuj unu ĉiam estas por komencantoj, kun geknaboj kaj plenkreskuloj, aŭ geknaboj aparte. Tiuj kursoj ofte estas per rekta metodo (nur en Esperanto) ĉar diverslandanoj (*divers-land-anoj*) ofte vizitas la kastelon Grésillon.

Sed de tempo al tempo, dum la posttagmezoj, okazas kursoj pri diversaj aliaj aferoj, ekzemple: foto-rivelado aŭ farado de korboj, emajlitaj kupraĵoj, kolĉenoj per bidoj, sakoj el “makramo” aŭ artaj desegnaĵoj per streĉitaj fadenoj ĉirkaŭ najletoj. Tiaj kursoj, kompreneble, dependas de la ĉeesto de kapabla respondeculo. Pro tiuj kursoj, la kastelo nomiĝas

“Esperantista Kulturdomo”.

La kastelo Grésillon situas en la bela valo de la rivero Loire, kaj staras en 17-hektara parko kun lageto, insuleto, banejo, infanludejo kaj ludkampoj. Esperantistoj vizitas ĝin el la tuta mondo, do oni ekkonas tie esperantistojn el multaj landoj, kaj multaj el ili vizitas la kastelon, aŭ kulturdomon, jaro post jaro. Kiam ili ne studas, ili vizitas pitoreskajn vilaĝojn, belajn urbojn, zoologian ĝardenon, aŭ la famajn

kastelojn de la Loire-valo.


Oni ankaŭ naĝas en la naĝejo, fiŝkaptas en la rivero, aŭ ludas tenison,

tablotenison,

retpilkon, kartludojn, ŝakon, ktp.*

Nu, rigardu la filmon hodiaŭ vespere, kaj vidu ĉi tiun vere internacian studlokon!

***ktp: kaj tiel plu** *and so on.*



Praktiko 7.4: Traduku anglen:

Kioma horo estas? Estas la sepa kaj duono. Post unu horo kaj duono estos la naŭa horo. Antaŭ du horoj li estis en la lernejo. Post du monatoj mi estos en Svedujo. Ĉu plaĉas al vi teo? Jes, ĝi tre plaĉas al mi. Kiom da kafo vi deziras? Unu kilogramon, mi petas. Hieraŭ estis la unua de majo. Kiam mi vizitu vin? Venu lundon aŭ mardon; mi estos libera je la sepa. Hieraŭ mi ricevis novaĵon de mia amiko en Francujo. Ĉu vi preferas porkaĵon aŭ bovidaĵon? Ĉu vi aŭdis la novaĵojn hodiaŭ matene? Je kioma horo ni vidos la filmon? Ni vidos ĝin je la naŭa kaj duono, post la novaĵoj. La programo “Studlokoj” plaĉas al mi. Kutime ĝi estas pri universitatoj kaj kolegioj, sed hodiaŭ ĝi estos pri kastelo en Francujo.

Praktiko 7.5: Traduku Esperanten:

At what time do you hear the weather forecast? When did you hear the news? Will you come on Monday or Friday? We heard an orchestra at three o'clock. We will come at half past four or quarter to five. What is half of six? What is a quarter of a dozen? Three days ago I saw a play. In seven weeks I will receive permission. How many clocks do you have? We heard an hour of music.

Dialogo: Diskuto pri veturo

La familio Lang diskutas la veturon al Grésillon.

Andreo Kiel ni veturos al Grezijono, Paĉjo?

Rikardo Ho, mi opinias, ke estos plej bone se ni iros aŭte. Kun kvar personoj en aŭto, kostos malpli ol per vagonaro, kaj ni vidos la pejzaĝon survoje (sur la vojo).

Klara Jes, tio estas bona ideo, se ni ne veturos tro longe dum unu tago.

Rikardo Ho, tio ne necesos. Ni rigardu la mapon... nu, se ni ekiros, ni diru, sabaton fru-matene, ni estos en Dovro (*Dover*) tagmeze.

Klara Kaj kiam ni iros sur la ŝipon?

Rikardo Certe estos ŝipo kiu ekiros al Bulonjo (*Boulogne*) ĉirkaŭ la mezo de la tago, kaj ni manĝos surŝipe....

Andreo Ho, bone!

Rikardo Ni rigardu la mapon denove. Jen Bulonjo! Sabaton posttagmeze ni veturos de tie ĝis Abbeville, kaj poste sur tiu vojo en la direkto de Rouen, sed ni tranoktos survoje, eble tie, en Neufchâtel, kaj dimanĉon matene ni denove ekveturos.

Klara Kiom da mejloj estas de Bulonjo ĝis Neufchâtel?

Rikardo Nu... mi kalkulu... inter cent kaj cent dek.

Klara Bone. Tio ne estas tro longa veturo. Kaj kie estas Grezijono?

Rikardo Mi vidu... jen Baugé, la apuda urbeto. Rigardu la vojon. Neufchâtel estas tie. Ni iros tra Rouen; poste laŭ tiu ĉi vojo ĝis Alençon. Poste al Le Mans, La Flèche kaj ĝis Baugé.

Andreo Ĉu ni vidos la aŭtan vetkurejon de Le Mans, kie okazas la dudek-kvar-hora vetkuro?

Rikardo Jes, mi opinias, ke ni veturos ĉirkaŭ kvin mejlojn laŭ la vetkurejo!

Andreo Ho, bonege!

Klara Kaj kiom da mejloj estas de Neufchâtel ĝis Grezijono?

Rikardo Ho, ĉirkaŭ cent naŭdek.
Klara Do, ni certe estos en Grezijono dum la posttagmezo!
Andreo Kaj kion ni faros tiam?
Rikardo Unue ni trovos la dormĉambron, kaj poste ni ĉirkaŭrigardos la lokon!

Demandoj

1. Kiel la familio veturos de Newtown ĝis Grezijono?
2. Kiam ili ekveturos?
3. Kie ili iros sur la ŝipon?
4. Kie ili manĝos?
5. En kiu urbo ili eble tranoktos?
6. Kiom da mejloj estas de Bulonjo ĝis Neufchâtel?
7. Kaj kiom de Neufchâtel ĝis Grezijono?
8. Kio okazas en Le Mans ĉiun jaron? (ĉiujare)
9. Ĉu la familio vidos la vetkurejon?
10. Kion ili faros kiam ili alvenos (*arrive*) en Grezijono?

aktuala topical, up-to-date
akvo water
ankoraŭ still (continuing);
ankoraŭ ne not yet (still not)
aparta separate
aŭdas hears
bidoj beads
certe certainly
ĉeestas (ĉe-estas) is present (at)
da (see note 8)
dato date

desegnas draws; **desegnaĵo** a drawing
do so, therefore, then
eble possibly, perhaps
ekiras sets off, sets out
ekkonas gets to know, makes the acquaintance of
emajlita enamelled
fadeno thread
farado doing, making
fermas closes; **fermo** close

fotorivelado photo-developing
ĝangalo jungle
hektaro hectare (~2.5 acres)
horo hour
horloĝo clock, watch
inter between, among; **internacia** international
kampo field; **kamparo** country(side)
kantas sings; **kanto** song
karto card; **kartludo** card-game
kazo case (medical, law, etc.)
kolo neck; **kolĉeno** necklace
komencanto beginner
korbo basket
kreskas grows
kulturdomo cultural center
kupro copper
kurso course (of lessons)
laŭ along, according to
makramo macramé
matenmanĝo breakfast
mejlo mile
memoras remembers; **memoro** memory
miras is amazed, wonders
najlo nail
necesas is necessary
noktomezo midnight
nomiĝas is called
opinias thinks (has an opinion)
pano bread
pejzaĝo landscape, scenery

pitoreska picturesque
plej most
plenkreskulo grown-up, adult
pli more
poŝt-oficejo post office
preferas prefers; **preferata** favorite
prezentas presents, introduces
respondeca responsible
retpilko volleyball
sako bag, sack
streĉita stretched, taut
studas studies
supro top; **supra** top(most), highest
ŝako chess
ŝtupo a step; **ŝtuparo** staircase
teamo team
tranoktas spends the night
tro too, too much
vagono (railway) car; **vagonaro** (= **trajno**) train
valo valley
verda green
vetkuro race; **vetkurejo** racetrack
vivo life; **vivas** lives

Esprimoj:

dependas de depends on
jaro post jaro year after year
rekta metodo direct method (of language teaching)

Ĉapitro 8: Notoj pri la naturo

Comparison

1 To make comparisons, we often use adjectives that express three “degrees” of comparison: positive, comparative, and superlative. In English these degrees are usually expressed with “-er” and “-est”:

<i>Positive</i>	<i>Comparative</i>	<i>Superlative</i>
tall	taller	tallest

For longer words, however, we use “more” and “most”:

<i>Positive</i>	<i>Comparative</i>	<i>Superlative</i>
beautiful	more beautiful	most beautiful

And a few adjectives have very irregular forms:

<i>Positive</i>	<i>Comparative</i>	<i>Superlative</i>
good	better	best

In Esperanto, we always express the degrees with **pli** and **plej**:

<i>Positive</i>	<i>Comparative</i>	<i>Superlative</i>
alta	pli alta	plej alta
bela	pli bela	plej bela
bona	pli bona	plej bona

Mi havas **pli** bonan ideon.
I have a better idea.

Everest estas la **plej** alta monto en la mondo.
Everest is the tallest mountain in the world.

Ĝi estas la **plej** bela floro.
It is the most beautiful flower.

Li estas mia **plej** bona amiko.
He is my best friend.

2 We use **ol** with **pli** to translate “than”:

Li estas **pli** alta **ol** vi.
He is taller than you.

Tiu libro estas **pli** bona **ol** ĉi tiu.
That book is better than this one.

Tiu floro estas **pli** bela **ol** rozo.
That flower is more beautiful than a rose.

And we use **el** with **plej** to translate “of” in the sense “out of a group”:

Li estas la **plej** alta **el** la fratoj.
He is the tallest of the brothers.

Mi havas tri **el** la **plej** belaj floroj.
I have three of the most beautiful flowers.

Jen la **plej** bona **el** miaj libroj.
Here is the best (one) of my books.

3 Adverbs are compared in the same way.

alte	pli alte	plej alte
<i>highly</i>	<i>more highly</i>	<i>most</i>

bele	pli bele	plej bele
<i>beautifully</i>	<i>more beautifully</i>	<i>most beautifully</i>

bone	pli bone	plej bone
<i>well</i>	<i>better</i>	<i>best</i>

Ŝi kantas **plej** bele.
She sings most beautifully.

Li faris ĝin **pli** bone **ol** vi.
He did it better than you.

Word order

4 The usual word order in Esperanto is similar to English: subject—verb—object. However, in order to emphasize the object or some other part of the sentence, the word order is sometimes changed:

La viron mi ne konas, sed mi konas lian amikon.
The man I don't know, but I know his friend.

Al infanoj mi ne donas monon.
To children I don't give money.

5 Note also that a sentence never ends with a preposition, as it sometimes does in English:

Kun kiu vi korespondas?
With whom do you correspond? (Who do you correspond with?)

Pri kio vi parolas?
About what are you talking? (What are you talking about?)

Praktiko 8.1: Traduku anglen:

Li estas pli afabla ol ŝi. Mi havas pli bonan hundon ol vi. Mia frato estas pli alta ol mi. Li estas la plej alta el la familio. Andreo iras al la lito pli frue ol Maria. Tigro estas pli danĝera ol kato. Tiu libro estas plej interesa. Stefano estas la plej inteligenta el tiuj tri kanboj. Vagonaro veturas pli rapide ol buso. Mi esperas, ke vi estas pli sana nun. Kiu estas

la plej rekta vojo al la urbocentro? Ŝi kantas la plej bele el ĉiuj la knabinoj. Kun kiu vi vizitis Londonon? En kiu ĉambro vi manĝas? Mi ne scias pri kio vi parolas.

Praktiko 8.2 Match the answers to the questions:

- | | |
|---|--|
| 1. Kiu estas la plej granda urbo en Anglujo? | a. Ne, ŝi ne estas pli bela. |
| 2. Kun kiu ŝi venis al via domo? | b. Ne, mi dormas en mia dormoĉambro. |
| 3. Kiu estas la plej granda knabo el viaj fratoj? | c. Jes, ŝi estas pli juna ol mi. |
| 4. En kiu ĉambro vi dormas? | d. Londono estas la plej granda urbo en Anglujo. |
| 5. Ĉu via frato estas pli alta ol vi? | e. Mi dormas en mia dormoĉambro. |
| 6. Ĉu vi dormas en la kuirejo? | f. Ŝi venis kun s-ro Smith. |
| 7. Sur kio vi sidis dum vi parolis? | g. Mia fratino estas pli juna ol mi. |
| 8. Ĉu via fratino estas pli bela ol vi? | h. Mi sidis sur seĝo. |
| 9. Ĉu via fratino estas pli juna ol vi? | i. Mia frato estas la plej granda knabo. |
| 10. Kiu estas pli juna ol vi? | j. Ne, mi estas pli alta ol li. |

Praktiko 8.3 Traduku Esperanten:

Our house is smaller than yours. That girl is the most beautiful in the class, but she is not the happiest. I am stronger than my brother because he is younger than I. That street is wider than this one. It is the widest street in the town. Which is the most direct (straightest) way to the town

hall? Andreo was ill yesterday, but he is better now. Who was the most famous English poet? What are you talking about? Which town are you going to? Who did you come with? I came with my younger brother.

6 In negative sentences, **ne** usually stands before the verb, but it may be placed before another word for emphasis:

Mi **ne** skribis leteron.
I did not write a letter.

Ne mi skribis leteron.
It was not I who wrote a letter (but someone else).

Mi skribis **ne** leteron, sed poŝtkarton.
It wasn't a letter I wrote, but a postcard.

Suffixes

7 The suffix **-ad-** expresses a continuation or constant repetition of an action. In the noun form it equals the English “-ing”:

pafas <i>shoots</i>	pafado <i>a firing</i>
legas <i>reads</i>	legado <i>reading (the process)</i>
iras <i>goes</i>	iradas <i>keeps on going</i>
kantas <i>sings</i>	kantado <i>singing (the act)</i>
uzas <i>uses</i>	uzado <i>usage</i>
dancas <i>dances</i>	dancado <i>dancing</i>

It is also used with the names of some instruments to name their action:

martelo <i>a hammer</i>	martelado <i>hammering</i>
broso <i>a brush</i>	brosado <i>brushing</i>
krono <i>a crown</i>	kronado <i>crowning</i>

8 The suffix **-ar-** is used to denote a collection of the persons or objects indicated by the root:

kampo <i>field</i>	kamparo <i>countryside</i>
monto <i>mountain</i>	montaro <i>a mountain range</i>
arbo <i>tree</i>	arbaro <i>a wood, forest</i>
ŝafo <i>a sheep</i>	ŝafaro <i>a flock of sheep</i>
homo <i>a human</i>	homaro <i>humankind</i>
hirundo <i>a swallow</i>	hirundaro <i>a flight of swallows</i>
birdo <i>bird</i>	birdaro <i>a flock of birds</i>

9 The suffix **-ebl-** is used to denote possibility (like “-able”, “-ible”):

komprenas <i>understands</i>	komprenebla <i>understandable</i>
movas <i>moves</i>	movebla <i>moveable</i>
legas <i>reads</i>	legebla <i>readable</i>
vidas <i>sees</i>	videbla <i>visible</i>
sentas <i>feels, has a sense of</i>	sentebla <i>perceptible</i>
kredas <i>believes</i>	kredebla <i>believable</i>
kalkulas <i>calculates</i>	kakulebla <i>calculable</i>


10 The suffix **-ind-** is used to denote worthiness, merit, deserving of something:

amas <i>loves</i>	aminda <i>loveable (deserving of love)</i>
faras <i>does</i>	farinda <i>worth doing</i>
laŭdas <i>praises</i>	laŭdinda <i>praiseworthy</i>
miras <i>marvel,</i> <i>be surprised at</i>	mirinda <i>marvellous, wonderful,</i> <i>astonishing</i>
rimarkas <i>notice,</i> <i>remark, observe</i>	rimarkinda <i>remarkable,</i> <i>worth noticing</i>
vizitas <i>visits</i>	vizitinda <i>worth visiting</i>

11 -id-

The suffix **-id-** is used to denote the young or offspring of:

ŝafo <i>sheep</i>	ŝafido <i>lamb</i>
koko <i>chicken</i>	kokido <i>chick</i>
kato <i>cat</i>	katido <i>kitten</i>
hundo <i>dog</i>	hundido <i>puppy</i>
bovo <i>bovine, ox</i>	bovido <i>calf</i>
leono <i>lion</i>	leonido <i>lion-cub</i>



Vidaĵo en la ŝtatparko de Nord-Kimrujo: ŝafaro, kun ŝafidoj, antaŭ la alta montaro Snowdonia

Teksto: Notoj pri la naturo


Pri la Birdmigrado

La unuaj krokusoj jam estas videblaj; sur la kampoj, ŝafidoj kaj bovidoj saltas. Printempo estas sentebla en la aero. Baldaŭ ni atendas la revenon de la migraj birdoj.

La migrado estas plej mirinda fenomeno, kiun ni ankoraŭ ne perfekte komprenas. Ni pensu pri la *hirundo*. Kredeble vi scias, ke la hirundaro flugas en aŭtuno al Afriko; sed ĉu vi scias, al kiu parto de Afriko? Ne al la nordo, sed al *Suda Afriko*, al la ĉirkaŭaĵo de Johannesburg!

Tiu birdeto, do, flugas 6 500 mejlojn en la aŭtuno, kaj denove 6 500 mejlojn en la frua printempo! Sed eĉ pli kurioza estas la reveno al Eŭropo. Ili revenas ne nur al la sama lando, ne nur al al sama parto de la lando, sed al la sama farmdomo en la sama vilaĝo, kie ili vivis dum la antaŭa somero! Kaj ili venas tre akurate. La mapo montras kiel ili, tago post tago, flugas trans Eŭropon al Britujo kaj Skandinavio.

Alia rimarkinda fakto estas, ke la



pli junaj birdoj ofte flugas *antaŭ* la pli aĝaj—sur vojo, do, kiun ili tute ne konas, kaj al celo 6 500 mejlojn for.

Eble pli mirinda estas marbirdo kun la nomo Arkta Marhirundo, kvankam ĝi vere ne estas hirundo (anglalingve: *Arctic Tern*), kiu vivas dum nia somero en la arka regiono, kaj dum nia vintro en la Antarkto! Tiu birdo, do, preskaŭ neniam konas la nokton; por ĝi, preskaŭ ĉiam estas tage.

Pri Ŝtataj Parkoj

La ideo pri ŝtatparkoj venas al ni el Usono. La plej rimarkinda el la pioniraj ŝtatparkoj estas tiu de Yellowstone (=”Flava Ŝtono”) en Wyoming, kiu estas publika parkego jam de 1872, kaj enhavas pli ol 3 800 kvadratmeilojn. (Tio

signifas, ke ĝi estas duone tiel granda, kiel la tuta lando Kimrujo.) Ĝi estas fama pro belegaj pejzaĝoj kaj pro varmegaj akvofontoj.

En multaj landoj nun ekzistas similaj naturparkoj, en kiuj la bestaro kaj birdaro ricevas protektadon. Ekzemple, en Sud-Afriko la grandega ŝtatparko Kruger, tra kiu homoj veturas laŭ vojoj, apud kiuj ludas leonoj, ĝirafoj kaj elefantoj.

Al ni en Britujo mankas leonoj, escepte de en zoologiaj ĝardenoj

kaj tiel-nomataj “safari-parkoj”, sed ankaŭ ni havas jam niajn ŝtatparkojn—danke al longa laborado kaj klopodado de multaj entuziasmoj. Du el la plej grandaj estas tiuj de Norda Kimrujo kaj de la Laga Regiono. Tiuj parkoj donas, kaj ĉiam donos, nekalkuleblan plezuron al la brita popolo kaj al eksterlandanoj kiuj vizitas nin. Ili konservas por ĉiam la plej belajn regionojn de nia lando; en ili ni ĉiam libere studos la naturon, kaj ĝuos ripozon en belegaj ĉirkaŭaĵoj.

Praktiko 8.4: Traduku anglan:

Ĉu bovido estas pli granda ol ŝafido? Oni vidas pli da ŝafidoj kaj bovidoj dum la printempo ol dum la aŭtuno. Oni ofte vidas florojn en la kamparo dum somero. En niaj ŝtatparkoj oni ne vidas leonojn, ĝirafojn kaj elefantojn. Juna leono estas leonido. Kiuj floroj estas videblaj frue en printempo? Kio estas rimarkinda pri la migrado de la hirundoj? En aŭtuno la hirundoj flugas de Britujo ĝis Suda Afriko. Ĉu plaĉas al vi promeni tra arbaro? Jes, arbaroj ofte estas vizitindaj. La dancado ne tre plaĉas al mi; mi preferas la kantadon. La ŝtatparkoj estas ĉiam vidindaj. Ili donas nekalkuleblan plezuron al ĉiuj, kiuj vizitas ilin. Niaj ŝtatparkoj donas plezuron ne nur al la brita popolo, sed ankaŭ al tiuj eksterlandanoj, kiuj vizitas nin.

Praktiko 8.5: Traduku Esperanten:

What do you know about bird migration?¹ Which is taller, a puppy or a kitten? You don't see herds of elephants in this country. Flocks of swallows migrate in autumn. The national park is a praiseworthy idea. What is noteworthy about the national park in Wyoming? Is the Kruger national park² the biggest in the world? I don't know, but I know that two of the biggest in Britain are those of North Wales and the Lake District. The arctic tern migrates from the Arctic to the Antarctic.

1 **la birdmigrado** *bird migration*; **la kantado** *singing*; **la dancado** *dancing*. The word **la** is often used (but not translated) when a noun is used in a general sense: **Mi amas la hundojn** *I like dogs*.

2 **La ŝtatparko Kruger**. “Kruger” is the name of the park.

Praktiko 8.6 Vera aŭ malvera?

1. Oni jam plene komprenas la fenomenon de la birdmigrado.
2. La hirundo migras printempe de Suda Afriko.
3. La pli junaj birdoj ofte flugas antaŭ la pli aĝaj.
4. La ŝtatparko de Yellowstone estas publika parkego jam de la jaro mil okcent sesdek du.
5. Ĝi estas tiel granda kiel la tuta lando Kimrujo.
6. Ĝi estas fama pro varmegaj akvofontoj.
7. En malmultaj landoj ekzistas similaj naturparkoj.
8. La Nord-Kimruja ŝtatparko estas unu el la plej grandaj en Britujo.
9. Ĝi estas tiel granda kiel la ŝtatparko de Yellowstone.
10. La ŝtatparkoj konservas por ĉiam la plej belajn regionojn de nia lando.

Dialogo: En la Kastelo Grésillon (Greziĵono)

La matenon post la alveno al Greziĵono. La familio jam matenmanĝis.

Rikardo Nu, ni alvenis nur hieraŭ posttagmeze, kaj mi sentas, ke mi estas ĉi tie* jam dum kelkaj tagoj!

Klara Jes, ni jam konas tiom da homoj, ke mi sentas min kvazaŭ hejme! Nu, kion ni faru hodiaŭ?

Rikardo Unue, estos bone se ni decidis pri kursoj....

Andreo Mi jam decidis!

Rikardo Ho, kaj kion vi decidis?

Andreo Nu, miaj novaj amikoj, Petro el Francujo kaj Fulvio el Italujo, ĉeestos la Esperanto-kurson por geknaboj, do ankaŭ mi iros al tiu!

Klara Bona ideo! Kaj ĉu ankaŭ vi tion faros, Maria?

Maria Jes, kun mia germana amikino Trudi!

Rikardo Niaj infanoj jam havas internacian amikaron, ĉu ne?

Klara Jes; tre bona afero! Mi provos la kurson pri makramo. Tiuj ekzemploj, kiujn la instruistino alportis, estis tre belaj.

Rikardo Se la instruisto pri foto-rivelado venos, mi aniĝos al tiu kurso, sed mi ne scios tion ĝis hodiaŭ vespere. Se li ne alvenos, mi venos kun vi al la makramo!

(Franco, Robert Chabot, alproksimiĝas al ili.)

Roberto Bonan matenon, geamikoj! Mi estas Roberto Chabot. Vi estas el Anglujo, ĉu ne?

* In a phrase such as “I have been here for a week”, implying “and still am”, Esperanto uses the present tense: *I have been learning Esperanto for six months*. **Mi lernas Esperanton dum ses monatoj.**

Rikardo Jes, Rikardo kaj Klara Lang, el Newtown, kaj niaj gefiloj, Andreo kaj Maria. Kaj laŭ via nomo vi estas franco.

Roberto Vi pravas. Se vi ankoraŭ ne decidis pri io alia, ĉu plaĉos al vi promeno tra la arbaro ĝis Baugé?

Klara Volonte. Estas nia unua mateno ĉi tie, kaj ĝis nun ni iris nenien!

Andreo Mi restos tie ĉi se vi permesas, Panjo, kaj ludos kun miaj du amikoj.

Maria Ankaŭ mi volonte ludos kun Trudi!

Klara Nu, mi kredas, ke vi estos sekuraj ĉi tie....

Roberto Certe ili estos, inter tiom da geamikoj!

Klara Do, bone! Ni ekiru, Roberto!

(Post aniĝo al la kursoj, Rikardo kaj Klara promenas kun Roberto tra arbaro al Baugé, kaj post kafo tie, vizitas muzeon en la Kastelo de Baugé. Kiam ili estas pretaj eliri, la kuratoro parolas al ili.)

Kuratoro Nu, gesinjoroj, mi esperas, ke vi trovis vian viziton interesa.

Rikardo Jes, ĝi estis interesege, sinjoro, dankon!

Kuratoro Mi tre ĝojas pri tio. Kaj nun, gesinjoroj, se vin interesos alia vizito dum vi estas en nia urbeto, mi rekomendas al vi la farmaciejon.

Klara La farmaciejon? Kial ni vizitu farmaciejon? Ni ne bezonas medikamentojn!

Kuratoro Mi esperas, ke ne, sinjorino. Sed eĉ se jes, oni ne vendos ilin tie.

Rikardo Ĉu vere? Kia farmaciejo estas tiu, kie oni ne vendas medikamentojn?

Kuratoro Ĝi estas farmaciejo de la dek-sepa jarcento, kiun oni konservas en ĝia tiama stato!

Klara Ho, kiel interese! Ni devas vidi tion!

Roberto Do, ni vidos ĝin kune. Mi jam konas ĝin; ĝi situas en la malsanulejo, ĉu ne?

Kuratoro Vi pravas, sinjoro. Do, gesinjoroj, bonan viziton, kaj ĝis revido!

Ĉiuj Ĝis revido, sinjoro, kaj dankon!

Demandoj

1. Kial Klara sentas sin kvazaŭ hejme?
2. Kial Andreo ĉeestos la kurson por geknaboj?
3. El kiuj landoj venas la geamikoj de Andreo kaj Maria?
4. Kial Klara provos la kurson pri makramo?
5. Kiu akompanas Roberton al Baugé?
6. Tra kio ili promenas?
7. Kion ili unue vizitas tie?
8. Kiu rekomendas viziton al la farmaciejo?
9. Kial la farmaciejo ne vendas medikamentojn?
10. Kiu jam vizitis ĝin?

aĝo age
akompanas accompanies
alportas brings
alvenas arrives
aniĝas joins
Antarkto the Antarctic
Arkto the Arctic
bezonas needs; **bezono** need
celo aim, goal, destination
ĉe-estas is at, attends
ĉirkaŭaĵoj surroundings
danko gratitude; **dankon!** thank you!; **danke al** thanks to
enhavas contains
escepte de except
farmaciejo pharmacy
farmdomo farmhouse
flava yellow
fonto spring, source
hirundo a swallow
instruisto teacher
jarcento century
Kimrujo Wales
klopodas takes steps to, endeavors
konservas preserves
kredas believes
kuratoro curator, guardian
kurioza curious, quaint
kvadratmejlo square mile
kvazaŭ as if
makramo macramé (knotted thread-work)

migras migrates
ol than
permesas permits, allows
pravas is right (in an opinion, guess, etc.)
provas tries out, tests
sekura safe, secure
signifas means; **Kion signifas...?** What does ... mean?
ŝtatparko state/national park
tra through
tute quite; **ne tute** not quite; **tute ne** not at all
vendas sells
vivas lives, is alive
volonte willingly, would like to

Esprimoj:

ĉu ne? haven't they? isn't it? don't we? etc.
ĉu vere? really?
devas vidi must see
mi esperas, ke jes I hope so
pli aĝa older
se jes if so; **se ne** if not
tago post tago day after day
tiel-nomata (t.n.) so-called

Ĉapitro 9: Hejma paĝo

The infinitive

1 To name an action or state without reference to person or time, we use a form of the verb called the *infinitive*. In English, infinitives are often expressed with “to” (e.g., “to be”, “to eat”, “to speak”), but in Esperanto the infinitive has a distinctive ending: **-i**:

esti to be	paroli to speak
manĝi to eat	sidi to sit
meti to put	stari to stand

Note: do not confuse this “to” with **al**, which expresses *direction*. Do not say **al manĝi** for “to eat”.

2 In Esperanto, as in English, there are some verbs which need another verb in the infinitive to complete their meaning. For example, we don’t say “I must something”, “I can something”, or “I am able something”, but rather “I must *do* something”, “I can *do* something”, “I am able to *do* something”.

This “do”—with or without “to”—is the infinitive, and is translated by **fari**:

Mi devas **fari** ion.
I must (am obligated to) do something.

Mi povas **fari** ion.
I can (am able to) do something.

In general, if two verbs come together, the second one will be infinitive, i.e., it will end in **-i**.

Prepositions with an infinitive

3 The ending “-ing” in English is often equal to an infinitive; so a preposition before an infinitive in Esperanto is usually translated by the corresponding preposition in English plus a word ending in “-ing”:

Anstataŭ Anstataŭ **ripozi**, li laboris.
Instead of *Instead of resting, he worked.*

Anstataŭ **iri** hejmen, mi iris en kafejon.
Instead of going home, I went into a cafe.

Krom Li vizitis min krom **viziti** vin.
Besides *He visited me besides visiting you.*

Krom **kanti** li volis fajfi.
Besides singing he wanted to whistle.

Por Mi ne havas tempon por **ludi**.
I don’t have time for playing. (to play)

Oni bezonas horojn por **prepari** manĝon.
You need (one needs) hours to prepare a meal.

Mi iras al la butikoj por **aĉeti** terpomojn.
I’m going to the shops to buy potatoes.

Note: **Por** with an infinitive means *in order to*. As in the above examples, isn’t usually translated into English.

Sen Li foriris sen **diri** ion.
He left without saying anything.

Mi ne povas movi la tablon sen **fari** bruon.
I can’t move the table without making a noise.

The ending -us

4 The endings **-as**, **-is**, **-os** are used to express facts:

Mi estas viro.	<i>I am a man.</i>
Mi donis la monon al li.	<i>I gave the money to him.</i>
Ni atendos vin.	<i>We will wait for you.</i>

When we express a conjecture, however—a mere thought or flight of fancy—we use the one ending **-us**. The action or state is imaginary anyway, so time does not usually enter into it:

Ho, se mi nur est**us** riĉa!
Oh, if only I were rich!

Ho, se mi nur hav**us** la propran domon!
Oh, if only I had my own house! (for more about *nur*, see note 7.)

5 **-us** is used particularly in conditional sentences, i.e., where the fulfillment of an action or state is dependent on a supposed, imagined condition:

Se mi est**us** riĉa, mi loĝ**us** en domego.
If I were rich, I would live in a mansion.

Se vi lav**us** ĝin, ĝi est**us** pura.
If you washed it, it would be clean.

6 As in English, **-us** is also used as a polite form to express a wish or request, as if it were just a passing thought:

Mi vol**us** aĉeti tiun jupon!
I'd like to buy that skirt!

Ĉu mi pov**us** havi tason da teo?
Could I have a cup of tea?

Ĉu vi pov**us** prunti al mi du dolarojn?
Could you lend me two dollars?

Word order with *nur* and *ankaŭ*

7 The position of these two words makes a difference to the meaning of a sentence. Consider the statement:

Mi manĝas ovojn dimanĉon matene.
I eat eggs on Sunday morning.

If we put **nur** before each word in turn, we get five different meanings:

1. **Nur mi** manĝas ovojn dimanĉon matene.
Only I (and nobody else) eat eggs on Sunday morning.
2. **Mi nur manĝas** ovojn dimanĉon matene.
I only eat eggs (but don't cook them etc.) on Sunday morning.
3. **Mi manĝas nur ovojn** dimanĉon matene.
I eat only eggs (and nothing else) on Sunday morning.
4. **Mi manĝas ovojn nur dimanĉon** matene.
I eat eggs only on Sunday (and on no other) morning.
5. **Mi manĝas ovojn dimanĉon nur matene.**
I eat eggs on Sunday, but only in the morning.

The position of **ankaŭ** similarly affects the meaning:

Maria vidos Andreon morgaŭ matene.
Maria will see Andreo tomorrow morning.

1. **Ankaŭ Maria** vidos Andreon morgaŭ matene.
Maria, too, (as well as her father) will see Andreo tomorrow morning.

2. Maria **ankaŭ vidos** Andreon morgaŭ matene.
Maria will see (as well as hear) Andreo tomorrow morning.
3. Maria vidos **ankaŭ Andreon** morgaŭ matene.
Maria will see Andreo (along with others) tomorrow morning.
4. Maria vidos Andreon **ankaŭ morgaŭ** matene.
Maria will see Andrew tomorrow, too (as well as today) in the morning.
5. Maria vidos Andreon morgaŭ **ankaŭ matene**.
Maria will see Andrew tomorrow in the morning, too (as well as in the afternoon).

Praktiko 9.1: Traduku anglan:

Mi devas iri al la urbo hodiaŭ matene. Ĉu vi deziras aĉeti kolĉenon? Fermu la pordon, mi petas. Se mi havus aŭton, mi povus veturi pli rapide ol per biciklo. Dankon pro via letero. Mi ne havas tempon nun por respondi plene, sed mi baldaŭ povos tion fari. Anstataŭ labori en la ĝardeno, li sidas kaj legas. Tiu jupo estas tre bela, ĉu ne? Mi volus aĉeti ĝin, se mi havus la monon. Ankaŭ al mi ĝi plaĉas. Se mi estus riĉa, mi aĉetus tiom da aferoj! Jes se oni estus riĉa, oni povus aĉeti multajn aferojn sen pensi pri la kosto, ĉu ne?

Praktiko 9.2: Traduku esperanten:

Instead of beginning yesterday, he waited until today. I'll see you this afternoon (in order) to help you. If I were you, I would go without waiting for him. Besides learning Esperanto she is also learning French (*Careful! Where does ankaŭ go?*). Could you help me (to) carry this, please? If I had time I could walk (**piediri**) to your house. I only go to (the) church on Sundays (*i.e., not on other days*). I went to the cinema on Saturday, and Andreo came too. I like to go to a cinema when I am free.

Praktiko 9.3: Add **nur**, and then **ankaŭ**, in five different positions in the following sentence, and indicate the meaning of each, as shown in note 7:

Mi rigardos la gazeton hodiaŭ vespere.

Correlatives with *i-*

8 Correlatives starting with **ki-**, **ti-**, **ĉi-** and **neni-** can usually be expressed respectively as “what something”, “that something”, “every something” and “no something”. e.g., **kie** *what place (where)*, **tie** *that place (there)*, **ĉie** *every place (everywhere)*, **nenie** *no place (nowhere)*. Correlatives starting with **i-** are indefinite, and mean “some...” or “any...”, e.g., **ie** *somewhere, anywhere*, **ial** *for some reason*, **iom** *some quantity*.

Iel, mi perdis mian mansakon.

Somehow (in some way) I've lost my handbag.

Ĝi devas esti ie!

It must be somewhere!

Mi iam faros ĝin.

I'll do it sometime.

—and a favorite opening for a fairy tale:

Iam estis reĝo...

Once (upon a time) there was a king...

Affixes as independent words

9 Many of the prefixes and suffixes may be used as independent roots where sense permits, taking the appropriate ending. Here are the most important of those we have learned so far:

Li faris la malon .	<i>He did the opposite.</i>
Male , mi venos kun vi.	<i>On the contrary, I'll come with you.</i>
La ina intuicio.	<i>Feminine intuition.</i>
Mi vidis etan muson.	<i>I saw a tiny mouse.</i>
Li ege miris.	<i>He was greatly surprised.</i>
Mi estas ano .	<i>I am a member.</i>
Kie estas la ejo ?	<i>Where is the place?</i>
Tie estas la ujo .	<i>There is the container.</i>
Aro da birdoj.	<i>A flock of birds.</i>
La proksima ero estos...	<i>The next item will be...</i>
Li iris tien kaj reen .	<i>He went there and back.</i>
Inda je pli bona sorto.	<i>Worthy of a better fate.</i>
Mi ne indas tian honoron.	<i>I'm not worthy of such an honor.</i>
Tio ne estas ebla .	<i>That is not possible.</i>
Eble ni farus same.	<i>Possibly we would do the same.</i>

(The suffix **-ebl-** is used to denote possibility: like “-able”, “-ible”.)

10 Similarly, the use of the particles (i.e., words normally used without an ending — correlatives, prepositions, etc.) may also be enlarged by the use of an appropriate ending. In fact, many words can be derived in this way; here’s a small selection to give you some idea of the wealth of words latent in quite a small vocabulary:

ĉiam <i>always</i>	ĉiama <i>permanent, constant</i>
tiam <i>then</i>	tiama <i>of that time</i>
	tiamulo <i>a person of the time; a contemporary</i>
iam <i>some time</i>	iama <i>one-time (adj.)</i>
tie <i>there</i>	tiea <i>of that place, local</i>
	tieulo <i>a native of the place</i>
kial <i>why</i>	kialo <i>reason</i>

antaŭ <i>before</i>	antaŭa <i>previous</i>
	antaŭe <i>previously</i>
	antaŭulo <i>predecessor</i>
ĉirkaŭ <i>around, about</i>	ĉirkaŭi <i>to surround</i>
	ĉirkaŭaĵo <i>surroundings, environs</i>
ekster <i>outside</i>	ekstera <i>outer, external</i>
	eksteraĵo <i>outer part</i>
super <i>above</i>	supera <i>superior</i>
	superulo <i>a superior</i>
	nesuperebla <i>insuperable</i>
nun <i>now</i>	nuna <i>present, instant</i>
ne <i>no, not</i>	nei <i>to deny, say no to</i>
	nebla <i>impossible</i>
jes <i>yes</i>	jesi <i>to reply in the affirmative</i>

The suffix **-ind-** is used to denote worthiness, merit, deserving of something:

amas <i>loves</i>	aminda <i>loveable</i>
faras <i>does</i>	farinda <i>worth doing</i>
laŭdas <i>praises</i>	laŭdinda <i>praiseworthy</i>
miras <i>marvel,</i> <i>be surprised at</i>	mirinda <i>marvellous, wonderful,</i> <i>astonishing</i>
rimarkas <i>notice,</i> <i>remark, observe</i>	rimarkinda <i>remarkable,</i> <i>worth noticing</i>
vizitas <i>visits</i>	vizitinda <i>worth visiting</i>

Note: the English “-able/-ible” can mean either “worthy” (**-inda**) or “possible” (**-ebla**), depending where it appears. Be careful to choose the appropriate suffix when translating into Esperanto.

Correlatives with -es

11 **-es** words show *possession*: **Kies** *whose (what person's)*; **ties** *that one's (of that person)*; **ies** *someone's somebody's*; **ĉies** *everyone's*; **nenies** *no one's*.

Kies libro estas tiu?
Whose book is that?

Eble ĝi estas **ties**.
Perhaps it is that person's.

Jen **ies** biciklo.
There's someone's bike.

Esperanto estas **ĉies** propraĵo.
Esperanto is everyone's property.

Li estas **nenies** malamiko.
He is no one's enemy.

Note: **Kies** is not just a question word: **la lando, kies gastoj ni estas** = *the country whose guests we are*.

Ties is sometimes found with the meaning of “the latter’s”: **Johano renkontis Arturon kaj ties amikon** = *Johano met Arturo and the latter's friend*.

The past participle

12 **-ita** is the ending of the (passive) past participle. It is an adjective (note the **-a** ending!) formed from a verb, with the meaning “(having been) -ed”.

fermi *to close* fer**mita** *closed (having been closed)*

fari *to do, make* far**ita** *(having been) done, made*

miksi *to mix* mik**sita** *(having been) mixed*

Kiam mi alvenis, la pordo estis fer**mita**.
When I arrived, the door was closed.

Mi aĉetis skatolon de mik**sitaj** legomoj.
I bought a can of mixed vegetables.

Note 1: The participle, like other adjectives, must “agree” with its noun (hence: **miksita**j** legom**oj****).

Note 2: Never put **havi** before this type of participle. *I have closed the door* = **Mi fermis la pordon**. (See chapter 4, note 6.)

Teksto: Hejma Paĝo

En via kuirejo

Jen recepto por vi el Germanujo: Procedu jene:

Por ĉi tiu salato ne ekzistas sezono! Preparita el freŝaj legomoj, ĝi estas aparte delikata kaj valora, sed ankaŭ dum-vintre, farita el konservitaj legomoj, ĝi bongustas. Sola ĝi estas bela antaŭmanĝo; kun blanka pano aŭ rizo ĝi fariĝas leĝera tag- aŭ vespermanĝo.

Oni bezonas: 200g da kokidaĵo, 100g da kuirita ŝinko, 100g (aŭ malgrandan skatolon) da agarikoj, 750g da miksitaj freŝaj legomoj (aŭ en skatolo), 100g da majonezo, 1 sup-kuleron da acida aŭ dolĉa kremo, citronosukon, salon, pipron, petroselon, skatolon da artiŝokaj koroj.*

**gramojn*

La freŝajn legomojn (karotojn, pizojn, verdajn fazeolojn, florbrasikon, brokolon, ktp) purigu, lavu, pecetigu se necese kaj kuiru en salita akvo, ĝis ili estas preskaŭ molaj. Forverŝu la akvon kaj tenu por momento sub fluanta, malvarma akvo. Lasu malvarmiĝi.

La viandon, la ŝinkon kaj la fungojn tranĉu laŭplaĉe en kubetojn aŭ striojn. Maldensigu la majonezon per citronosuko kaj kremo. Spicu per salo kaj pipro kaj verŝu sur la preparitajn legomojn kaj viandon. Zorge miksu kaj metu en fridujon por unu horo.

Ornamu la pladon per malmolige kuiritaj ovotranĉaĵoj, artiŝoko-koroj kaj tomatotranĉaĵoj.

Se vi uzas konservitajn legomojn el skatolo, forverŝu la likvaĵon kaj metu la legomojn por kelkaj minutoj en freŝan akvon.

agariko *mushroom*
artiŝoko *artichoke*
brasiko *cabbage*
citrono *lemon*
citronsuko *lemon juice*
fazeoloj *beans*

florbrasiko *cauliflower*
majonezo *mayonnaise*
ovo *egg*
petroselo *parsley*
pipro *pepper*
pizoj *peas*
rizo *rice*
salto *salt*
supo *soup*
ŝinko *ham*



En ĉina kuirejo

Tradicia kuirado en Ĉinujo

Ĉinaj kuiristinoj, kies arto estas tre subtila, ankoraŭ obeas regulon, kiujn Konfucio proponis jam antaŭ 2 500 jaroj! Tio ŝajnas stranga; sed se ni loĝus en Ĉinujo, eble ni farus same kiel la tieuloj.

Oni manĝas ĉefe legomojn. Viando (porkaĵo, bovidaĵo, tre malofte ŝafaĵo) estas altekosta, do oni malmulte manĝas ĝin.

La Ĉinoj neniam *boligas* manĝaĵojn —ili rostas, stufas en tre malmulte¹ da akvo, kaj fritas (rapide, je alta temperaturo, kaj en iomete² da graso). Oni ŝanĝas la kuirmetodon laŭ la manĝaĵo—ekzemple, grasan porkaĵon oni stufas, sed malgrasan porkaĵon oni fritas.

Laŭ Konfucio, oni devas ĉiam *spici*

la manĝaĵojn. La celo de la spicado estas, forpreni malagrablajn odorojn (ekzemple *fiŝan* odoron) kaj emfazi la naturan guston de la manĝaĵo. Ofte oni bezonas horojn por prepari manĝon, sed nur kelkajn minutojn por manĝi ĝin.

Konsiletoj en la hejmo

Por forpreni³ globkrajonan inkon de vestoj, verŝu iom da⁴ lakto sur la makulon kaj leĝere, cirkle frotu per pura tolo. Poste lavu la veston.

Por forpreni sangon de naztuko, tuj metu la tukon en malvarman akvon. Se vi volas tuj lavi ĝin, agitu ĝin en la malvarma akvo ĝis la makuloj preskaŭ malaperis.

¹ **multe da** *a lot of*
malmulte da *a small quantity of.*

² **iomete da** *a little*

³ *“away-take”*; *remove*

⁴ **iom da** *some*

Por teni vin sana

1 Por la brusto kaj brakoj.



2 Por la trunko.




3 Por la brakoj, manoj, fingroj, kaj ventro.



Jen kelkaj korpaj ekzercoj por helpi ĉiun kiu deziras esti kaj resti sana.

4 Por la kolo kaj ŝultroj.



5 Por la spino, dorso kaj kruroj.



6 Por la piedoj, kruroj kaj dorso.



Kion vi farus, se vi ricevus \$50 000?

Ĉu vi aĉetus idealan domon? Ĉu vi vojaĝus ĉirkaŭ la mondo?

Ĉu vi dediĉus monon al la edukado de viaj infanoj?

Ĉu vi donus monon al persono, kies bezono estas pli granda ol la via?

Ĉu vi aĉetus belan pianon, aŭ luksan aŭton?

Ĉu vi helpus iun helpindan societon?

Sendu al ni viajn ideojn. Post du semajnoj, ni presos la plej interesajn el ili.

Praktiko 9.4: Traduku anglen:

Se mi ricevus kvindek mil dolarojn, mi aĉetus novan domon. Se Rikardo ricevus tiom da mono, li vojaĝus ĉirkaŭ la mondo. Kion vi farus? Ĉu vi dediĉus monon al la edukado de viaj infanoj, aŭ helpus iun helpindan societon? Klara deziras esti kaj resti sana. Ŝi faras korpajn ekzercojn ĉiutage. Mi perdis mian globkrajonon; ĝi devas esti ie, sed mi ne scias kie. Eble iu trovos ĝin kaj redonos ĝin al mi. Io nekutima okazis al mi hieraŭ. Ial, li forkuris. Kial la pordo estas fermita? La tasko estis jam farita. Anstataŭ fermi la pordon, li faris la malon. Tiu sinjoro estas ano de nia grupo. La arto de la ĉinaj kuiristinoj estas tre subtila. Antaŭ dumil kvincent jaroj, Konfucio proponis regulojn, kiujn oni ankoraŭ obeas. En Ĉinujo oni manĝas ĉefe legomojn, ĉar la viando estas multekosta. Ĉu vi preferas rostitan bovaĵon aŭ rostitan porkaĵon? Ĉu plaĉas al vi salato? Oni bezonas multe pli longan tempon por prepari manĝon ol por manĝi ĝin!

Praktiko 9.5: Traduku esperanten:

What would you do if you were rich? I hope (that) I would use my money wisely. Every day I do physical exercises in front of an open window. This salad is prepared from (out of) fresh vegetables. The vegetables must be carefully washed (one must...). Would you like (*use plaĉi*) a cup of tea? Can I go there and back in one day? That could be the reason. Can I do anything to help (**por helpi**)? That river flows very quickly. I hope (that) the children will behave well.

Praktiko 9.6: Respondu esperante:

Kio estas la celo de la korpaj ekzercoj sur la Hejma Paĝo? Por kiu sezono estas la salato en la recepto? Kion oni devas fari unue pri la freŝaj legomoj? En kia akvo oni devas kuiri ilin? Ĝis kiam oni kuiras ilin? Kion oni devas fari pri la likvaĵo, se oni uzas konservitajn legomojn el skatolo? En Ĉinujo, kiu proponis la regulojn, laŭ kiuj la kuiristinoj ankoraŭ kuiras? Kiam li proponis ilin? Kial oni manĝas ĉefe legomojn? Kial oni spicas la manĝaĵojn? Kiel la ĉinaj kuiristinoj kuiras grasan porkaĵon? Kiel ili kuiras malgrasan porkaĵon?

Dialogo: Interesaj vizitoj

Kelkajn tagon poste, dum la vespermanĝo, Klara kaj Rikardo Lang babilas kun franca paro, Martin kaj Chantal, kiuj dum la posttagmezo akompanis Andreon kaj Marian al la bestĝardeno en la Flèche.

Klara Nu, geamiko, ni kore dankas vin pro via afabla zorgo pri niaj infanoj. Mi esperas, ke ili kondukis bone.

Chantal Tute bone! Kaj ili tiom ĝuis la viziton al la bestĝardeno! Ĝi vere estas mirinda loko.

Rikardo Jes, mi supozis, ke tio plaĉos al ili.

Marteno Maria tre amis la elefanton, kiu estis tiel granda sed tiel milda. Andreo preferis la tigron, sed ili ambaŭ amis la ĉimpanzojn. Mi estas certa, ke ili ĉirkaŭiris la tutan lokon dufoje! Ili absolute ne deziris foriri (= iri for) de la bestoj.

Klara Nu, ĉar vi tiel afable kondukis ilin tien, ni estis liberaj viziti Angers, kiun ni longe volis vidi.

Rikardo Jes, la kastelo tie estas mirinda. Kia situo! Tridek metrojn alte sur tiu grandega roko! Kaj la vidaĵo de ĝi trans la riveron! Grandioza!

Klara Sed tio, kio plej plaĉis al mi, estis la grandiozaj tapetoj faritaj inter la 14-a kaj la 18-a jarcentoj. Kaj la plej mirinda el ĉiuj certe estis tiu de la Apokalipso! Ĝi estis farita en la dek-kvara jarcento, kaj konsistas el sepdek paneloj. Entute ĝi estas longa 150 metrojn, kaj alta preskaŭ kvin metrojn. Kiom da laboro por fari ĝin!

Marteno Jes, kaj mi vetus, ke post tiu vizito vi volis sidi kaj ripozi!

Klara Ho, miaj piedoj! Sed estas multaj belaj ĝardenoj en Angers, do ni ripozis en bela ĉirkaŭaĵo. Mi aŭdis, ke oni nomas Angers-on “la urbo de floroj”, kaj tio ja estas vera.

Rikardo Ni vizitis ankaŭ la Katedralon de Sankta Maŭrico, kiu estas de la 12-a kaj 13-a jarcentoj.

Klara Kaj la “Logis Barrault”, kie ni rigardis multajn skulptaĵojn kaj pentraĵojn de francaj artistoj de la 18-a jarcento.

Marteno Nu, ni nun diskutu la vesperon. Se vi ne kontraŭas, ke la infanoj restu tre malfrue el la litoj, mi volus sugesti, ke ni kvar, kaj viaj infanoj, iru al la Kastelo de Le Lude, kie nokte okazas unika spektaklo.

Chantal Per “Sono kaj Lumo” oni aŭdas kaj vidas la historion de la kastelo. Oni aŭdas muzikon kaj vidas eventojn, dancojn, ktp (= kaj tiel plu) laŭ la epoko.

Marteno Mi estas certa, ke ni ĉiuj multe ĝuos tion. Sed la spektaklo okazas inter la naŭa kaj tridek kaj la dek-unua kaj tridek. Ĉu vi estos kontentaj, se la infanoj estos ekster la litoj tiom malfrue?

Rikardo Hm, tio ja estas malfrua fino. Kion vi opinias, karulino?

Klara Nu, ĝi estas unika okazo, kaj certe interesos ilin. Mi kredas, ke ankaŭ ili ĝuos ĝin.

Chantal Mi estas certa pri tio.

Marteno Do, mi sugestas, ke ni veturu en nia aŭto, kiu havas spacon por ni ĉiuj. Sed jam estas la horo por ekveturi, se ni deziras havi bonajn sidlokojn! Ni iru!

Demandoj

1. Pro kio ges-roj Lang dankas la francajn geamikojn?
2. Kion ambaŭ infanoj amis en la zoologia ĝardeno?
3. Kion faris Rikardo kaj Klara dum la infanoj vizitis la zoologian ĝardenon?
4. Kio plej plaĉis al Klara en la urbo Angers?
5. Kion Klara kaj Rikardo rigardis en la “Logis Barrault”?
6. Kion sugestas Marteno pri la vespero?
7. Kio okazas nokte en la Kastelo de Le Lude?
8. Je kioma horo oni komencas la spektaklon tie?
9. Kaj kiomlonge ĝi daŭras?
10. Kial oni devas tuj ekveturi?

agiti to agitate, shake
agrabla pleasant
ambaŭ both
aperi to appear; **malaperi** to disappear
aŭskulti to listen (to)
babili to chat, chatter
bestĝardeno zoo
blanka white
boligi to boil (something)
brusto chest
dediĉi dedicate, set aside
densa dense, concentrated; **maldensigi** to dilute
dorso back
ekzerco exercise
ekveturi to set off
fariĝi to become
flui to flow; **fluanta** flowing
fridujo refrigerator, fridge
friti to fry
froti to rub
globkrajono ball point pen (lit. globe pencil)
grandioza grand, magnificent
graso fat
gusto taste; **bongusta** tasty
ja indeed
jene as follows
konduti to behave
konsilo advice; **konsileto** a hint
kontraŭi to oppose
korpo body
kruro leg
kuirist(in)o a cook
kulero spoon
lakto milk
laŭplaĉe to your liking
lavi to wash
legomo vegetable
leĝera light (not heavy), slight
likvaĵo liquid
lumo light (not dark)

makulo a stain
malvarmigi to cool
mano hand
meti to put
miksi to mix
mola soft
nazo nose; **naztuko** handkerchief
ornami adorn, decorate
paro pair, couple
pecetigi (pec-et-igi) to break, cut into small pieces
pentri to paint (picture); **penraĵo** a painting
piedo foot
plado dish
propra (one’s) own
dolaro dollar
recepto recipe
regulo rule, regulation
roko rock
salato salad
sezono season
sola alone
spaco space, room
spici to spice, season
strio strip, stripe
stufi to stew
subtila subtle
ŝanĝi to change (something)
ŝultro shoulder
tapeto tapestry
teni to hold, keep
tieulo a person of that place
tolo cloth, linen
tranĉi to cut (with knife);
tranĉaĵo slice
tuj immediately
unika unique
valora valuable
ventro belly, abdomen
verŝi to pour
vesto garment
zorga careful; **zorgi** to take care

Ĉapitro 10: La vivo de Einstein

The reflexive pronoun

1 Most transitive verbs show someone or something (the subject) performing an action on a different someone or something (the object):

<i>Subject</i>	<i>Verb</i>	<i>Object</i>
La knabo	trinkas	la lakton
<i>the boy</i>	<i>drinks</i>	<i>the milk</i>

With some verbs it is possible to apply the action to *oneself*: in such cases, we translate “myself”, “yourself/yourselves” and “ourselves” as “me” (**min**), “you” (**vin**) and “us” (**nin**):

Mi lavas **min**.
I wash myself.

Vi flatas **vin**.
You flatter yourself.

Ni amuzis **nin**.
We amused ourselves.

2 In the above cases, there’s no doubt who the object is. But there is a doubt with **li**, **ŝi**, **ĝi** and **ili**, however. For example, with **li lavas lin** = *he washes him*, we don’t know who “him” refers to.

This problem is solved by the special reflexive pronoun **si**, (or **sin**, when used as the object.) The words “himself”, “herself”, “itself” and “themselves” are all translated by **si(n)**:

Li vidis **sin**.
He saw himself.

Ŝi admiris **sin**.
She admired herself.

Ĝi lekis **sin**.
It licked itself.

Ili amuzis **sin**.
They amused themselves.

La viro diris **al si**.
The man said to himself.

La virino parolis **al si**.
The woman spoke to herself.

La hundo rigardis **al si**.
The dog looked at itself.

La infanoj legis **al si**.
The children read to themselves.

Note: When a verb is followed by “myself”, “yourself”, “himself”, etc. it is said to be used *reflexively*, because the action reflects back on the doer.

3 Sia

In chapter 4 (note 8) we saw that **-a** is added to the personal pronouns to translate “my”, “your”, “our” etc. The **-a** can also be added to the reflexive pronoun **si** to show that the object belongs to the subject. So **sia** is translated by “his”, “her”, “its” or “their” depending on the subject:

<i>Subject #1</i>	<i>Subject #2</i>
Li trinkis sian bieron kaj ŝi trinkis sian teon.	
<i>He drank his beer and she drank her tea.</i>	

The first **sian** = *his*, because it refers to **li**; and the second **sian** = *her*, because it refers to **ŝi**.

Therefore if we say **Li trinkis lian bieron**, this would mean he drank somebody *else's* beer, not his own.

Johano ne estis kontenta ĉar Georgo trinkis lian bieron.
Johano was not pleased because Georgo drank his (Johano's) beer.

George did the drinking, but it was not his own beer.

Subject 1 Subject 2
Li diras, ke **lia hundo** lavas **sian** vizaĝon.
He says that his dog is washing its face.

Here **sian** = *its*, because it refers to **lia hundo**.

Subject 1 Subject 2
Li vidis, ke **ili** finis **sian** laboron.
He saw that they had finished their work.

Here **sian** = *their*, because it refers to **ili**. Of course, if the noun is plural, **sia** must agree with it:

Ili legis **siajn** librojn.
They were reading their books.

Note: The main thing to remember is that **sia** may not be a subject itself; it may only refer back to it. For example, in the second example it would be incorrect to say **Li diris, ke sia hundo...**

Suffixes

4 **-ig-** express a *causing* or *bringing about* of an action or state. As an independent word, **igi** = *to cause*.

kompleta	<i>complete</i>	kompletigi	<i>to (cause to be) complete</i>
seka	<i>dry</i>	sekigi	<i>to (cause to be) dry</i>
pura	<i>clean</i>	purigi	<i>to clean, cleanse, purify</i>
klara	<i>clear</i>	klarigi	<i>to explain, clarify</i>
nigra	<i>black</i>	nigrigi	<i>to blacken (make black)</i>
ruĝa	<i>red</i>	ruĝigi	<i>to redden (make red)</i>
blanka	<i>white</i>	blankigi	<i>to whiten (make white)</i>
sana	<i>healthy</i>	sanigi	<i>to make well, heal</i>
kun	<i>with</i>	kunigi	<i>to connect, unite, join together</i>
sub	<i>under</i>	subigi	<i>to subdue, overwhelm</i>
nulo	<i>zero, null, naught</i>	nuligi	<i>to nullify, annul, cancel</i>

The suffix **-ig-** can be used to form transitive (causative) verbs from non-transitive verbs:

fali	<i>to fall</i>	faligi	<i>to fell (a tree, etc.), to drop</i>
kuŝi	<i>to lie</i>	kuŝigi	<i>to lay (something) down</i>
timi	<i>to fear</i>	timigi	<i>to frighten (cause to fear)</i>
daŭri	<i>to go on, endure</i>	daŭrigi	<i>to continue (cause to go on)</i>
iri	<i>to go</i>	irigi	<i>to propel (cause to go)</i>
miri	<i>to marvel, be amazed</i>	mirigi	<i>to astonish (cause to marvel)</i>
veni	<i>to come</i>	venigi	<i>to summon</i>

English sometimes uses the same verb for both intransitive and transitive senses, but in Esperanto we use **-ig-** for the latter:

boli	<i>to boil</i>	boligi	<i>to boil (cause to boil)</i>
droni	<i>to drown (perish)</i>	dronigi	<i>to drown (kill by drowning)</i>
bruli	<i>to burn (be on fire)</i>	bruligi	<i>to burn (set on fire)</i>
flosi	<i>to float</i>	flosigi	<i>to float (cause to float)</i>

Praktiko 10.1: Traduku anglen:

Tiu viro parolas al si. Mi lavas min antaŭ mia matenmanĝo. Mi vidis lin hieraŭ. Mi vidis min en la spegulo (*mirror*). Li ne flatis min, sed li flatis sin. La infanoj legis al si kiam mi vidis ilin. Andreo ne estas kontenta ĉar lia patro trinkis lian lakton. (*Careful: whose milk?*) La patrino ne sciis, ĉu Maria trinkas ŝian lakton, aŭ la sian. Sed Maria diris al ŝi, ke ŝi trinkas sian lakton. Tio kontentigis ŝian patrinon. Mi klarigis al mia frato, kiel mi faris la laboron. Mi faris ĝin tiel por faciligi ĝin. La knabo kuŝigis sin sur la lito. La knabinoj ludis per siaj ludiloj.

Praktiko 10.2: Traduku esperanten:

The teacher spoke to the class, but he did not amuse them. They amused themselves. Johano says that his friend is drinking his beer (i.e. the friend's own beer). Johano says that his friend is drinking his beer (i.e. Johano's beer). I saw that the children (had) finished their work. The child was playing with (**per**) red ink, and reddened his hands. He also reddened his clothes. Can you explain this to me? Have you cleaned the floor? Dry your clothes and then (**poste**) dress yourself.

Praktiko 10.3: Express each word with a verb ending in **-igi**. You may need to use an affix or preposition. A clue in brackets gives the meaning.

1. to cure (to make well again)
2. to improve (to make better)
3. to facilitate (to make easy)
4. to compel (to cause to have to; to make obligatory)
5. to diversify (to make diverse)
6. to equalize (to make equal)
7. to rejuvenate (to make young again)
8. to liberate (to cause to be free)
9. to necessitate (to make necessary)
10. to mail (to cause to be in the mail)

5 -ig- expresses a state that has come into being. As an independent word, **igi** = *to become*.

From adjectives:

evidenta	<i>evident</i>	evidenti igi	<i>to become evident</i>
malseka	<i>wet</i>	malseki igi	<i>to become (get) wet</i>
malpura	<i>dirty</i>	malpuri igi	<i>to become (get) dirty</i>
pala	<i>pale</i>	pali igi	<i>to grow (turn) pale</i>
plena	<i>full</i>	pleni igi	<i>to become full</i>

From nouns, prepositions, affixes and adverbs:

amiko	<i>friend</i>	amiki igi	<i>to become friends</i>
lumo	<i>light</i>	lumi igi	<i>to become (grow) light</i>
edzo	<i>husband</i>	edzi igi	<i>to marry (become a husband)</i>
edzino	<i>wife</i>	edzini igi	<i>to marry (become a wife)</i>
kun	<i>with</i>	kuni igi	<i>to unite, become joined</i>
ano	<i>a member</i>	ani igi	<i>to join (a society, etc.)</i>

From verbs:

sidi	<i>to sit</i>	sidi igi	<i>to become seated, sit down</i>
stari	<i>to stand</i>	stari igi	<i>to get on one's feet, stand up</i>

The suffix **-ig-** is often used to make transitive verbs intransitive: to show that an action is taking place without affecting anyone or anything other than the subject:

naski	<i>to bear, give birth to</i>	naski igi	<i>to be born</i>
eduki	<i>to educate (someone)</i>	eduki igi	<i>to be educated</i>
montri	<i>to show (something)</i>	montri igi	<i>to appear, be shown</i>
detru	<i>to destroy (something)</i>	detru igi	<i>to be destroyed</i>
komenci	<i>to begin (something)</i>	komenci igi	<i>to be started</i>
fini	<i>to finish (something)</i>	fini igi	<i>to come to an end</i>
renkonti	<i>to meet (someone)</i>	renkonti igi	<i>to come together</i>
trovi	<i>to find (something)</i>	trovi igi	<i>to be found</i>

6 The suffix **-ec-** is used to form abstract nouns expressing the quality or characteristic indicated in the root, like the English “-ness”, “-hood”, “-ship”:

bona <i>good</i>	boneco <i>goodness</i>
patrino <i>mother</i>	patrineco <i>motherhood</i>
amiko <i>friend</i>	amikeco <i>friendship</i>
juna <i>young</i>	juneco <i>youth, youthfulness</i>
relativa <i>relative</i>	relativeco <i>relativity</i>
granda <i>great, large</i>	grandeco <i>greatness, magnitude, size</i>
vera <i>true</i>	vereco <i>truth</i>
ebla <i>possible</i>	ebleco <i>possibility</i>
bonkora <i>kind</i>	bonkoreco <i>kindness</i>

7 **-ist-** is used to denote one who is occupied, either professionally or as a hobby, with the thing or matter named in the root:

tajpi <i>to type</i>	tajpisto <i>typist</i>
dento <i>tooth</i>	dentisto <i>dentist</i>
arto <i>art</i>	artista <i>artist</i>
instrui <i>to teach</i>	instruisto <i>teacher</i>
scienco <i>science</i>	sciencisto <i>scientist</i>
muziko <i>music</i>	muzikisto <i>musician</i>
labori <i>to work</i>	laboristo <i>worker</i>
plumbo <i>lead (metal)</i>	plumbisto <i>plumber</i>
ĵurnalo <i>newspaper</i>	ĵurnalisto <i>journalist</i>

8 **-ism-** denotes a doctrine, practice, or school of thought (like English “-ism”):

katoliko <i>a Catholic</i>	katolikismo <i>Catholicism</i>
kanibalo <i>cannibal</i>	kanibalismo <i>cannibalism</i>
angla <i>English</i>	anglismo <i>anglicism</i>
internacia <i>international</i>	internaciismo <i>internationalism</i>

Please

9 You already know how to use **mi petas** for **please**, but this is often not convenient at the beginning of a sentence. In this case, we use **Bonvolu** followed by an infinitive:

Bonvolu veni ĉi tien. *Please come here.*
Bonvolu helpi min. *Please help me.*

We also often use **Bonvolu** by itself when offering something to somebody, inviting somebody to sit down, etc. — i.e. where it’s obvious what you want the person to do.

Teksto: La vivo de Einstein

Revoluciisto de la scienco

La 14-a de Marto estas la datreveno¹ de granda homo. Je tiu ĉi tago, en la jaro 1879, naskiĝis **Albert Einstein**. Li edukiĝis en München kaj en Aarau. En frua juneco evidentiĝis lia genio pri matematiko. Lia onklo tre simple klarigis al li pri algebro: kaj la eta knabo, sen ia helpo, solvis tutan libron de algebraj problemoj. Li eniris² la universitaton de Zürich, kaj deziris fariĝi instruisto. Sed fakte, en 1902, li fariĝis teknika fakulo en la svisa patentejo.

En 1903 li edziĝis al slava fraŭlino: sed poste oni nuligis tiun

geedziĝon, kaj en 1916 li reedziĝis, al sia kuzino Else. Unu filino naskiĝis al ili.

La junulo kiu revoluciigis la sciencan mondon

Dum sia libera tempo li konstante studis la misteron de la universo, kaj doktoriĝis³ ĉe la universitato de Zürich. Fine, en la memorinda jaro 1905, li verkis plurajn gravegajn artikolojn. La ĉefa el ili estis tiel originala, ke eĉ grandaj sciencistoj ne povis kompreni ĝin. Nur en 1915 li kompletigis sian “Ĝeneralan Teorion pri Relativeco.”

La grandeco de tiu teorio konsistas en tio: ke ĝi radikale ŝanĝis niajn

konceptojn pri la leĝoj de la universo. Ni trovas, ke la principoj de Newton kaj de Eŭklid estas nur oportunaĵoj, kaj ne reprezentas la realan verecon! Ni devas, do, kvazaŭ rekomenci de la komenco: kaj longa laborado estas ankoraŭ necesa por plene esplori ĉiujn eblecojn⁴ de tia grandioza teorio.

Germanujo forpelis⁵ sian grandan filon

De 1914 ĝis 1933 Einstein laboris en sia patrolando Germanujo. La registaro⁶ de Hitler atakis lin ĉar li estis judo; do en 1933 li lasis Germanujon kaj elmigris, unue al Svislando, poste al Usono. Li loĝis en Princeton, kie li mortis je la 18-a de Aprilo, 1955.

Einstein: humila, simpla homo

Krom sciencisto, Einstein estis ankaŭ bona muzikisto, per piano kaj violono. Li havis, cetere, profundan religian senton. Persone, li estis homo simpla kaj humila, de granda bonkoreco.⁷ Ĉiuj homoj ne nur respektis, sed amis lin. Li diris, ke se li povus revivi

sian vivon, li preferus esti simpla laboristo, ekzemple plumbisto. Politike, li estis socialisto kaj pacifisto, kiu abomenis militon. Dum la lastaj jaroj li malgajiĝis,⁸ ĉar li timis, ke liaj propraj eltrovoj⁹ kondukis al situacio, en kiu la homoj povas detrui sin per atombomboj. Ĵurnalista iam demandis al Einstein: “Ĉu vi povas antaŭdiri,¹⁰ kiajn armilojn oni uzos en tria mondmilito?” Li respondis: “Ne; sed mi ja povas antaŭdiri, kiajn armilojn oni uzos en *kvara* mondmilito—rokojn kaj bastonojn!”

1 “*return-of-the-date*”: *birthday, anniversary*

2. “*went-in*”, *entered*.

3. “*became-a-doctor*”: *graduated*.

4. **ebla + eco**: “*possibility*”

5. **for-pelis**: *drove away*

6. “*group of rulers*”: *government*.

7. “*good-heartedness*”: *kindness*.

8. **mal-gaj-iĝ-is**: *became sad*.

9. **el-trovo**: *finding out, discovery*.

10. **antaŭ-diri**: “*before-say*”, *foretell*

Praktiko 10.4: Traduku anglen:

Kion vi diris al vi? Ili lavas sin ĉiumatene, ĉu ne? Einstein estis la plej fama matematikisto. Lia genio pri matematiko evidentiĝis en frua juneco. Li estis ankaŭ bona pianisto kaj violonisto, ĉu ne? Eble ie, iam, estos eĉ pli mirinda matematikisto, kies nomon ni ankoraŭ ne scias. Ĉu vi opinias, ke la homaro detruos sin per atombomboj? Einstein timis, ke tio povus okazi. Neniu povas scii ĉion, sed ĉiu povas lerni, kaj tiel scii pli ol antaŭe. Bonvolu daŭrigi vian laboron. La kato iris en la ĝardenon kaj timigis la birdojn. Hieraŭ mi forigis grandan amason da paperoj de mia skribotablo, kaj bruligis ilin ĉiujn.

Praktiko 10.5: Traduku esperanten:

Maria is reading her book. The children love their lessons, don't they? The sun soon dried the clothes. You must always clean your teeth. He completed his task yesterday morning, didn't he? Have you boiled the water? Then please make the tea. I went out in(to) the rain, and got wet. My brother was married in March, and my sister will be married in September. Johano and Maria were married in June. I am a member of the society, and my friend will join tomorrow. When was he born?

Praktiko 10.6: Vera aŭ malvera?

1. Einstein naskiĝis en Majo, 1879.
2. Kiel eta knabo li senhelpe solvis tutan libron de algebraj problemoj.
3. Li eniris la Universitaton de Zŭrich por fariĝi instruistino.
4. Li edziĝis dufoje, sed havis nur unu infanon.
5. Li verkis plurajn gravegajn artikolojn tri jarojn post sia unua edziĝo.
6. La “Ĝenerala Teorio pri Relativeco” ŝanĝis niajn konceptojn pri la leĝoj de la universo.
7. Einstein laboris en Germanujo ĝis 1939.
8. Li estis tre religia homo.

9. Li ludis nenian muzikan instrumenton.

10. Li mortis en Svislando en 1955.

Dialogo: Amikoj kaj najbaroj

Hejme denove, Rikardo ka Klara babilas vespere, post la enlitiĝo de la infanoj.

Rikardo Ha, estas agrable esti en la propra hejmo denove, kvankam mi tre ĝuis nian restadon en la Kulturdomo!

Klara Jes! Almenaŭ estas pli trankvile ĉi tie, aparte kiam la infanoj jam enlitiĝis.

Rikardo Nu, mi kredas, ke ili ambaŭ tre ĝuis siajn feriojn; ĉu vi ne konsentas?

Klara Jes, ja! Cetere, la ferioj faris al ili multe da bono. La restado en Grezijono kutimigis ilin al la kunesto de alilandanoj, kaj komprenigis ilin, ke ni ĉiuj estas similaj.

Rikardo Vere, la amikeco de homoj el diversaj landoj ĉiam devas esti bona. Multaj internaciaj amikecoj devis jam komenciĝi en la Kulturdomo!

Klara Ni devos instigi ilin skribi al siaj novaj geamikoj, por ke ili daŭrigu la amikecon.

Rikardo Kaj, cetere, ankaŭ ni devos skribi al la niaj!

Klara Ne *ni*, karulo; *vi*!

Rikardo Ho! Kial mi? Ni ambaŭ amikiĝis kun ili!

Klara (*kaŝole*) Sed estas vi, kiu ĉiam faras la korespondadon. Vi faras ĝin multe pli bone ol mi!

Rikardo Flatado, flatado! Do, mi faros ĝin, sed vi devos skribi al Chantal, kiu donis al vi tiun belan kolĉenon kiel memorigilon.

Klara Ho, nu, se vi insistas...!

(Du tagojn poste. Rikardo hejmenvenas de kunveno de la Esperanto-Grupo.)

Klara Saluton, kara! Ĉu vi ĝuis la kunvenon!

Rikardo Jes, ĝi estis tre interesa. Sed divenu, kio okazis!

Klara Kiel mi povas diveni? Ne atendigu min; diru!

Rikardo Ili deziras, ke mi faru paroladon al la grupo pri niaj ferioj. Imagu, fari paroladon! Mi!

Klara Vi ne timas, ĉu?

Rikardo Mi timegas! Mi neniam antaŭe faris publikan paroladon!

Klara Ho, ne troigu! La Esperantogrupo apenaŭ estas la publiko! Pensu nur! Vi estas inter geamikoj. Vi konas ilin ĉiujn, kaj ili konas vin. Simple imagu, ke vi parolas al unu aŭ du el ili, kaj parolu kiel vi parolis al Marteno kaj Chantal.

Rikardo Hm, ni vidos.

Klara Dum vi ĉeestis vian kunvenon, iu vizitis min.

Rikardo Ho, kiu?

Klara Nia najbarino, s-ino Smith. Ŝi volas demandi nin pri niaj ferioj. Vi memoras, ke ili vizitis Francujon ĉi-jare, sed ili estis kun angle-parolanta turisma grupo, kaj ŝi diris, ke ne necesis al ili paroli france.

Rikardo Supozeble ili neniam parolis kun franco aŭ francino!

Klara Nu, ŝi konfesis, ke iun tagon ŝi promenis kun sia edzo, kaj

ili vojeraris. Ŝi diris, ke ili devis alparoli kelkajn homojn antaŭ ol ili trovis iun kiu parolis angle!

Rikardo Mi supozas, ke post tio ili ne volis promeni sen aliaj membroj de la grupo.

Klara Pri tio ŝi nenion diris. Sed ŝi volis scii, ĉu ni vere parolis Esperanton la tutan tempon dum ni estis tie, kaj ŝi tre miris kiam mi diris, ke en Grezijono ni parolis Esperantlingve kun homoj el almenaŭ ses landoj, kaj komprenis unu la alian perfekte!

Rikardo Ĉu vi sugestis, ke ili lernu Esperanton?

Klara Ankoraŭ ne. Kiel diras la proverbo: “Kiu tro pelas, nur malakcelas.”

Rikardo Aŭ eĉ pli mallonga proverbo: “Rapidu malrapide”!

Klara Ĝuste!

Demandoj

1. Kiom el la familio ĝuis siajn feriojn?
2. Kiel la ferioj faris bonon al la infanoj?
3. Kion la gepatroj instigos la infanojn fari?
4. Kial Rikardo devos skribi al la geamikoj de la gepatroj?
5. Kial Klara devos skribi al Chantal?
6. Kio okazis al Rikardo en la kunveno de la Esperantogrupo?
7. Kial li timas?
8. Kio okazis al ges-roj Smith kiam ili promenis sole en Francujo?
9. Kion s-ino Smith demandis al Klara?
10. Kio mirigis ŝin?

abomeni to abhor, loathe
akceli to accelerate; **malakceli** to slow down, decelerate
almenaŭ at least
alparoli to address, speak to
aparte especially
apenaŭ hardly, scarcely
armiloj arms, weapons
atombombo atom bomb
bastono stick
cetere besides, moreover
ĉu? are you? is it? etc.
detru to destroy
diveni to guess
enlitiĝi to go to/get into bed
esplori to investigate, explore
fako compartment, department, specialization; **fakulo** specialist
fariĝi to become
flatado flattery
fraŭlino unmarried girl or woman, Miss
ĝuste exactly, precisely
humila humble
imagi to imagine
instigi to prompt, spur, urge
judo a Jew
kajole coaxingly
krom besides, apart from
kunesto “being-with”: company
kutimigi to accustom
kuzo cousin
leĝo law
memorigilo memento, souvenir
milito war
mistero mystery

najbaro neighbor
naski to give birth to; **naskiĝi** to be born
onklo uncle; **onklino** aunt
oportuna convenient; **oportunaĵoj** things of convenience
pele to drive
perfekta perfect
politiko politics; **politika** political
profunda deep, profound
regi to rule, govern, control; **registaro** government
religio religion; **religia** religious
restado a stay
revivi to re-live
revolucio revolution (political)
supozeble presumably
timi to fear, be afraid
trankvila calm, tranquil
troigi to exaggerate
turismo tourism
verki to compose, write (original work)
violono violin (*note spelling*)
voj-erari to lose one’s way

Esprimoj:

angle-parolanta English-speaking
antaŭ ol before (when followed by an action)
ĉi-jare this year
devis jam must have already
iun tagon one day
pensu nur! just think!
por ke in order that
unu la alian one another, each other

Ĉapitro 11: Kelkaj reklamoj

Active participles

1 We have seen how a noun can be made into an adjective by simply changing the ending **-o** to **-a**:

floro *a flower* flora *floral*

But if we want to give some idea of action to the simple describing word, we use the fuller ending **-anta**:

floranta *flowering, flourishing*

Floranta is the *active present participle* of the verb **flori** (*to flower, flourish*). It is active and present because it describes what something is doing at the present time.

Note that it still remains an adjective describing a noun, although it differs from an ordinary adjective in that it also suggests action.

The *active past participle* has the ending **-inta**, which means “having done (in the past)” the action indicated in the root:

ferminta *having closed*

You should notice the difference between this *active* past participle and the *passive* past participle which you met in chapter 9, note 12:

ferminta *having closed* fermita *having been closed*

(You will meet the rest of the passive participles in chapter 13.)

Now compare the meanings of these present and past active participles:

falanta <i>falling</i>	falinta <i>fallen</i>
fluganta <i>flying</i>	fluginta <i>flown</i>
kreskanta <i>growing</i>	kreskinta <i>grown</i>
mortanta <i>dying</i>	mortinta <i>dead</i>
pasanta <i>passing</i>	pasinta <i>passed, past</i>
pendanta <i>hanging</i>	pendinta <i>hung, hanged</i>

Mi vidis falantan arbon. *I saw a falling tree.*

Li sidis sur falinta arbo. *He sat on a fallen tree.*

Mi vidis mortantan muson. *I saw a dying mouse.*

Ŝi trovis mortintan muson. *She found a dead mouse.*

Rapide pasantaj tagoj *Quickly passing days*

Ne parolu pri pasintaj jaroj. *Do not speak of past years.*

Note: Like adjectives, the participles take **-n** and/or **-j** when required.

The perfect tenses

2 In order to emphasize that an action is finished and complete, we use in English the past participle with “have/has/had” to show the time. In Esperanto, we also use the past participle, but we use **estas/estis/estos** to show the time. These “compound” tenses (formed with the verb **esti** and a participle ending in **-inta**) are called *perfect* tenses, as follows:

The present perfect tense:

mi estas falinta	<i>I have fallen</i>
vi estas falinta	<i>you have fallen</i>
li estas falinta	<i>he has fallen</i>
ŝi estas falinta	<i>she has fallen</i>
ĝi estas falinta	<i>it has fallen</i>

ni estas falinta	<i>we have fallen</i>
vi estas falintaj	<i>you (plural) have fallen</i>
ili estas falintaj	<i>they have fallen</i>

This tense is rarely used, except for emphasis. Usually the simple past tense **-is** is used.

The past perfect (pluperfect) tense:

mi estis falinta	<i>I had fallen</i>
vi estis falinta	<i>you had fallen</i>
li estis falinta	<i>he had fallen</i>
ŝi estis falinta	<i>she had fallen</i>
ĝi estis falinta	<i>it had fallen</i>
ni estis falintaj	<i>we had fallen</i>
vi estis falintaj	<i>you (plural) had fallen</i>
ili estis falintaj	<i>they had fallen</i>

The future perfect tense:

mi estos falinta	<i>I will have fallen</i>
vi estos falinta	<i>you will have fallen</i>
li estos falinta	<i>he will have fallen</i>
ŝi estos falinta	<i>she will have fallen</i>
ĝi estos falinta	<i>it will have fallen</i>
ni estos falintaj	<i>we will have fallen</i>
vi estos falintaj	<i>you (plural) will have fallen</i>
ili estos falintaj	<i>they will have fallen</i>

Note 1: In such sentences, “have” is never translated by **havi**, which means “to have” in the sense of “to possess”.

Mi estas falinta = lit. *I am having-fallen: I have fallen.*

Note 2: The participle, like an adjective, takes **-j** if the subject is plural (**ni estas falintaj**).

3 -onta

There is also a third participle in Esperanto, not found in English. This is used to describe an action which has not yet started, but is on the point of starting. It gives the idea of “about to” or “going to”:


La viro **irona** en la domon estas mia edzo.
The man about to go into the house is my husband.

La arbo estis **falonta**.
The tree was about to fall.

La fantomo estas **aperonta**.
The ghost is about to appear.

Mi iros en la **venonta** vintro.
I'll go in the coming winter (about-to-come winter).


Estonta tempo.
Future time (about-to-be time).



La viro estas
falonta



La viro estas
falanta



La viro estas
falinta

Praktiko 11.1: Traduku anglen:

Mi vidis la kurantan knabon. La maljuna viro sidis kaj rigardis la pasantajn homojn. La knabino rigardis la falintan arbon. La politikisto alparolis la ĉeestantajn homojn. La enlitiĝantaj infanoj diris “bonan

nokton” al siaj gepatroj. La viroj foriris de la falonta arbo. Mi esperas, ke la vetero estas varmiĝonta. Mi estis aŭdinta la novaĵojn. Je la dua horo Andreo estos fininta sian tagmanĝon. Mi estas lerninta multon el ĉi tiu libro. Ili estis ĝuintaj la feriojn. Maria estas kreskinta multe dum la jaro. Kiam vi venos, mi estos preparinta la tagmanĝon. Miaj gepatroj estis vizitintaj min la antaŭan tagon.

Praktiko 11.2: Traduku esperanten: (use compound verbs where possible)

I have bought a new jacket. At three o'clock he will have finished the task. At half past seven I was about to pack my clothes. I had long (**longe**) admired that writer (**verk-**). I was going to inform him about that, but I forgot. She will have decided that before tomorrow. I had announced it when he came in. The show is going to last two hours.

Praktiko 11.3: Make all nine possible combinations from the following table, and translate each into English:

	is	inta
Ŝi	estas	ludanta
	os	onta

Participle-nouns

4 The participles can take the ending **-o** in place of **-a**. These nouns indicate a person performing the action (like English “-er” , “-or”):

ami <i>to love</i>	amanto <i>lover</i>
detruji <i>to destroy</i>	detruanto <i>destroyer</i>
helpi <i>to help</i>	helpanto <i>helper</i>
komenci <i>to begin</i>	komencanto <i>beginner</i>
krei <i>to create</i>	kreanto <i>creator</i>

legi <i>to read</i>	leganto <i>reader</i>
loĝi <i>to live, dwell</i>	loĝanto <i>dweller, inhabitant</i>
protekti <i>to protect</i>	protektanto <i>protector</i>
okupi <i>to occupy</i>	okupanto <i>occupier, occupant</i>
venki <i>to conquer</i>	venkanto <i>conqueror, victor</i>
vendi <i>to sell</i>	vendanto <i>seller, vendor</i>

(This is how Esperanto got its name! Dr. Zamenhof, to avoid “tying” the language to himself, adopted the pseudonym “Doktoro Esperanto” from the verb **esperi** = *to hope*.)

Note also that the past and future participles can take the ending **-o**:

posedi <i>to possess</i>	posedinto <i>one who has possessed, ex-owner</i>
korespondi <i>to correspond</i>	korespondinto <i>one who has corresponded, ex-correspondent</i>
konduki <i>to conduct</i>	kondukonto <i>one who is going to conduct, conductor</i>
vojaĝi <i>to travel</i>	vojaĝonto <i>one who is going to travel</i>

Comparison

5 Ju... des...

The expression “the (more/less)... the (more/less)”, used in the comparison between two acts or states, is translated by **ju (pli/malpli)... des (pli/malpli)**:

Ju pli vi rigardos ĝin, **des pli** vi ŝatos ĝin.
The more you look at it, the more you will like it.

Ju pli rapide, **des pli** bone.
The quicker, the better.

Ju pli mi legas ĝin, **des malpli** mi komprenas ĝin.
The more I read it, the less I understand it.

Ju malpli mi laboras, **des malpli** mi volas labori.
The less I work, the less I want to work.

Occasionally **des pli** is used by itself, in the sense of “all the more”, “so much the more”:

Mi kuris **des pli** rapide.
I ran all the quicker.

Des pli bone.
So much the better.

Any, -ever

6 The word **ajn** is used to give a generalizing sense to the expression. Placed after a correlative beginning with **k-**, it corresponds to the English “-ever”:

kiu ajn <i>whoever, whichever</i>	kie ajn <i>wherever</i>
kio ajn <i>whatever</i>	kiam ajn <i>whenever</i>
kia ajn <i>whatever kind of</i>	kiom ajn <i>however much</i>

Li atendu, kiu **ajn** li estas.
Let him wait, whoever he is.

Kion **ajn** vi trovas, vi rajtas reteni.
Whatever you find, you may keep.

Mi iros, kia **ajn** estos la vetero.
I'll go, whatever the weather is like.

Li sidas, kie **ajn** li volas.
He sits wherever he wants.

Kiam **ajn** li venos, li estos bonvena.
Whenever he comes, he will be welcome.

When **ajn** is used with a correlative beginning with **i-**, it is usually translated by *any* (*at all, whatever*):

iu ajn <i>any(one)</i>	ie ajn <i>anywhere</i>
io ajn <i>anything</i>	iam ajn <i>any time</i>
ia ajn <i>any kind of</i>	iom ajn <i>any amount</i>

Mi ne konis iun **ajn** en la ĉambro.
I didn't know anyone (at all) in the room.

Donu al mi ion **ajn** por trinki.
Give me anything (at all) to drink.

Mi estas preta iri en ia **ajn** vetero.
I'm read to go in any kind of weather.

Li povas dormi ie **ajn**.
He can sleep anywhere.

Suffix/prefix

7 The suffix **-il-** is used to denote an *instrument* by which the action expressed by the “root” is carried out:


tranĉi <i>to cut</i>	tranĉilo <i>knife</i>
ŝlosi <i>to lock</i>	ŝlosilo <i>key</i>
kombi <i>to comb</i>	kombilo <i>a comb</i>
boligas <i>boils (something)</i>	boligilo <i>boiler, kettle</i>
kuri <i>to cook</i>	kuirilo <i>cooking utensil</i>
flugi <i>to fly</i>	flugilo <i>wing</i>
aviado <i>aviation</i>	aviadilo <i>aircraft, plane</i>

8 The prefix **ek-** is used to denote the beginning of an action, or to show that the action is just momentary:

vidi <i>to see</i>	ekvidi <i>to catch sight of</i>
iri <i>to go</i>	ekiri <i>to set off, start</i>
dormi <i>to sleep</i>	ekdormi <i>to fall asleep</i>
bruli <i>to burn, be on fire</i>	ekbruli <i>to catch fire</i>
posedi <i>to possess</i>	ekposedi <i>to take possession of</i>
flugi <i>to fly</i>	ekflugi <i>to take flight</i>
brili <i>to shine</i>	ekbrili <i>to flash</i>
rigardi <i>to look (at)</i>	ekrigardi <i>to glance (at)</i>
scii <i>to know</i>	ekscii <i>to find out</i>

Teksto: Kelkaj reklamoj

Komercistoj, turistoj, kaj ĉiuj vojaĝontoj!



Uzu aviadil-servojn "FULMO"! Per niaj "flugantaj busoj", kiuj ekflugas je ĉiu horo, vi atingos iun ajn parton de la mondo, plej rapide kaj komforte, je minimuma kosto.

Kun plezuro ni aranĝos ankaŭ vian eksterlandan ferion en la venonta somero. Ni garantias, ke ĉiu el niaj multaj vojaĝoplanoj nepre plaĉos al vi!

AVIADILSERVOJ FULMO—LONDONO

NOVAJ GEEDZOJ!

Baldaŭ vi ekposedos vian hejmon, kaj estas aĉetontaj meblaron. Pripensu tion: Ĝi estas akompanonta vin dum multaj jaroj! Do: ne oferu la avantaĝojn de longa spertado por ŝpariom da mono. Niaj spertegaj laboristoj konas nur **unu** kvaliton: la PLEJ BONAN! Ju pli vi rigardos iun ajn meblon el nia fabriko, des pli vi ŝatos ĝin.

Ni invitas vin kontroli tion per la propraj okuloj—vizitu nian magazenon!

MEBLISTOJ "IDEALHEJMO", BRISTOL



Eleganta meblaro por la manĝoĉambro kun 3 seĝoj kaj 1 brakseĝo

SPORTISTOJ!

Kiuj Sportoj Interesas Vin?

Ĉu teniso? biciklado? naĝado? subakva naĝado? akvoskiado? velado? montgrimpado? skiado? rajdado?

Kian ajn sporton vi preferas, ne aĉetu viajn novajn vestojn aŭ ekipaĵon sen konsulti nin!

Ni havas ampleksan stokon de vestoj kaj ekipaĵo por ĉiuj el ili.

VI NOMU ĜIN—NI HAVAS ĜIN!



"SPORTEKIPO": LONDONO MANĈESTRO EDINBURGO

ELEKTRO





via silenta

HELPANTO

Ĉiu bezonas elektron en la hejmo. Sed ĉu vi jam ekspluatas ĉiujn ĝiajn eblecojn? Ni havas grandajn stokojn de ĉiaj elektraj aparatoj je malaltaj prezoj!

boligiloj
gladiloj
kuirfornoj
fridujoj
frostigiloj
harar-sekigiloj
komputiloj
lavmaŝinoj
magnetofonoj
manĝilarlaviloj
mikro-ondaj bakujoj
miksiloj
panrostiloj
polvosuĉiloj
radiofonoj
raziloj
sekigiloj (agitaj kaj centrifugaj)
stereo-aŭdigiloj
televidiloj
varmigiloj ĉiuspecaj
vidbendaparatoj

Nia komerco estas kreskinta el unu simpla butiko; ni nun havas 128 butikojn tra la tuta lando. Ni staros ĉiam je via servo en venontaj jaroj, kiel en la pasintaj



BRITA ELEKTRA KOMPANIO

Praktiko 11.4: Traduku anglen:

Per niaj “flugantaj busoj” vi atingos iun ajn parton de la mondo. Ni aranĝos viajn eksterlandajn feriojn en la venonta somero. Ĉu vi estas aĉetonta meblaron? Ju pli vi rigardos iun ajn meblon el nia fabriko, des pli vi ŝatos ĝin. Ĉu vi havas elektran gladilon? Ĉu vi havas elektran lavmaŝinon? En kiu ĉambro troviĝas via kuirforno? Ĉu via kuirforno estas elektra? Nia komerco estas kreskinta el unu simpla butiko. Ni staros ĉiam je via servo en venontaj jaroj, kiel en la pasintaj. Ju pli vi uzos niajn servojn, des pli da mono vi ŝparos. Ju pli rapide vi veturos, des pli bone. Baldaŭ ni ekposedos novan domon. Ni ekiris frue por atingi la butikon.

Praktiko 11.5: Traduku esperanten:

The plane has flown northwards. Our business is growing very quickly. It has grown from a small shop. We are at your service as in past years. I have seen your store. We had already bought our furniture. He was about to travel to Germany. She set off early. What will you do in the coming winter? The more I look at it, the less I like it. Where is the key? Do you have (possess) a knife? I don't have a comb. He passed in front of the woman without a glance.

Praktiko 11.6: Complete the following sentences by filling in the missing endings. Endings can be one, two or three letters, but there is only one correct ending in each case:

1. Hieraŭ ni ekvetur— al Italujo por ni— ferioj.
2. Mi vizitis butik— por aĉet— jup—, sed vid— bel— rob— kiu tre plaĉ— al mi.
3. Help— mi—, mi petas. Bonvol— ne forir—!

4. Kiam mi iris en la kuirej— mi vid— mi— du fratini— .

5. Rigardu ti— falint— arb— !

Dialogo: Venontjaraj ferioj

Klara kaj Rikardo vespermanĝas.

Klara Hodiaŭ matene venis letero de Chantal kaj Marteno. Jen ĝi.

Rikardo Mi legos ĝin kiam mi estos fininta la vespermanĝon. Ĉu ĝi enhavas ion aparte interesan?

Klara Nu, ĝi konsistas ĉefe el rakonto pri iliaj agadoj, sed ĉe la fino ili diras, ke venontjare ili iros al la Universala Kongreso de Esperanto, en Belurbo.¹ Ili demandas, ĉu ni intencas partopreni en ĝi.

Rikardo Mi tute ne pensis pri ĝi! Kion vi opinias?

Klara Mi vere bezonas scii pli pri ĝi. Mi scias, ke tiuj kongresoj okazas ĉiujare en diversaj landoj, kaj ke kelkaj miloj da homoj partoprenas en ili.

Rikardo Kaj mi memoras, ke iam, kiam oni menciis ĝin en la Esperantogrupo, oni diris, ke kutime estas partoprenantoj el pli ol kvardek landoj.

Klara Sed ne allogas min la ideo pasigi plurajn tagojn en enuigaj kunvenoj. Tio ne estas mia ideo pri feriado!

Rikardo Ho, sed la kongresoj ne konsistas nur el kunvenoj. Kompreneble, ja okazas kunvenoj, de homoj kun similaj intereso; ekzemple, sciencistoj, anoj de diversaj religiaj kredoj, instruistoj, fervojistoj, kaj multaj aliaj. Sed estas ankaŭ sociaj eventoj, teatraĵoj, kaj tiel plu.

Klara Nu, tio ŝajnas pli interesa... se ni povas toleri la elspezon! Sed... ĉu tio vere estus taŭga feriado por la infanoj?

Rikardo Mi iom dubas pri tio. Sed hodiaŭ la Esperanto-grupo kunvenos, kaj estos via vico iri, dum mi prizorgas la infanojn. Do, vi povos demandi, kaj eble ricevos ankaŭ multajn aliajn informojn.² Ju pli ni ekscios, des pli bone!

Klara Jes, mi demandos pri la tuta afero.

(Pli malfrue en la vespero)

Rikardo Nu, ĉu vi ricevis la necesajn informojn pri la kongresoj?

Klara Jes, mi eksciis multon pri ili.

Rikardo Kaj kion pri la infanoj? Se la kongreso ne taŭgas por ili, ni malŝparas tempon diskuti ĝin!

Klara La kongreso mem ne taŭgos por ili, sed ĉiujare, okazas je la sama tempo tiel-nomata Infana Kongreseto, en iu loko ne tro malproksima de la Universala Kongreso. Tiel, kongresanoj, kies infanoj komprenas Esperanton, scias, ke oni bone prizorgas ilin.

Rikardo Bonŝance, niaj infanoj jam bone komprenas ĝin. Sed mi scivolos, kiel ili pasigos la tempon.

Klara Johano Danby diris al mi, ke la kongresetoj kutime okazas en la kamparo aŭ ĉe la marbordo, kaj la infanoj dividiĝas en malgrandajn grupojn, ĉiu kun sia plenkreska gvidanto. Oni organizas ludojn, promenojn, ekskursojn, kaj tiel plu.

Rikardo Kiel oni dividas ilin? Ĉu en naciajn grupojn?

Klara Male, ĉiu grupo konsistas, laŭeble, el infanoj el diversaj landoj, tiel, ke ili devas paroli Esperanton.

Rikardo Kia bona ideo! Kaj ĉu vi eksciis ion pli pri la Universala Kongreso mem? Ekzemple, kiomlonge ĝi daŭras?

Klara La kongreso daŭras unu semajnon, sed tiuj, kiuj deziras ferii dum du semajnoj, povas aniĝi ankaŭ al “antaŭkongreso” aŭ “postkongreso”, kiu estas feria semajno okazanta, kiel la nomo indikas, antaŭ aŭ post la kongreso.

Rikardo Nu, tio dependos de la kosto, ĉu ne? Kaj ni volos ekscii, ĉu Marteno kaj Chantal intencas partopreni en ambaŭ aferoj.

1 **Belurbo**—a fictitious town

2 **Informo** is really a piece of information, hence the plural in this case.

Demandoj

1. Kial Rikardo ne tuj legas la leteron?
2. Kion demandas Chantal kaj Marteno en la letero?
3. Kiam kaj kie okazas la Universalaj Kongresoj de Esperanto?
4. Ĉu ili konsistas nur el kunvenoj?
5. Pri kio Klara kaj Rikardo dubas?
6. Kial Klara kaj Rikardo ne iras kune al la Esperantogrupoj?
7. En kio la infanoj povas partopreni?
8. Kie la Infanaj Kongresetoj kutime okazas?
9. Kiel la infanoj dividiĝas?
10. Ĉu oni organizas ilin en naciajn grupojn?

agado action, activity

agita sekigilo tumble-dryer

ampleksa extensive

atingi to attain, reach

bakujo oven

boli boil (*intrans.*); **boligi** to boil (something); **boligilo** kettle

bonŝanca lucky

bruna brown

centrifuga sekigilo spin-dryer

dubi to doubt, be doubtful

ekipaĵo equipment

ekspluati to exploit

enui to be bored;

enuigi to bore (someone)

fabriki to manufacture;

fabriko factory

frosti to freeze; **frostigilo** freezer

fulmo lightning

gladi to iron

grimpi to climb

gvidi to guide, lead

haro a hair;

hararo the hair (of head, etc.)

indiki to indicate

intenci to intend

kontroli to check (*not* control)

kudri to sew

kuirforno (cooking) stove

kvalito quality

laŭeble as far as possible

magazeno store, large shop

magnetofono tape recorder

manĝilaro crockery, dishes

marbordo coast, seaside

mem oneself, itself, themselves, etc.

mikro-onda microwave

naĝi to swim

nepre without fail

nome namely

oferi to sacrifice (*not* offer)

okulo eye

pan-rostilo toaster

pantalono pair of pants (*note*: singular)

partopreni to take part

pasi to pass (by);

pasigi to spend (time)

polvo dust;

polvosuĉilo vacuum-cleaner

poŝo pocket

prezo price

prizorgi to look after

proksima near;

malproksima distant;

proksimume approximately

radiofono radio

rajdi to ride (horse, cycle, etc.)

rajti to be entitled to;

Ĉu mi rajtas? May I?

rakonto story, account

razi to shave

robo dress, robe

ruĝa red

scivoli to wonder (want to know)

sperti to experience

ŝati to appreciate, think highly of

ŝlosi to lock

ŝpari to save; **malŝpari** to waste

taŭga suitable; **taŭgi** to be suitable

velado sailing

vico (someone's) turn

vidbendaparato video recorder

Esprimo:

toleri la elspezon de to afford

Ĉapitro 12: Paĝo de flank-okupoj

Verbs preceding their subjects

1 In English we use the words “there” or “it” to introduce the subject when the verb comes first. Neither of these words is translated in Esperanto.

Estas bildo sur la muro.
There is a picture on the wall.

Estis multaj hundoj en la parko.
There were many dogs in the park.

Estos pli da viroj ol virinoj tie.
There will be more men than women there.

Note: This use of “there” should not be confused with **tie**, which means *there* in the sense of *in that place*.

Estas mi.
It is I.

Estis Maria, ne Arturo, en la ĝardeno.
It was Maria, not Arturo, in the garden.

Estos lundo morgaŭ.
It will be Monday tomorrow.

Note: This use of “it” should not be confused with **ĝi**, which stands in place of a noun (see chapter 6, note 1).

The introductory “it”

2 As shown above, the word “it” is translated only when it represents some definite noun. In the following sentences, “it” introduces and is equal to the part beginning with “that” or with an infinitive:

Estas vere, ke vi estas frua. = Ke vi estas frua estas vere.
It is true that you are early. That you are early is true.
(*It = That you are early*)

Plaĉis al ŝi, ke vi povis resti. = Ke vi povis resti plaĉis al ŝi.
It pleased her that you were able to stay. That you were able to stay pleased her.
(*It = That you were able to stay.*)

Note that because the “it” is not translated, what is an adjective in English becomes an adverb in Esperanto:

*It is **true***

Estas **vere**

*It is not **possible***

Ne estas **eble**

Myself, himself, etc.

3 The word **mem** is used to put emphasis on the noun or pronoun it follows:

Mi mem ne estas surda.
I myself am not deaf.

Li mem ne povas iri.
He himself cannot go.

Mi renkontis la reĝinon mem.
I met the queen herself.

La kato mem rifuzis trinki ĝin.
The cat itself refused to drink it.

Ni mem neniam aŭskultas la radion.
We ourselves never listen to the radio.

Ŝi parolis al la viroj mem.
She spoke to the men themselves.

Note that although **mem** is translated by *myself, himself, ourselves, themselves*, etc., it is not reflexive and should not be confused with **si**. In fact, **mem** is often used with the reflexive pronoun **si** to give added emphasis, though this is not translated in English:

Li razas sin mem.
He shaves himself.

Mem is also used as a prefix to show that a condition is independent, by itself, or without outside help:

memevidenta *self-evident (without further explanation)*
meminstruita *self-taught (without the aid of a teacher)*
memstara *independent (by itself without support)*

Word-building

4 You have seen how words can be changed or built up in various ways:

(a) by changing the grammatical ending:

loko *place, locality* loka *local*

(b) by putting a prefix before the root:

bona *good* malbona *bad*

(c) by adding a suffix between the root and the grammatical ending:

manĝi *to eat* manĝaĵo *food*

(d) by using a preposition as a prefix:

iri *to go* transiri *to go across (to cross)*

You may also have noticed for yourself how we can put two roots together to make a compound word. In this case the main word stands at the end:

libroŝranko (ŝranko por libroj) *bookcase*
dormoĉambro (ĉambro por dormi) *bedroom*

The ending **-o** is usually omitted from the first root, provided the resulting group of consonants is easy to pronounce:

horsignalo (signalo de la horo) *time signal*
semajnfino (fino de la semajno) *weekend*

A number of useful words can be made from **sama** (*same*) by using **sam-** as a prefix:

samtempe *at the same time*
sammaniere *in the same way*
samlandano *fellow countryman*
samklasano *classmate*
samideano *fellow member, lit. "member of the same idea"*
(often used to denote a fellow Esperanto speaker)

Praktiko 12.1: Traduku anglen:

Estas vere, ke nia komerco rapide kreskas. Necesas, ke ni tuj iru tien. Estas eble, ke li estas surda. Nur li mem scias tion. Estas vere, ke Esperanto estas pli simpla ol aliaj lingvoj. Sed eĉ Esperanto ne lernos sin mem; oni devas labori por lerni ĝin! Ŝajnas al mi, ke tio estas memevidenta. Estas danĝere transiri la straton sen rigardi ambaŭflanken. Estas pli facile konsili, ol akcepti konsilon. Ne oportunas al mi fari tiun taskon nun; vi mem devos fari ĝin.

Praktiko 12.2: Traduku esperanten:

There are a lot of trees in the park. It was I who said that. I myself met the queen. I met the queen herself. It is quite possible that he will not be able to come. It was late: I got out of bed quickly and got dressed (dressed myself). The quicker (more quickly) he ran, the sooner he arrived. It is obvious that he himself cannot go. There are two pictures on the wall of my room. The more I see them, the less I like them.

Praktiko 12.3: From the roots **ban-**, **ĉambr-**, **ĉarm-**, **ĉeval-**, **erar-**, **manĝ-**, **nov-**, **patr-**, **trov-**, **ven-**, make one word each for the following:

- | | |
|----------------------|---------------------|
| 1. to arrive | 11. old |
| 2. bathroom | 12. to return |
| 3. charm | 13. something found |
| 4. dining-room | 14. stable |
| 5. error | 15. suite of rooms |
| 6. fatherland | 16. worth finding |
| 7. foal | 17. charmingly |
| 8. to make a mistake | 18. bathing place |
| 9. food | 19. mare |
| 10. news | 20. novice |

5 Kaj ... kaj ..., Aŭ ... aŭ ..., Nek ... nek ...

The words **kaj**, **aŭ**, and **nek** are used in pairs as follows:

kaj ... kaj ... = *both ... and ...*

Ŝi estas **kaj** bela **kaj** bona.
*She is **both** beautiful **and** good.*

aŭ ... aŭ ... = *either ... or ...*

Aŭ pluvos **aŭ** neĝos.
*It will **either** rain **or** snow.*

nek ... nek ... = *neither ... nor ...*

Li estas **nek** riĉa **nek** malriĉa.
*He is **neither** rich **nor** poor.*

6 Jen ... jen ...

The word **jen** is also repeated to give the meaning *now ... now ... (sometimes ... sometimes ...)*

Mi vizitas **jen** teatron **jen** kinejon.
*I visit **sometimes** a theater, **sometimes** a cinema.*

7 Ĉu ... ĉu ...

The word **ĉu** is repeated to give the meaning *whether ... or ...*

Ĉu knabo, **ĉu** knabino, la infano estos bonvena.
***Whether** a boy **or** a girl, the child will be welcome.*

But perhaps it is more usual to find **Ĉu ... aŭ** (the second **ĉu** being understood).

Mi ne scias, **ĉu** iri **aŭ** (**ĉu**) resti.
*I don't know **whether** to go **or** (whether) to stay.*

Suffixes and prefixes

8 The suffix **-estr-** is used to denote the *person in charge*. It is often used as an independent word to translate *boss*.

lernejo <i>school</i>	lernejestro <i>headmaster</i>
urbo <i>town/city</i>	urbestro <i>mayor</i>
lando <i>country</i>	landestro <i>head of state</i>
imperio <i>empire</i>	imperiestro <i>emperor</i>
poŝto <i>post, mail</i>	poŝtestro <i>postmaster</i>

9 The suffix **-em-** is used to denote a disposition, inclination or tendency to do the thing which is expressed in the root. **Emi** is much used as an independent word to translate *to be inclined to*.

paroli <i>to speak, talk</i>	parolema <i>talkative</i>
ludi <i>to play</i>	ludema <i>playful</i>
labori <i>to work</i>	laborema <i>diligent</i>
batali <i>to fight</i>	batalema <i>pugnacious</i>
kvereli <i>to quarrel</i>	kverelema <i>quarrelsome</i>
plendi <i>to complain</i>	plendema <i>querulous, complaining</i>
ŝpari <i>to save (up)</i>	ŝparema <i>thrifty</i>
suspekti <i>to suspect</i>	suspektema <i>suspicious (by nature)</i>
timi <i>to fear, be afraid</i>	timema <i>timid</i>

10 The prefix **fuŝ-** means to botch or screw up, either intentionally or through stupidity or lack of attention:

Fuŝulo.

A bungler.

Fuŝfotografisto

A bungling photographer.

Vi certe fuŝos plurajn el ili.

You will certainly spoil (make a mess of) several of them.

Li fuŝis ĉion.

He bungled everything.

11 The prefix **dis-** expresses dispersal or separation:

sendi <i>to send</i>	dissendi <i>to distribute, circulate</i>
ŝiri <i>to tear</i>	disŝiri <i>to tear to shreds</i>
fali <i>to fall</i>	disfali <i>to fall to pieces</i>
bati <i>to beat</i>	disbati <i>to dash to pieces</i>

12 The prefix **bo-** denotes relationship by marriage, i.e. “in-law”:

patro <i>father</i>	bopatro <i>father-in-law</i>
patrino <i>mother</i>	bopatrino <i>mother-in-law</i>
frato <i>brother</i>	bofrato <i>brother-in-law</i>
fratino <i>sister</i>	bofratino <i>sister-in-law</i>
filo <i>son</i>	bofilo <i>son in law</i>
filino <i>daughter</i>	bofilino <i>daughter-in-law</i>
parencoj <i>relative</i>	boparencoj <i>“in laws”</i>

Note also: **bogepatroj** *parents-in-law*

Teksto: Paĝo de flankokupoj

La amatora fotografisto

BIRD-FOTOGRAFADO


La birdoj estas konstruontaj—eĉ jam konstruantaj—siajn nestojn. Ĉu vi iam penis fotografi birdojn ĉe la nesto? Por tio, oni bezonas nek altekosta¹ aparaton, nek profesion lertecon; eĉ fuŝfotografisto sukcesos, se li havas unu virton: pacienco!

Komencanto prudente elektos birdon kies nesto kuŝas aŭ sur tero aŭ sur akvo—ne en alta arbo. Birdoj estas tre suspektemaj kaj timemaj; tial oni devas uzi kaŝejon. La bildo montras kiel konstrui simplan skeleton, kiun oni kovras per dubekolora² sak-tolo, kun truo por la lenso. Ekfiks la kaŝejon je longa distanco de la nesto, kaj movu ĝin ĉiutage pli proksimen, ĝis, fine, ĝi estas staranta nur du aŭ tri metrojn for de la nesto.


Kiam vi estas preta fari la fotojn, estu certa, ke vi kunportas sufiĉe da filmo. (Vi certe fuŝos plurajn bildojn!) Vi bezonos ankaŭ notlibron kaj—amikon! Kiam vi estas sidanta komforte en la kaŝejo, la amiko formarŝas, kun bruo.

La birdo ne povas kalkuli: ĝi vidas, ke unu homo foriras, kaj ĝi ne suspektas, ke alia homo ankoraŭ restas en la kaŝejo. Ĝi do revenas al la nesto, kaj vi povos fari multan belajn fotojn—se la fortuna favoras vin!

1 "highly-costing": expensive
2. "doubtfully-colored": drab



Faldebla skeleto de kaŝejo



Kaŝejo preta, kun kovrilo

En via ĝardeno:

PRINTEPAJ TASKOJ

KONSTRUADO DE ROKĜARDENO

Laborema ĝardenamanto kaptos nun la okazon por konstrui rokĝardenon. Tia ĝardeno bonege utiligos negrandan spacon, kaj ĝiaj plantoj provizos tre kontentigan¹ rezulton—kaj laŭ kvanto, kaj laŭ kvalito.

La bildo montras kiel kuŝigi la rokojn. Ne uzu tro da rokoj! Malmultaj sufiĉas.


Inter belaj rokplantoj oni havas tre vastan elekton. Ili estas tre *rampemaj*, do necesas severi regi ilian kreskadon.

Multajn rokplantojn oni povas ankaŭ meti en potojn kaj starigi jen en pordejoj, jen en fenestroj, kie ili kreskos kaj floros eĉ dum la vintro.


Vizito al Kew

Laŭ afabla invito de la Ĝardenestro, la anoj de nia ĝardenista klubo faros oficialan viziton al Kew, venontan sabaton je la 2:30 p.t.m. La kondukonto estas nia prezidanto, s-ro Green.

1 "making satisfied": satisfactory



1 Apartigu la rokojn per roketoj aŭ brikoj



2 Klinu la rokojn jene, kaj plenigu la inter-spacojn per humo



3 Nur malmulte da roko restu videbla!



4 Per simpla aparato, oni povas konstrui ankaŭ akvofaleton

Praktiko 12.4: Traduku anglen:

Por fotografi birdojn, oni bezonas nek altekostan aparaton, nek profesion lertecon. Nek la kvanto nek la kvalito estas kontentiga. La nesto devas esti aŭ sur tero aŭ sur akvo. Li estas aŭ tro prudenta, aŭ tro timema. Oni povas meti ilin aŭ en potojn aŭ en la ĝardenon. Ĝi estas kaj necesa kaj utila. Birdoj estas kaj suspektemaj kaj timemaj. La kaŝejo estas kaj simpla kaj malalteka. Oni povas starigi ilin jen en pordejo jen en fenestro. Vi sukcesos, ĉu vi estas profesia fotografisto, ĉu fuŝfotografisto. Ĉu birdoj estas tre suspektemaj kaj timemaj? Ĉu vi estas tre laborema? Ĉu rokplantoj estas tre rampemaj? Ĉu vi estas lernejestro? Aŭ poŝtestro? Ĉu la ĝardenestro invitis la anojn de nia ĝardenista klubo?

Praktiko 12.5: Traduku esperanten:

He is neither good nor bad. Neither near nor far. It is neither the door nor the window. You can choose either one or the other. The results are good, both in quantity and quality. Now she runs, now she walks. I do not know whether to go, or to stay. Who is the mayor? Do you know the headmaster? The kitten is very playful. He is very quarrelsome. He makes a mess of everything.

Praktiko 12.6: Respondu:

1. Ĉu necesas profesia lerteco por sukcese fotografi birdojn?
2. Kian birdon elektos prudenta komencanto?
3. Kial oni devus havi multe da filmo?
4. Kion la birdo ne suspektas?
5. Kian avantaĝon havas rokĝardeno se oni havas malgrandan ĝardenon?
6. Ĉu oni bezonas multe da rokoj por fari rokĝardenon?
7. Per kio oni apartigu la rokojn?

8. Kial necesas severe regi la kreskadon de la rokplantoj?
9. Kiu faros viziton al Kew, kaj je kiu tago?
10. Laŭ kies invito ili iros tien?

Dialogo: La Kristnaskfestoj

La familio Lang gastigas siajn parencojn je la Kristnaska tago. Ĉeestas la patrino de Klara (“Avino”); Marko kaj Dorina, frato kaj bofratino de Rikardo; kaj Junia kaj Stefano, fratino kaj bofrato de Klara. Ili estas finantaj la Kristnaskan tagmanĝon.

- Marko** Nu, mi devas diri, ke tio estis la plej bona festmanĝo, kiun mi iam manĝis!
- La gastoj** Jes! Ja! (*Ili aplaŭdas.*)
- Klara** (*ruĝiĝas*) Dankon. Mi ĝojas, ke ĝi plaĉis al vi. Sed ankaŭ Rikardo helpis.
- Junia** Ho, tiu meleagraĵo estis vere rava!
- Stefano** Kaj kiom multe da legomoj! Mi sentas, ke mi ne volos manĝi denove dum almenaŭ du tagoj!
- Rikardo** Kiom ofte oni diras tion! Sed post kelkaj horoj oni ree estas preta.
- Avino** Mi estas tute certa, ke *mi* ne povos!
- Klara** Ho, Panjo, vi povos kiam la tempo venos.
- Marko** Kaj ankaŭ la vino estis bonega. Vi bone elektis, frato mia!
- Rikardo** Dankon.
- Klara** Nu, se vi ĉiuj jam finis, eble estus bone iri en la salonon kaj vidi, kion faras la infanoj. Ili lasis la tablon antaŭ iom longa tempo!

Marko Stefano kaj mi lavos la manĝilaron, ĉu ne, Stefano?

Klara Ho dankon, sed ne nun. Ni lasos tion ĝis post la disdono de la donacoj. Venu en la salonon!

(Ĉiuj iras en la salonon, kie ili trovas Andreon kaj Marian, kiuj rigardadas la bele ornamitan Kristnaskarbon, sub kiu estas amaso da bele volvitaj pakoj.)

Klara Nu, do, infanoj. Kion vi faras?

Andreo Nenion, Panjo. Ni nur rigardas la arbon.

Klara Do, sidiĝu ĉiuj, mi petas. Laŭ nia kutimo, Andreo kaj Maria nun disdonos la donacojn.

Andreo *(prenas pakon kaj legas la etiketon)* Ĉi tiu estas por onklo Marko, de Panjo kaj Paĉjo.

Maria Por onklino Dorina de onklo Stefano ...

(Ili daŭrigas la disdonadon, sed post du-tri minutoj Klara komencas aspekti iomete maltrankvila. Ŝi parolas mallaŭte al Rikardo.)

Klara Estas io nekutima ... tiuj pakoj ...

Rikardo Kio estas?

Stefano Pardonu, sed mi kredas, ke iu eraris. Ĉi tiu pako havas etiketon “Al Stefano, de Dorina”, sed en ĝi estas mansaketo!

Junia Kaj la mia, kun etikedo “Al Junia, de Marko”, enhavas abonbileton al la futbalejo!

Avino Mi estas certa, ke ĉi tiuj tri pipoj ne estas por mi!

Klara *(laŭte)* Infanoj! Kion vi scias pri tio ĉi? Kion vi faris?

Andreo Ni nur ... ni nur ... *(Li ekridas, kaj ne povas daŭrigi.)*

Maria Ni ... ŝanĝis la etiketojn, Panjo.

(Kelkaj personoj komencas ridi.)

Klara *(penas soni severa)* Vi estas malbonkonduataj! Mi havas fortan volon sendi vin al la litoj!

Andreo Ho, Panjo!

Klara Sed ĉar estas Kristnasko, mi ne tion faros. *(Ŝi ekridetas.)* Kaj vere, tio estis iom amuza ŝerco!

(Ĉiuj ridas.)

Rikardo Nu, Andreo, se vi kaj Maria finos la disdonadon, la donintoj povos klarigi, por kiu ĉiu donaco estis destinita.

Stefano Kaj do, “fino bona, ĉio bona”!

Demandoj

1. Kio estas la parenceco inter Dorina kaj Rikardo?
2. Kio estas la parenceco inter Avino kaj Rikardo?
3. Kio estas la parenceco inter Avino kaj Andreo?
4. Kian viandon oni manĝis je la Kristnaska tagmanĝo?
5. Kion oni trinkis?
6. Kiu elektis tion?
7. Kiu proponas lavi la manĝilaron?
8. Kion faras la infanoj dum la adoltoj trinkas post la manĝo?
9. Kiu unue suspektas, ke estas io stranga?
10. Kial la patrino ne sendas la infanojn al la litoj?

abonbileto season ticket
adolto adult
aparta separate; **apartigi** to separate
aplaŭdi to applaud
avo grandfather; **avino** grandmother
bruo noise
daŭrigi to continue (something)
donaco a present
elekti to choose
eraro mistake, error
etikedo label
faldi to fold
festo party, celebration; **festi** to
celebrate
galinolo moorhen
gastigi to entertain, have guests
grundo soil, earth
humo humus
kaŝi to hide (something)
klini to slope, incline (something)
konstrui to build
kovri to cover
Kristnasko Christmas
kvanto quantity
laŭta loud; **mallaŭta** quiet
lerta clever, skillful
maniero way, manner
mansaketo handbag
meleagro a turkey; **meleagraĵo**
turkey (meat)
nepo nephew
pako parcel

pardonu to excuse, forgive
Pardonu! Excuse me!
peni to try
pipo (tobacco)-pipe
pordejo doorway
rampi to crawl
rava delightful
ree again
soni to sound
sufiĉa enough, sufficient; **sufiĉi** to
suffice
ŝerco a joke
tero earth, ground
truo hole
utila useful
vasta spacious, wide, vast
vino wine
virto virtue
volvi to wrap

Esprimoj:

du-tri two or three
forta volo “a good mind (to)”
“fino bona, ĉio bona” “all’s well that
ends well”

Ĉapitro 13: Leteroj al la redaktisto

Indirect or reported speech

1 When we quote what someone has said, this is called *direct speech*. For direct speech we use quotation marks: *I said, "I am going!"*

If we report what someone has said without using a direct quote, this is called *indirect* or *reported speech*. Notice that in English, when the verb of saying etc. is in the past tense, the "reported" verb also moves into the past: *I said (that) I was going*.

In Esperanto there is no change in verb tense: indirect speech has the same tense as direct speech.

Mi diris, "Mi iras!"
Mi diris, **ke** mi iras.

Study the following examples:

Direct	Indirect
Li diris, "Ŝi manĝas!" <i>He said, "She is eating!"</i>	Li diris, ke ŝi manĝas. <i>He said (that) she was eating.</i>
Li diris, "Ŝi manĝis!" <i>He said, "She has eaten!"</i>	Li diris, ke ŝi manĝis. <i>He said (that) she had eaten.</i>
Li diris, "Ŝi manĝos!" <i>He said, "She will eat."</i>	Li diris, ke ŝi manĝos. <i>He said (that) she would eat.</i>

2 The same thing happens when we report a question. While in English we sometimes use "if" instead of "whether", in Esperanto we always use **ĉu**, never **se**.

He asked, "Do you love me?"
Li demandis, "Ĉu vi amas min?"

He asked whether (if) she loved him.
Li demandis, ĉu ŝi **amas** lin.

3 Despite its name, indirect speech does not always refer to actual speech, but is also used for thinking, believing, knowing, wondering, imagining, etc.:

I thought (that) he was very tall
(I thought, "He is very tall.")
Mi opiniis, **ke** li estas tre alta.

I wondered whether (if) she would answer.
(I wondered, "Will she answer?")
Mi scivolis, ĉu ŝi respondos.

I knew (that) you would understand.
(I knew, "You will understand.")
Mi sciis, **ke** vi komprenos.

Passive participles

4 Corresponding to the three active participles ending in **-anta**, **-inta** and **-onta** (chapter 11), there are also three *passive participles* ending in **-ata**, **-ita**, and **-ota**.

You already met **-ita** (chapter 9, note 12), which shows that an action has finished, or been completed:

presita paperfolio

= a printed sheet of paper (one which has been printed)

fermita pordo = a closed door (one which has been closed)

io perdita = something lost (something which has been lost)

-ata shows that the action is still in progress, or that the state is still applicable:

amata homo = a person who is (now, still) loved

konata lando = a known country (one which everyone knows)

estimata sinjoro = dear sir (one who is esteemed)

-ota shows that the action has not yet been started:

konstruota domo = a house which has yet (is going) to be built

farota laboro = work which has yet to be done

io elpensota = something which has yet to be thought out


Praktiko 13.1: Traduku anglen:

Li diris, ke li iros tiun posttagmezon. Ŝi opiniis, ke ŝia frato estas inteligenta. Mi scivolis, ĉu li diris ion al ŝi. Mi imagis, ke mia frato iros tien. Mia kuzo demandis, ĉu mi skribis la leteron. Mi respondis, ke mi skribos ĝin poste. Ili sendis al mi presitan leteron. Mia nova domo estas konstruota venontjare. Ĉu tiu tasko estas jam farita? Ne, ĝi estas nun farata. Ĉu vi jam sendis la leteron? Ne, ĝi estas ankoraŭ skribota.

Praktiko 13.2: Traduku esperanten:

I asked her where (**kien**) she was going, and she replied that she was going to the shops. My brother said he had forgotten his book. He hoped (that) he would remember it today. I hoped she had finished it. Andreo said he was learning Esperanto. I asked Maria whether she would bring her new record, but she said she had lost it. Andreo thought it was in the cupboard, and said he would look for it.

Praktiko 13.3: Translate the following signs:



Compound tenses

5 Just as with the active participles, the passive participles can be combined with **estas**, **estis** and **estos**. For example:

Li estas edukita.	He is educated.
Li estas edukata.	He is being educated.
Li estas edukota.	He is going to be educated.
Li estis edukita.	He was educated.
Li estis edukata.	He was being educated.
Li estis edukota.	He was going to be educated.
Li estos edukita.	He will be educated.
Li estos edukata.	He will be being educated.*
Li estos edukota.	He will be going to be educated.*

* Almost never used.

6 Notice that when we say something is done *by* somebody, *by* is translated by **de**:

Mi estimas lin. Li estas estimata **de** mi.
I esteem him. *He is esteemed by me.*

Li helpos vin. Vi estas helpota **de** li.
He will help you. *You are going to be helped by him.*

To show the “instrument” with which an action is performed, we often use “with” in English. In Esperanto we use *not kun*, but **per** (*by means of*):

La hundo estis batata **de** la knabo **per** bastono.
The dog was being beaten by the boy with a stick.

La bildo estis desegnita **de** ŝi **per** kraĵono.
The picture was drawn by her with a pencil.

Note the following distinction:

La knabino ludis **kun** sia fratino.
The girl was playing with her sister.

La kato ludis **per** la muso.
The cat was playing with the mouse.

In the former case the sister was also playing, but in the latter case the mouse certainly was not! **Kun** always contains the idea of “together with”; in fact **kune** means *together*.

Passive participles as nouns

7 The passive participles are also used as nouns, as follows:

ami	<i>to love</i>	amato	<i>loved one</i>
instrui	<i>to teach</i>	instruato	<i>trainee</i>
pagi	<i>to pay</i>	pagato	<i>payee</i>
koni	<i>to know, be acquainted with</i>	konato	<i>acquaintance</i>
mortigi	<i>to kill</i>	moritigito	<i>someone who has been killed</i>
venki	<i>to conquer</i>	venkito	<i>someone who has been conquered</i>
elekti	<i>to choose</i>	elektoto	<i>someone who will be chosen</i>
viziti	<i>to visit</i>	vizitoto	<i>someone who will be visited</i>

The relative pronoun

8 This term refers primarily to the pronoun **kiu**, with alternative forms **kiun**, **kiuj** and **kiujn** (*who, whom, which, that*). Here are some examples of their uses as relative pronouns:

- (a) the man *who* saw me
the man *that* saw me
- (b) the letter *that* was on the table
the letter *which* was on the table
- (c) the man (*whom*) I saw
the man (*that*) I saw
- (d) the letter (*that*) I wrote
the letter (*which*) I wrote

Note that in (c) and (d) the pronouns in parentheses may be omitted in English without altering the sense. Note also that in each of these cases the action is done, not by the man or the letter, as in (a) and (b), but by

me. Since the pronoun in parentheses (the relative pronoun) always refers to the word which precedes it, it refers in (c) and (d) to the *object* of the verb.

In Esperanto, these words must *always* be put in:

- (a) la viro, **kiu** vidis min.
- (b) la letero, **kiu** estis sur la tablo
- (c) la viro, **kiun** mi vidis
- (d) la letero, **kiun** mi skribis

Remember that **kiu(n)** refers in each case to the word which precedes it. In (a) and (b) as we have seen, the word it refers to is the *subject* of the verb: **la viro** (subject) **vidis min**; **la letero** (subject) **estis sur la tablo**. In (c) and (d) the word referred to is the *object*: **mi** (subject) **vidis la viron** (object); **mi** (subject) **skribis la leteron** (object). This is why in the first two sets of examples, **kiu** does not take **-n**, while in the second two it does. In other words, if **kiu** refers to the object, it becomes **kiun**.

If the word preceding the relative pronoun is *plural*, the relative pronoun will have the forms **kiuj**, **kiujn**.

Note: **Ke** can *never* be used as a relative pronoun. For the student, the main difficulty lies in recognizing where to put in a relative pronoun when it is not used in English:

The book I read yesterday was good.
La libro, **kiun** mi legis hieraŭ, estis bona.

One possible consolation is that when we can leave it out in English, it will always end in **-n** in Esperanto!

9 Kies (*whose*) may also serve as a relative pronoun. **Kies** never changes; only the noun which follows it may change:

The woman whose bag was on the table.
La virino **kies** saketo estis sur la tablo.

The woman whose bag he stole.
La virino **kies** saketon li ŝtelis.

Suffix/prefix

10 The suffix **-aĉ-** is used to denote poorness of quality or condition, and forms words with a disparaging sense of that which is indicated by the root. As an independent word, **aĉa** = *rotten, poor in quality*.

domo	<i>house</i>	domaĉo	<i>hovel</i>
infano	<i>child</i>	infanaĉo	<i>brat</i>
ĵurnalo	<i>newspaper</i>	ĵurnal(a)ĉo	<i>“rag”</i>
paroli	<i>to speak</i>	parolaĉi	<i>to speak badly, murder the language</i>
skribi	<i>to write</i>	skribaĉi	<i>to scribble</i>
virino	<i>woman</i>	virinaĉo	<i>hag</i>

11 The prefix **fi-** denotes looseness of morals, lack of principles, depravity:

homo	<i>person</i>	fihomo	<i>scoundrel</i>
menso	<i>mind</i>	fimensa	<i>foul-minded</i>
vorto	<i>word</i>	fiporto	<i>a bad (dirty) word</i>
rakonto	<i>story</i>	firakonto	<i>dirty, smutty story</i>

Fi! as an interjection means *Shame!* **Fi al vi!** *Shame on you!*

Teksto: Leteroj al la redaktisto

Virinoj kiel registroj?

Estimata Sinjoro!

Via korespondinto J. L. estas malprava se li opinias, ke virinoj reĝos la mondon pli saĝe ol viroj. Ĉiam en la mondhistorio, kiam virinoj estis landestroj, kun absoluta potenco, tiuj virinaĉoj estis tiel same batalemaj, kruelaj kaj stultaj, kiel viroj. Nenio indikis, ke ili amas pacon.

Kore salutas,

R. F. (Swansea)

Estimata Sinjoro!

Mi konsentas kun s-ro J. L. La¹ viro estas ofte detruanto, sed la virino estas ĉiam kreanto. Virinoj, ĝenerale, amas la homaron—viroj emas malami ĝin.

Via,

(S-ino) P. J. (Bristol)

Rasaj antaŭjuĝoj²

Sinjoro!

Mi estas operaciita de irlanda ĥirurgo, kies helpanto estis hinda kuracisto. La malsanulejestro estis judo. Inter miaj flegistinoj estis fraŭlinoj el Trinidad, Afriko kaj

Nederlando. Post tiu sperto, miaj rasaj antaŭjuĝoj estas tuj detruitaj.

Kun kora saluto,

E. P. K. (Derby)

Ĉu kukolo jam en marto?

Estimata Sinjoro!

Hodiaŭ mi ekvidis grandetan, grizan birdon, kaj amiko opiniis, ke ĝi estas kukolo. Ĉu tio estas ebla en Marto?

Via,

P. M. (Exeter)

Dulingvaj infanoj

Respektata Sinjoro!

Mi estas estro de brazila lernejo por anglaj infanoj. Mi estis mirigita kiam mi rimarkis, kiel glate funkcias la instruado en du lingvoj. Infanoj nur kvinjaraj lernis legi per anglalingvaj libroj en la mateno kaj per portugallingvaj libroj en la posttagmezo. La infanoj ŝajne apartigis la matenan kaj posttagmezan laboron inter du fakoj de la menso.

Sincere via,

J. M. C. (Plymouth)

Sinjoro!

Mi bedaŭras, sed mi ne konsentas, ke edukado en du lingvoj kaŭzas nenian malutilon al infano. Mi estis edukita trilingve (angle, france kaj itale). Mi loĝas jam de 15 jaroj en Britujo, sed malgraŭ tio, mi parolas ĉiujn tri lingvojn, eĉ la anglan, per iom “fremda” elparolado³, kaj mi emas misparoli kaj uzi neĝustajn parolturnojn⁴. Tio estas malavantaĝo por mi. Neniu infano devus studi duan lingvon, antaŭ ol li havas almenaŭ 15 jarojn. Multaj ja parolaĉas eĉ la propran, gepatran⁵ lingvon!

Kore salutas,

M. G. (Glasgow)

Televido—kaj surduloj

Estimata Sinjoro!

Ĉiu blindulo rajtas posedi radioaparaton. Mi volas proponi, ke ĉiu surdulo devus posedi televidan aparaton. Mi mem ne estas surda, sed oni diras, ke la surduloj estas eĉ pli izolitaj ol la blinduloj. Televidaj dissendoj estas granda beno al ili. Publika monokolekto devus esti komencita por provizi niajn surdulojn per aparatoj.

Sincere via,

(F-ino) L. M. (Torquay)

Televido—kaj Shakespeare

Estimata Redaktisto!

Antaŭ kelkaj tagoj, dum mi estis foriganta amason da rubo el mia subtegmento, mi ekvidis ekzempleron de via ĵurnalo de antaŭ tridek jaroj! En ĝi estis artikolo de via tiama teatra kritikisto, kiu komentis, ke televidaj prezentaĵoj de Shakespeare ĉiam estos aĉaj, kaj ankaŭ, ke televido ruinigos la “vivan” teatron. Sur alia paĝo aperis letero de iu leganto, kiu forte kontraŭis la kritikiston. Tiu leganto atentigis, ke kiam la radio estis elpensita⁶, oni diris, ke tio estos mortobato al koncertejoj, sed laŭ li, la publika intereso pri muziko ege pligrandiĝis, kun la rezulto, ke “nun” (t.e.⁷ antaŭ 30 jaroj!) la koncertejoj estas ĉiam plenplenaj⁸. El tio via korespondanto evidente kredis, ke la televidaj prezentaĵoj simile stimulos publikan intereson pri Shakespeare, kaj simile plenigos la teatrojn. Mi ne scias, ĉu intertempe la televido fakte plenigis la teatrojn, sed ŝajnas al mi, ke ĝi tre sukcese malplenigis la kinejojn!

Via,

(S-ino) S. B. (Worcester)

- 1 "the man", i.e. men in general
- 2 lit. "pre-judgements": prejudices.
- 3 "speaking-out": pronunciation.
- 4 turns-of-phrase
- 5 "of mother and father": mother tongue.
- 6 "thought-out": invented.
7. **t.e.:** **tio estas**
- 8 Emphasizing by repetition. Two words at least have become firmly established: **plenplena** *chock-full*, **finfine** *at long last*.

Praktiko 13.4: Traduku anglen:

Ĉu vi opinias, ke virinoj regos la mondon pli saĝe ol viroj? Nenio indikis, ke ili amas pacon. Mia amiko opiniis, ke ĝi estas kukolo. Mi ne konsentas, ke edukado en du lingvoj kaŭzas nenian malutilon al infano. Mi volas proponi, ke ĉiu surdulo devus posedi televidan aparaton. Publika monkollekto devus esti komencita. Li diris, ke televidaj prezentaĵoj de Shakespeare ĉiam estos aĉaj. Li diris, ke televido ruinigos la "vivan" teatron. Ĉu virino estas kreanto aŭ detruanto? Mi estis mirigita kiam mi rimarkis, kiel glate funkcias la instruado en du lingvoj. Mi estis edukita trilingve. Surduloj estas pli izolitaj ol blinduloj. La virino, kiu diris tion, loĝas en Torquay. La legantoj, kiuj skribis al la redaktisto, menciis diversajn aferojn. Mi ne konsentis kun ĉiuj leteroj, kiujn mi legis. La viro, kies domo estis detruita, estas mia amiko.

Praktiko 13.5: Traduku esperanten:

Did you think that women were wiser than men? The town has been destroyed. I was astonished to see you. A public collection should be started. When was radio invented? By who was it invented? He was esteemed by everyone. She was loved by all. I was operated on by an Irish surgeon. The weather was rotten. Those children who are brought up in two languages speak both equally well. The two letters I received this morning were both from old friends. The lady whose handbag I found will have come for it before half past five.

Praktiko 13.6: Respondu:

1. Ĉu la du personoj, kiuj skribis pri virinoj kiel registoj, konsentas pri la temo?
2. Kie loĝas la viro, kies rasaj antaŭjuĝoj estas detruitaj?
3. El kiu lando estis la ĥirurgo, kiu estas operaciinta tiun viron?
4. Kiel funkciis la intruado en la brazila lernejo por anglaj infanoj?
5. Kiom aĝaj estis la infanoj, kiuj lernis legi angle en la mateno kaj portugale en la posttagmezo?
6. Kial, laŭ f-ino L. M., ĉiu surdulo devus posedi televidan aparaton?
7. Por kio oni devus komenci publikan monkollekton?
8. De kiam estis la ĵurnalo, kiun trovis s-ino S. B.?
9. Kie ŝi estis trovinta ĝin?
10. Kian efikon, laŭ ŝi, la televido faris sur la kinejoj?

Dialogo: Universala Kongreso — La alveno

La komenco de Aŭgusto. Rikardo kaj Klara Lang alvenis al la kongresejo de la Universala Kongreso, kaj ĵus vizitis la ĝiĉetojn, kie ili registris sian alvenon kaj ricevis ĉiujn necesajn dokumentojn.

Rikardo Do, nun ni jam estas kongresanoj! Ni sidu en tiu angulo de la vestiblo por rigardi niajn dokumentojn, kaj aparte la Kongresan Libron.

Klara Bona ideo! Tio utile okupos la tempon ĝis la kvara horo, kiam Chantal kaj Marteno esperas esti apud la ĝiĉetoj.

* * *

Rikardo Mi vidas, ke hodiaŭ vespere je la oka okazos la Interkona Vespere. Evidente ni devos ĉeesti tion.

Klara Certe. Ĝi okazos en la ĉambro Zamenhof. Ŝajnas, ke ĉiuj

ĉambroj havas nomojn. Mi bone scias, ke d-ro (= doktoro) Zamenhof estis la kreinto de Esperanto, sed mi ne konas la aliajn nomojn.

Rikardo Ĉu vi ne rekonas la nomon de Edmond Privat? Li verkis la libron *La Vivo de Zamenhof*, kiun ni jam legis.

Klara Ho jes, mi memoras. Kaj la aliaj?

Rikardo Mi kredas, ke Hodler helpis fondi U.E.A.¹, kaj gvidi ĝin dum la fruaj jaroj. Grabowski kaj Kabe estis inter la unuaj verkistoj en Esperanto, kaj Kalocsay estis grava hungara poeto. La aliajn mi ne konas.

Klara Estas preskaŭ la kvara horo; eble ni devus alproksimiĝi al la ĝiĉetoj... Ha! Jen, mi ĵus vidis Chantal... tie, en verda mantelo!

(Ili alproksimiĝas al la geamikoj.)

Rikardo Saluton, geamikoj!

Marteno (*turniĝas*) Ha! Saluton al vi! Mi ĝojas revidi vin!

Klara Kaj ni vin!

Chantal Niaj karuloj! Kia plezuro!

(Ili brakumas sin reciproke.²)

Marteno Ĉu vi povas atendi, dum ni prenos niajn dokumentojn?

Rikardo Komprenoble! Ni sidos en tiu angulo por atendi vin.

(Ili disiĝas, kaj post iom da tempo la franca paro revenas al Rikardo kaj Klara.)

Marteno Jen, tio estas finita. Do! Estas vere bone ree esti kune. Kiel kaj kiam vi alvenis al Belurbo?

Rikardo Ni alvenis hieraŭ posttagmeze per aŭto, tranoktis en nia hotelo, kaj hodiaŭ matene ni veturigis la infanojn al la Infana Kongreseto kaj prezentis ilin al la ĉefgvidanto tie.

Chantal Kaj ĉu ĝi estas en bela loko? Ĉu la infanoj estis kontentaj?

Klara Laŭ tio, kion mi povis vidi, la kongresetejo estas tre bona; tre proksima al la maro, kun arbaro malantaŭe. Ni vidis la dormejojn, kaj Andreo kaj Maria estis prezentitaj al kelkaj infanoj.

Rikardo Kaj komprenoble, ili antaŭĝuas la alvenon de siaj geamikoj, Fulvio kaj Trudi, kiujn ili ekkonis en Grezijono.... Kaj vi, kiel vi veturis?

Marteno Ni venis vagonare, kun kelkaj aliaj samideanoj. Ni multe babilis, kaj tio ŝajnis malplilongigi la veturon.

Chantal Mi rimarkis, kiam ni renkontis vin, ke vi havas la kongreslibron en la mano. Ĉu vi jam decidis ion ajn pri la programo?

Klara Nur pri hodiaŭ vespere. Je la oka horo okazos la interkona vespero, kiun ni certe devos ĉeesti, ĉu ne?

Marteno Ho, certe! Kaj kiu scias?—eble ni vidos iujn konatojn, kvankam inter tiom da homoj, tio estas iom neverŝajna!

Rikardo Nu, ni vidos! Intertempe, mi sugestis, ke ni iom esploru la kongresejon kaj eksciu, kie estas la diversaj ĉambroj, kaj post tio ni povos eliri por iom promeni dum la suno brilas, se vi ne estas tro lacaj.

Chantal Bona ideo! Kaj komprenoble necesos ankaŭ trovi restoracion por la vespermanĝo. Ni devos manĝi frue, se la Interkona Vespero komenciĝos je la oka!

Klara Fakte, ni kutime manĝas ĉirkaŭ la sesa horo hejme, kiam Rikardo revenas de la laborejo, sed mi scias, ke vi francoj vespermanĝas pli malfrue ol ni.

Rikardo Kaj okupas pli da tempo pri ĝi!

Marteno Ha, ĉe ni la manĝado estas serioza afero; ni traktas ĝin kun respekto!

1. Universala Esperanto-Asocio.

2. *each other (reciprocally)*.

Demandoj

1. De kie ges-roj Lang ricevis siajn dokumentojn?
2. Kion ili aparte volas rigardi?
3. Kie okazos la Interkona Vespero?
4. Kiu verkis la libron *La Vivo de Zamenhof*?
5. Kian mantelon portas Chantal?
6. Kiel veturis Rikardo kaj Klara al Belurbo?
7. Kiel veturis Marteno kaj Chantal, kaj kun kiuj?
8. Kion antaŭĝuas la infanoj?
9. Kial la kvar geamikoj devos manĝi frue?
10. Je kioma horo Klara kaj Rikardo kutime vespermanĝas hejme?

antaŭĝui to look forward to

atentigi to draw attention to, point out

bati to beat, strike; **bato** a blow

bedaŭri to regret

beno blessing; **beni** to bless

brakumi to embrace

ĉagreno grief, worry;

ĉagreni sin to worry oneself

ĉefgvidanto leader, person in charge

disko disc, record

doktoro doctor (of science, philosophy, medicine, etc.)

efiko effect

ekzemplero copy (of a book, etc.)

fidela faithful

flegi to nurse (the sick);

flegisto nurse

fondi to found

frapi to knock

fremda foreign

funkcii to function, work

gardi sin to take care

(lit. “guard oneself”)

ĝiĉeto ticket-window, box-office, hatch

glata smooth

ĥirurgo surgeon

(now often seen as **kirurgo**)

indiki to indicate

interkona “getting to know each other”

intertempe meanwhile

juĝi to judge

kaŭzi to cause

krii to shout, cry

kukolo cuckoo

kuraci to treat medically;

kuracisto medical doctor

laca tired, weary

malgraŭ in spite of

malutilo harm; **malutila** harmful

mantelo coat

menso mind

operacio operation (surg.);

operacii to operate on

paco peace

potenco power

provizi to provide (someone with something)

raso race (of humankind)

reciproke reciprocally (each other)

redakti to edit

registri to register, record

restoracio restaurant

rubo rubbish

serioza serious, earnest

stulta stupid

subtegmento attic, loft

verŝajna probable, likely;

neverŝajna unlikely

vestiblo vestibule, entrance hall

Esprimoj:

antaŭ ol before (see chapter 14 note 2)

laŭ li in his opinion (“according to him”)

Ĉapitro 14: Paĝo por la semajnfino

Past extending into present

1 As we saw in the dialog in chapter 8 (in a footnote), an action or state having its origin in the past but extending into the present is expressed by the present tense (instead of by the perfect tense, as in English):

Mi estas malsana jam de tri tagoj.
I have been ill for three days (and still am).

Li atendas jam de du horoj.
He has been waiting for two hours (and is still waiting).

Ŝi estas ĉi tie jam de kvar semajnoj.
She has (already) been here for four weeks (and is still here).

Ni scias pri ĝi jam de longa tempo.
We have known about it for a long time.

Ili loĝas en Londono jam de kvin jaroj.
They've been living in London for five years (and are still living there).

Note: **jam** is generally added to emphasize the connection with the past.

2 Antaŭ ol

(a) When “before” precedes a verb in English (e.g. *before eating; before I saw him*) we use **antaŭ ol** in Esperanto, instead of **antaŭ** alone:

Li foriros **antaŭ ol** vi revenos.
He will leave (go away) before you come back.

Antaŭ ol li parolis, li tuisis.
Before he spoke, he coughed.

(b) To translate the idiom “before ...-ing,” we use **antaŭ ol** with an infinitive:

Mi laboros **antaŭ ol** ripozi.
I will work before resting.

Antaŭ ol manĝi, li lavis siajn manojn.
Before eating, he washed his hands.

3 Post kiam

Similarly, when “after” comes before a verb form, we use **post kiam**, instead of **post** alone:

Li foriros **post kiam** vi revenos.
He will leave after you come back.

Post kiam mi finis la laboron, li eliris.
After I finished the work, he went out.

Note that unlike **antaŭ ol**, **post kiam** is *not* used before an infinitive. In that case we use an adverbial participle, e.g., **fininte**:

After working for two hours, he rested.
Laborinte dum du horoj, li ripozis.

(This construction is dealt with in more detail in chapter 15.)

Elliptical usage

4 This term refers to those cases in which, in ordinary speech, we do not use a complete sentence, the omitted words being understood. A common example is “Good evening!”, which actually means “I wish you a good evening!”

Here are some more examples, with the missing (understood) words supplied in the right hand column:

Good day!	(I wish you a) good day!
One moment, please...	(Wait) one moment, please.
Just a word of advice...	(I offer you) just a word of advice.
Who did that? Andreo.	Andreo. (did that).
Whom did you see? Andreo.	(I saw) Andreo.

Elliptical expressions occur in Esperanto, too. However, the case endings of the words may be affected by the omitted verb. Here are the Esperanto forms of the above examples:

Bonan tagon.	(Mi deziras al vi) bonan tagon.
Unu momenton, mi petas...	(Atendu) unu momenton, mi petas.
Nur unu vorton da konsilo...	(Mi proponas al vi) nur unu vorton da konsilo.
Kiu faris tion? Andreo.	...Andreo (faris tion).
Kiun vi vidis? Andreon.	...(Mi vidis) Andreon.

5 In some cases, the whole meaning of a sentence can be altered by the omission of an **-n**:

I love you more than Johano =
<i>either</i> (a) I love you more than Johano loves you.
<i>or</i> (b) I love you more than I love Johano.

I welcomed him as chairman =
either (a) I, as chairman, welcomed him.
or (b) I welcomed him (he was the chairman).

In Esperanto these become:

- (a) Mi amas vin pli ol Johano.
- (b) Mi amas vin pli ol Johanon.
- (a) Mi bonvenigis lin kiel prezidanto.
- (b) Mi bonvenigis lin kiel prezidanton.

6 Another case of elliptical usage, but this time not involving the ending **-n**, occurs sometimes when answering the question “Whose?”

Whose record is that? (It is) **Mary's** (record).
Kies estas tiu disko? (Ĝi estas la disko) **de Maria**.

7 The suffix **-um-** has no defined meaning, but is used to show some act or object related to the root. It is sometimes used to coin words for the occasion where the meaning is clear, but mainly it is used with a few well-known roots. Here are the most common:

aero <i>air</i>	aerumi <i>to air, aerate</i>
akvo <i>water</i>	akvumi <i>to water (a garden)</i>
cerbo <i>brain</i>	cerbumi <i>to rack one's brains</i>
folio <i>leaf, page (of book)</i>	foliumi <i>to thumb one's way through (a book)</i>
kalkano <i>heel (of foot)</i>	kalkanumo <i>heel (of a boot or shoe)</i>
kolo <i>neck</i>	kolumo <i>collar</i>
malvarma <i>cold</i>	malvarmumo <i>a cold, chill</i>
okulo <i>eye</i>	okulumi <i>to make eyes at</i>
plena <i>full</i>	plenumi <i>to fulfill</i>
vento <i>wind</i>	ventumi <i>to fan</i>

Praktiko 14.1: Traduku anglen:

Mi rigardis lin kiel bonan instruiston. Ŝi estas malsana jam de (unu) semajno. Mi multe cerbumis pri tio, sed ne sukcesis trovi solvon. Kiu venis en la ĉambron?—Andreo kaj Maria. Nun kelkajn vortojn pri la Universala Kongreso. Ĉar mankas pluvo jam de kelkaj tagoj, mi devos akvumi la ĝardenon. Mi amas lin pli ol liaj fratoj (*Make your meaning clear!*) Mi promesis helpi ŝin, do mi nepre devas plenumi mian promeson. Mi estas instruisto jam de dudek jaroj. Kiujn vi renkontis en la urbo?—Andreon kaj Marian.

Praktiko 14.2: Traduku esperanten:

Firstly, just a word about the meeting on Wednesday evening. It is necessary to aerate the soil from time to time. She has been waiting for an hour and a half. Who played in the garden? Mary. My sister has been living in London for ten years. I love her more than her sisters (i.e. than I love her sisters). I have been in bed for two days with (= because of) a cold. I have known about that for a long time. Whom did you see in (the) town?—Rikardo and Klara. These shoes need new heels. The meeting has already lasted two hours. I regard him as a very good friend.

Praktiko 14.3: Parigu (*match*) la respondojn kun la demandoj:

- | | |
|---------------------------------|---------------------------|
| 1. Kiom longe vi estas malsana? | (a) Post kiam vi revenos. |
| 2. Kiam vi foriros? | (b) La knabineto. |
| 3. De kiu vi estis edukita? | (c) En la banĉambro. |
| 4. Kiu ludas per la pupodomo? | (d) Jam de du semajnoj. |
| 5. Kun kiu ŝi ludas? | (e) Malvarmumon. |
| 6. Kiun vi vidis en la ĝardeno? | (f) De la knabineto. |
| 7. Kies estas tiu pupo? | (g) En la banĉambron. |
| 8. Kian malsanon li havas? | (h) S-ron Lang. |
| 9. Kie oni lavas sin? | (i) De mia patro. |
| 10. Kien iras Andreo? | (j) Kun sia amikino. |

Suffixes and prefixes

8 The suffix **-end-** denotes that which needs to be done or has to be done:

pagi	<i>to pay</i>	pagenda	<i>payable, due, has to be paid</i>
lerni	<i>to learn</i>	lernenda	<i>has to be learned</i>
solvi	<i>to solve</i>	solvenda	<i>to be solved</i>
trovi	<i>to find</i>	trovenda	<i>has to be found</i>

9 The prefix **eks-** is used like the English “ex” to denote *late, formerly*:

oficiro	<i>officer</i>	eksoficiro	<i>ex-officer</i>
studento	<i>college student</i>	eksstudento	<i>former student</i>
edzo	<i>husband</i>	eksedzo	<i>ex-husband</i>
edzino	<i>wife</i>	eksedzino	<i>ex-wife</i>
edziĝo	<i>marriage</i>	eksedziĝo	<i>divorce</i>

eksigi *to put out of office, dismiss*

eksiĝi *to withdraw from office, resign*

10 The prefix **pra-** has two uses (*i*) to denote remoteness in time:

biciklo	<i>bicycle</i>	prabiciklo	<i>primitive bicycle</i>
arbaro	<i>forest</i>	praarbaro	<i>primeval forest</i>
homo	<i>human</i>	prahomo	<i>primitive human</i>

and (*ii*) distant (in time) relationship:

avo	<i>grandfather</i>	praavo	<i>great-grandfather</i>
nepo	<i>grandson</i>	pranepo	<i>great-grandson</i>

11 The prefix **mis-** is used like the English “mis-” to denote an error:

informi	<i>to inform</i>	misinformi	<i>to misinform</i>
---------	------------------	------------	---------------------

kompreni <i>to understand</i>	miskompreni <i>to misunderstand</i>
loko <i>place</i>	misloki <i>to misplace, mislay</i>
paŝo <i>step</i>	mispaŝo <i>misstep</i>
prononci <i>to pronounce</i>	misprononci <i>to mispronounce</i>
uzi <i>to use</i>	misuzi <i>to misuse</i>

12 The suffix **-ing-** is used to denote a holder for *one* of the objects named in the root. Often the object is held firmly by one end only.

kandelo <i>candle</i>	kandel ingo <i>candlestick</i>
plumo <i>pen</i>	plum ingo <i>pen-holder</i>
torĉo <i>torch</i>	torĉ ingo <i>torch-holder</i>
fingero <i>finger</i>	finger ingo <i>thimble</i>
glavo <i>sword</i>	glav ingo <i>scabbard</i>

It is not greatly used other than in the above words, but **ingo** is useful as an independent word meaning *holder, socket* or *sheath*. Do not confuse it with **-uj-**, which denotes a container for several or more of the objects named:

cigare dingo <i>cigarette-holder</i>
cigare dujo <i>cigarette box</i>

13 The suffix **-nj-** is used after the first few letters of a feminine name to form a short affectionate name, or nickname:


patrino <i>mother</i>	pan jo <i>mommy, mom</i>
onklino <i>aunt</i>	on jo <i>auntie</i>
avino <i>grandmother</i>	avin jo <i>granny, grandma</i>
Elizabeto <i>Elizabeth</i>	Elin jo <i>Liz, Beth, etc.</i>

14 The suffix **-ĉj-** is used in the same way with masculine names:

patro <i>father</i>	paĉ jo <i>daddy, dad</i>
Johano <i>John</i>	Joĉ jo <i>Johnny</i>
Vilhelmo <i>William</i>	Vilĉ jo <i>Bill, Billy</i>

Teksto: Paĝo por la semajnfino

Krucvortenigmo



Horizontale: 1. Ĉefa ĉambro en domo. 4. Unua sezono de la jaro estas la—tempo. 6. Ronda plataĵo por gramofono. 7. Boligi malrapide. 9. La tuta loĝantaro de iu lando. 12. Plena de viveco kaj vigeleco. 15. Nombro da jaroj, tra kiuj oni vivas. 17. Koloro de pomo. 20. Izolita peco de tero. 23. Akiri (*nur radiko*). 24. Laŭtaj, malplaĉaj sonoj. 25. Kuiru kukon. 26. La enloĝantoj de Britujo.

Vertikale: 2. Homo amata. 3. Frato de la patro aŭ patrino. 4. Demandas iun servon. 5. Ido de homo (*nur radiko*). 8. Vivis en certa loko. 9. Prepozicio kiu montras la *ilon*. 10. Presita paperfolio (*nur radiko*). 11. Difina artikolo. 13. Estu amika al! 14. Membro. 16. Sufikso kiu montras *fracion*. 18. Uzinda. 19. Ricevi por mono. 21. Ĉirkaŭrigardi por io perdita. 22. Reĝo de la bestoj.

Spritaĵoj

La famega skulptisto Michelangelo Buonarroti, fininte sian belan statuon de Davido, staris apud la statuon kiam alvenis la urbestro de Florenco, kiu kredis sin spertulo pri la arto. Rigardinte* la statuon, tiu diris al la skulptisto, ke ĝi ja estas bela, sed ke al li ne plaĉas la nazo, kiu ŝajnas esti tro longa.

Michelangelo pacience supreniris ŝtupetaron, tenante en la mano iomete da marmora polvo. Ŝajnigante, ke li laboras ĉe la nazo, li iom post iom faligis la polvon. Malsuprenirinte*, li demandis al la urbestro, ĉu tio plibeligis la statuon. “Tio multe pli plaĉas al mi,” respondis tiu. “Nu vi vere donis al ĝi la vivon!”

La granda filozofo Hegel diris ĉe la fino de sia vivo: “El ĉiuj miaj eks-studentoj, nur unu komprenis min—kaj li *miskomprenis* min!”

Humphry Davy, la glora sciencisto, estis la protektanto de eĉ pli granda sciencisto, Faraday. Amiko

demandis al la maljuna Davy: “Laŭ via opinio, kiu estas la plej grava el ĉiuj viaj eltrovaĵoj?” Davy respondis: “Mia plej grava eltrovaĵo estas tio—ke mi trovis Michael Faraday.”

Ĉi tie vi cerbumas!

Problemo 1

Smith: La plej alta loko en Britujo estas ja la pinto de Ben Nevis. Trovenda nun estas la plej *malalta* loko.

Jones: Evidente! Ĉe la marbordo. Ĉu li estas prava?

Problemo 2


Esploristo ĵus reveninta de la Norda Poluso diris:

“Mi multe suferis de malvarmumoj.” Ĉu vi kredas lin?


Problemo 3

En Rejkjavik, Islando, estas tre malvarme dum la longa vintro. Tamen, la loĝantoj sentas sin tute varmaj en la hejmo. Kial?


* See chapter 15, note 2



Tiu prabiciklo estis uzata jam en—kiu jaro? 1805? 1819? 1853?




Jen silueto de konata lando. Kiu lando?



Ĉu la objekto estas (a) ventumilo? (b) muzika instrumento? (c) fajr-avertilo?



La fraŭlino kiu okulumas vin portas popolkostumon el— (a) Hispanujo? (b) Jugoslavujo? (c) Grekujo?



Tiu bovo estas desegnita de— (a) infano? (b) prahomo? (c) Afrika nigrulo?



Ĉu la konstruaĵo estas (a) teatro? (b) fabriko? (c) preĝejo?

Solvoj:

Ĉi tie vi cerbumas!

1: Ne. La plej malalta loko en Britujo estas apud Holme en Cambridgeshire. Ĝi staras 2.5 metrojn *sub* mar-nivelo.

2: Bedaŭrinde ne! Ĉe la Poluso estas tiel malvarmege, ke mikroboj de malvarmumo ne povas vivi.

Praktiko 14.4 Traduku anglen:

Ĉu vi miskomprenis min? Li ĉiam miskomprenas spritaĵojn. Ŝi misprononcas ĉiujn vortojn. Ĉu la esploristo suferis pro* malvarmumo? Kio estas ventumilo? Ĉu vi cerbumis pri la krucvort-enigmo? La mezuro estas nur proksimuma. Ĉu la krucvort-enigmo estas solvenda? Ĉu la plej malalta loko estas nun trovenda? Kiam la konto estas pagenda? Kio estas la diferenco inter studento kaj eks-studento? Li volis esti eksedzo, kaj ŝi volis esti eksedzino; do ili aranĝis eksedziĝon. Se li mem ne eksigis, ni eksigos lin. Ĉu ĝi estas prabiciklo? Kio estas prahomo? Ĉu via praavo ankoraŭ vivas? Ĉu vi havas pranepojn? De kiu ajn flanko la vento blovas ni estas ŝirmataj. Mi volonte akceptos vin, kiam ajn vi venos. Per niaj aviadiloj vi facile atingos iun ajn parton de la mondo.

* Some speakers say “**suferas pro**”, others prefer “**suferas de**”.

3: En Islando ekzistas multaj varmegaj akvofontoj. Oni uzas ilin por varmigi la domojn.

Bildoj: 1. 1819 2. Ĉeĥoslovakujo. 3. “Ĉang”: Ĉina muzika instrumento. 4. Jugoslavujo. 5. Prahomo; proksimume 13 000 jarojn antaŭ Kristo. 6. Preĝejo: en Frankfurt-am-Main, Germanujo.

Praktiko 14.5: Traduku esperanten:

I have already fulfilled your orders. When is the bill payable? Here is one problem which has to be solved. He is now an ex-officer. My great-grandmother will soon be eighty. He often misuses the word. I will love you whatever you do. I will give it to him, whoever he is. I did not see anyone at all. I am ready to eat anything.

Praktiko 14.6: Respondu:

1. Kiu estas la dua sezono de la jaro?
2. Se al plantoj mankas akvo, kion oni devus fari?
3. Kiom da studentoj, laŭ Hegel, komprenis lin?
4. Ĉu tiu studento bone komprenis lin?
5. Kio, laŭ Humphry Davy, estis lia plej grava eltrovaĵo?
6. Kie troviĝas la plej malalta loko en Britujo?
7. Kial oni ne povas suferi de malvarmumo ĉe la Norda Poluso?
8. Kie la homoj utiligas varmegajn akvofontojn por varmigi la domojn?
9. Se via edzo aŭ edzino havas nur unu fraton, sed vi havas du bofratojn, kiu estas la alia?
10. Se ĉiuj viaj praavoj ankoraŭ vivus, kiom el ili vi havas?

Dialogo: Universala Kongreso—Infana Kongreseto

Iun tagon dum la kongresa semajno, la kvar geamikoj renkontas Robertson Chabot, kiun ili ekkonis en Grezifono.

Rikardo Roberto! Mi ĝojas renkonti vin denove! Mi vidis vian nomon sur la listo de kongresanoj, sed ne sciis, ĉu vi ĉeestas aŭ ne.

Roberto Jes, mi estas ĉi tie jam de sabato, sed inter tiom da homoj estas malfacile renkonti ĉiujn geamikojn kaj gekonatojn.

Klara Jes, ja! Kaj estas tiom da aferoj farendaj kaj kunvenoj ĉeestendaj, ke la tempo vere galopas!

Marteno Tio estas vera. Verdire, ni ne partoprenis en multaj kunvenoj ĝis nun, sed ni ĉeestis kelkajn distrajn aferojn.

Chantal Kaj pro la bela vetero ni kaptis plurajn okazojn eliri por vidi la urbon.

Roberto Jes, ankaŭ mi vagis en la urbo kelkfoje. Sed mi partoprenis en kelkaj kunvenoj: de fervojistoj kaj de filatelistoj, ĉar profesie mi estas fervojisto, kaj hobie mi estas filatelisto. Mi ĉeestis ankaŭ la kunvenon pri ekologio, pro ĝenerala intereso.

Rikardo Mi ĉeestis tiun por matematikistoj, kaj Klara tiun por instruistoj kaj ankaŭ tiun pri filologio.

Klara Kaj Chantal kaj mi ĉeestis tiun pri virina agado! Sed ni ĝuis ankaŭ la distrajn programojn.

Chantal Jes, la teatraĵoj estis bonegaj, kaj la geaktoroj vere brilaj.

Rikardo Estis tre strange al mi aŭskulti la tuton en Esperanto. Feliĉe, la geaktoroj tiel klare parolis, ke mi ĉion komprenis.

Marteno Mi aparte ĝuis la kabareton hieraŭ vespere.

Roberto Kaj kion vi intencas fari hodiaŭ posttagmeze?

Klara Hodiaŭ estas la tago kiam kongresanoj estas invititaj viziti la Infanan Kongreseton, kaj Rikardo kaj mi iros tien por vidi niajn gefilojn.

Chantal Se vi ne kontraŭas, Marteno kaj mi volonte akompanos vin kaj revidos la infanojn.

Rikardo Tio estos plezuro! Kaj vi, Roberto?

Roberto Dankon, ne. Mi partoprenos en la Internacia Kongresa Universitato¹.

(Kiam ili alvenas aŭte antaŭ la kongresetejo, Rikardo, Klara kaj iliaj geamikoj vidas aron da infanoj atendantaj. Tuj Andreo kaj Maria venas antaŭen, kaj la pordeto de la aŭto estas apenaŭ malfermita kiam ili kune ekparolas.)

A & M Saluton, saluton! Venu por vidi...

Rikardo He! momenton, mi petas! Lasu nin eliri el la aŭto! (*La kvar plenkreskuloj eliras.*) Vi memoras Chantal kaj Martenon, ĉu ne?

Infanoj Jes. Saluton!

C & M Saluton, junuloj!

Marteno Ĉu vi ĝuas la kongreseton?

Maria Jes, tre multe! (*Ŝi mansvingas al iu en la infangrupo antaŭ la konstruaĵo.*) Jen mia amikino Trudi, el Germanujo.

La adoltoj Saluton, Trudi!

Trudi Saluton!

Andreo Kaj jen Fulvio, el Italujo.

Adoltoj Saluton, Fulvio!

Fulvio Saluton, gesinjoroj!

Andreo Ni havas iom da tempo por montri al vi la ĉirkaŭaĵon, kaj poste ni devos eniri por montri al vi nian ekspozicion, kaj post tio ni faros koncerton por ĉiuj vizitantoj!

(Ili komencas promeni.)

Maria Estas bele ĉi tie! Ni naĝas en la maro ĉiutage, kaj ludas en la arbaro, kaj...

Klara Ĉu oni permesas al vi iri solaj en la maron?

Maria Ho, ne! Ĉiam devas esti plenkreskulo tie. Sed preskaŭ ĉiam estas plenkreskulo sur la strando...

Andreo Kaj se ne, ni devas peti permeson iri en la maron, kaj se iu plenkreskulo estas libera, tiu elvenas, kaj ni rajtas iri en la akvon.

Rikardo Bone. Kaj kion alian vi faras?

Maria Ni jam ekskursis dufoje, al interesaj lokoj en la regiono, kaj ĉiutage ni promenas piede kun nia grupestro.

Chantal Kiom da infanoj estas en via grupo?

Andreo Ni ne estas en la sama grupo. En mia grupo ni estas sep, ĉiuj el malsamaj landoj!

Maria Mia grupo havas nur ses, el ses landoj. Sed Trudi estas en mia grupo, do ĉio estas bona!

(La infanoj montras diversajn lokojn, kaj poste ili ĉiuj eniras kaj rigardas ekspozicion de faritaĵoj de la infanoj.)

Andreo Mi faris tiun pentraĵon!

Marteno Ĉu vere? Ĝi estas tre bona!

Maria Kaj mi faris tiun porketon el argilo!

Klara Ankaŭ tio estas tre bona. Mi ne sciis, ke vi ambaŭ estas tiel lertaj! Fakte, ĉiuj eroj estas bonaj. Certe vi ĉiuj estis okupitaj.

Andreo Ni faris tiajn laborojn vespere. Dum la tagoj ni ĉiam estis ekstere.

Gvidanto (*anoncas*) Atentu, mi petas, gesinjoroj kaj infanoj! Estas la horo por nia koncerto. Se la plenkreskuloj bonvolos sidiĝi, la infanoj scias kion fari.

(Oni disdonas multobligitan programon.)

Klara (*flustras*) Rigardu: Andreo kaj Maria aktoros kune! Ili faros skeĉon: “Fajro, Fajro!”²

Rikardo (*flustras*) Ĉielo! Mia imago ne kapablas...!³

(La koncerto komenciĝas. Post la fino estas granda aplaŭdo.)

Marteno Brave! Ili ĉiuj bone faris, ĉu ne?

Chantal Kaj viaj du... tiu skeĉo estis tre amuza, kaj ili senerare faris ĝin!

(Andreo kaj Maria venas al ili.)

Klara Bonege! Vi du faris brave! Kiel vi sukcesis memori ĉion?

Maria Ni havis la libron antaŭ ni, Panjo! Ĉar ni ĉiam sidis kaj ŝajnis paroli telefone, ni povis legi ĝin!

Klara Ho, mi komprenas! Tamen, necesis multe da praktikado por elparoli ĝin⁴ tiel flue!

Infanoj Jes, Ja!

1. A series of lectures by university professors and lecturers.

2. Sketch by R. Mackay.

3. *The mind boggles!* (lit. *My imagination can't...*)

4. Lit. *speak it out*.

Demandoj

1. Kiam alvenis Roberto al la kongreso?
2. Kial la kvar geamikoj kaptis plurajn okazojn eliri?
3. Kio estas la profesio de Roberto?
4. Kaj de Klara?
5. Kial Roberto ne vizitas la Infanan Kongreseton?
6. Kion Andreo kaj Maria montras al la plenkreskuloj antaŭ la koncerto?
7. Kion la infanoj devas fari se ili volas naĝi, kaj ne estas plenkreskulo sur la strando?
8. Kiom ofte la infanoj promenas piede?
9. El kiom da landoj venas la infanoj en la grupo de Andreo?
10. Kion faras Andreo kaj Maria por la ekspozicio?

akiri to acquire, get
apenaŭ hardly, no sooner...
argilo clay
averti to warn
bordo bank, shore
brave! well done!
brila brilliant
cerbo brain;
 cerbumi rack one's brains
ĉielo! Heavens!
desegni to draw
difini to define;
 difina artikolo definite article
distra entertaining, of entertainment
ekskursi to go on a trip, excursion
ekspozicio exhibition
eltrovaĵo discovery
enigmo puzzle
faritaĵo something made
flue fluently
flustri to whisper
folio leaf, sheet (of paper)
frakcio fraction
gramofono record-player
he! hey! (exclamation)
hobio hobby
Islando Iceland
kabareto cabaret
kesto chest; **leterkesto** mailbox
kruco cross
marmoro marble
multoblighi to duplicate, multiply
nivelo level
okupita busy
paŝo pace, step
peco piece
piede on foot

pinto summit, peak, point
plata flat
poluso pole (North or South)
profesio profession
rondo circle, ring
senerare faultlessly
silueto silhouette
skeĉo sketch, short play
sprito wit
strando beach
svingi to wave
ŝajnigi to pretend
ŝtupetaro ladder
ŝuo shoe
vagi to ramble, wander
verdire telling the truth
vigla alert, brisk
vorto word

Esprimoj:
de tempo al tempo from time to time
iun tagon one day
kapti la okazon to take the opportunity

Ĉapitro 15: Diversaĵoj el la tuta mondo

Adverbial participles

1 A common form in English is a sentence with a participial phrase tacked on (here in italics):

Wishing to speak to him, I visited his house.

Seeing him in the garden, I called to him.

Whistling tunefully, he went upstairs.

Having a good brain, he mastered everything.

Intending to stay, we stood in the corridor.

The Esperanto form is similar, but the participle ends in **-e**:

Dezirante paroli al li, mi vizitis lian domon.

Vidante lin en la ĝardeno, mi vokis al li.

Fajfante melodie, li iris supren.

Havante bonan cerbon, li venkis ĉion.

Intencante resti, ni staris en la koridoro.

This participial phrase can be expanded into a complete sentence, whose subject is identical with that of the main clause (sentence):

Mi deziris paroli al li Mi vizitis lian domon.

I wished to speak to him. *I visited his house.*

Mi vidis lin en la ĝardeno. Mi vokis al li.

I saw him in the garden. *I called to him.*

Li fajfis melodie. Li iris supren.

He whistled melodiously. *He went upstairs.*

Li havis bonan cerbon.

He had a good brain.

Li venkis ĉion.

He mastered everything.

Ni intencis resti.

We intended to stay.

Ni staris en la koridoro.

We stood in the corridor.

The rule in Esperanto is the same as in good English: the participial phrase must always relate to the subject of the main clause.

2 The past participle is also used as in English:

Mi estis skribinta la leteron. Mi eliris

I had written the letter. I went out.

= Skribinte la leteron, mi eliris.

Having written (After writing) the letter, I went out.*

Li estis fininta la laboron. Li hejmeniris.

He had finished the work. He went home.

= Fininte la laboron, li hejmeniris.

Having finished (When he had finished) the work, he went home.*

3 The participle ending in **-onta** is similarly used:

Mi estis skribonta leteron. Mi serĉis plumon.

I was about to write a letter. I looked for a pen.

= Skribonte leteron, mi serĉis plumon.

(Being) About to write a letter, I looked for a pen.

Li estis enironta la ĉambron. Li tuisis.

He was about to enter the room. He coughed.

= Enironte la ĉambron, li tuisis.

About to enter the room, he coughed.

* See chapter 14, note 3.

Instead of simply saying “writing”, “having finished”, “(Being) About to enter”, etc., we often use phrases such as “While (he was) writing”, “After he had written”, “Just before entering”, and so on. When such a phrase can be translated by an adverbial participle, it is generally best to use it.

4 The passive participles may also be used to form participle phrases, though this is rare with present and future participles:

Li ne estis rimarkita. Li forlasis la domon.

He was not noticed. He left the house.

= Ne-rimarkite, li forlasis la domon.

Unnoticed, he left the house.

The object predicate

5 The word “predicate” comes from the Latin *predico*, meaning “preach” and is used in the sense of something said about the subject or object. The *object predicate*, then, is something said about the object. It usually takes the form of a noun, adjective, or participle. The main point to remember is that **-n** is *not* added to the predicate, because an implied **esti** (*to be*) is understood.

A noun

La societo elektis min (esti) prezidanto.

The society elected me (to be) president.

Ni juĝis la viron (esti) fripono.

We judged the man (to be) a rascal.

Li nomis sian filon Petro.

He called his son Petro (gave him the name of Petro).

An adjective

Ili trovis lin (esti) sana kaj vigla.

They found him (to be) well and lively.

Li farbis la pordon bruna.*

He painted the door brown.

Ŝi montris sin (esti) preta kaj volonta.

She showed herself (to be) ready and willing.

A participle

Mi aŭdis la birdon (esti) kantanta.

I heard the bird (to be) singing.

Ŝi vidis lin (esti) kuranta.

She saw him (to be) running.

Li pentris ŝin sidanta.

He painted her sitting (while she was sitting).

* Notice the difference between:

Li farbis la pordon bruna. = *He painted the door brown (made it brown).*

Li farbis la pordon brunan. = *He painted the brown door.*

Praktiko 15.1 Traduku anglan:

Vidante lin sur la strato, mi sekvis lin. Fininte sian laboron, ŝi hejmeniris. Skribonte al mia korespondanto, mi serĉis lian adreson. Starante antaŭ sia domo, li rigardis la montojn. Aŭdinte la hundon bojanta, la knabo forkuris. Batite, li laŭte ploris. Helpate de mia amiko, mi bone progresis. Estante kolera, ŝi rifuzis paroli al mi. Vidite de la policano, la ŝtelisto rapide forkuris. Mi trovis la bildon belan. Mi trovis la libron tre bona. Li montris sin saĝa. Ni trovis ŝin tre ŝanĝita. Ni aŭdis la birdon kantantan. Intruante oni lernas.

Praktiko 15.2: Traduku esperanten:

Seeing her in the garden, I called to her. While waiting for my friend I looked at the newspaper. Having decided to set off, I did not wait. While sitting in the garden I heard a noise. Not knowing the man, I asked who he was. As he was about to go out, he saw that it was raining. When about to be punished the boy ran away. Having been called, she came at once. Having met him, I found him very pleasant. I painted the door green. I painted the green door. The girl showed herself capable and willing.

Indirect commands

6 The ending **-u** is used in indirect speech after verbs expressing a desire, like *want, wish, order, tell, warn, advise, ask*, etc. where in English we would use the infinitive after the object:

Iru tien!

Go there!

Mi volas, **ke** vi iru tien.

I want you to go there.

Li kantu!

Let him sing!

Mi deziras, **ke** li kantu.

I wish him to sing.

Restu!

Stay!

Mi diris, **ke** li restu.

I told him to stay.

Mi petis, **ke** li restu.

I asked him to stay.

Mi ordonis, **ke** li restu.

I ordered him to stay.

Mi avertis, **ke** li restu.

I warned him to stay.

Mi konsilis, **ke** li restu.

I advised him to stay.

Various meanings of *de*

7 The preposition **de** has at least five meanings: *of, from, off, by* and *since*, and as you will see in section (*e*) below, it can sometimes be translated as *for*. Usually when you are reading Esperanto the meanings will be obvious. When writing or speaking, however, you may find it necessary to use another word for the sake of clarity. Let's look at some examples of the various meanings.

(a) *of*

la centro **de** la urbo

the center of the city

sumo **de** dek dolaroj

a sum of ten dollars

la kreinto **de** Esperanto

the creator of Esperanto

la problemo **de** senarmiĝo

the problem of disarmament

We can also include the possessive use here:

la libro **de** Johano

Johano's book

(b) *from*

veturi **de** Londono ĝis Parizo

to travel from London to Paris

alveni **de** Germanujo

to arrive from Germany

kuri **de** la loko

to run from the place

suferi **de** febro

to suffer from a fever

distingi unu **de** alia

to distinguish one from another

(c) *off* (often has the sense of *from*)

fali **de** la tablo *to fall off (from) the table*
plonĝi **de** la alta tabulo *to dive off (from) the high board*
preni kukon **de** plado *to take a cake off a dish*

(d) *since*

Ŝi laboras tie (jam) **de** Januaro. *She's been working there since January.*

(e) *for*

Mi estas tie (jam) **de** du monatoj. *I've been there for two months.*

(f) *by*

libro (verkita) **de** Dickens *a book (written) by Dickens*
ĉirkaŭita **de** la tuta familio *surrounded by the whole family*
ĉielo kovrita **de** nuboj *a sky covered by (with) clouds*
but ŝi kovris la tablon **per** tuko *she covered the table with a cloth*

8 Confusion may be caused in such cases as:

(a) la amo **de** Dio *the love of God*

which may mean either

la amo **de** Dio **al** homoj *the love of God towards people*
or la amo **al** Dio **de** homoj *the love towards God by people*

In this case the appropriate use of **al** will make the meaning clear.

(b) la mono ŝtelita **de** li

which may mean *the money stolen from him* (or) *the money stolen by him*

We can overcome this problem by saying either

(i) la mono ŝtelita **for** **de** li
or (ii) la mono **kiun li ŝtelis**

(c) la venko **de** Anglujo **de** la Normandoj *the conquest of England by the Normans*

This one can be clarified by saying:

la venko **de** Anglujo **fare de** la Normandoj

9 Other doubtful meanings can be made clear by using an alternative preposition.

<i>Instead of:</i>	<i>We could say:</i>
la problemo de la senarmiĝo	la problemo pri la senarmiĝo
li venas de Germanujo	li venas el Germanujo
li kuris de la loko	li kuris for de la loko (<i>or</i>)
	li forkuris de la loko
la vazo falis de la tablo	la vazo falis de sur la tablo
li laboras tie de Januaro	li laboras tie ekde Januaro
li suferis de febro	li suferis pro febro
ni ne povas distingi liajn ŝafojn de la niaj	ni ne povas distingi liajn ŝafojn disde la niaj

In general, be especially careful to make sure that the meaning is clear when using **de**. If in doubt, find some other way of expressing what you want to say.

Praktiko 15.3 Traduku esperanten:

I must demand the return of the money stolen from me by that man. He disappeared from the house yesterday morning, and has not been seen since (then). He took a knife from the drawer to cut the bread. The ground was entirely covered with snow. Johano can hardly walk, because he fell off a wall. The dying woman was surrounded by all her (= her whole) family. He wrote to tell (= say to) me that he was suffering from a cold. Those gloves were stolen from my brother. She has been working in that shop since January. Without saying a word she ran away from me.

Transitive and intransitive verbs

10 A *transitive* verb is one which expresses an action done to someone or something (the *object*):

La viro **batis** la hundon. *The man beat the dog.*
Mi **vidis** la domon. *I saw the house.*

An *intransitive* verb is one whose action is confined to the doer (the *subject*):

La knabo **dormis**. *The boy slept (was asleep).*
La akvo **frostis**. *The water froze.*

In English, some verbs can be either transitive or intransitive, e.g.:

	<i>Transitive</i>	<i>Intransitive</i>
to boil	I boiled the water.	The water boiled.
to close	He closed the door.	The door closed.
to wake	She woke the child.	The child woke.

Esperanto verbs are either transitive or intransitive, so we use a suffix to change from one form to the other.

11 To make a transitive verb intransitive, we use the suffix **-iĝ-** (*to become, be ...-ed*):

Ŝi vekis la infanon. La infano vek*iĝ*is.
She woke the child. *The child awoke (became awake).*

La instruisto komencis la lecionon. La leciono komenci*ĝ*is.
The teacher began the lesson. *The lesson began (was begun).*

Here is a list of common verbs which in English can be either transitive or intransitive, but which in Esperanto are all transitive, requiring **-iĝ-** to make them intransitive:

etendi <i>to extend, stretch</i>	renkonti <i>to meet</i>
fendi <i>to split</i>	rompi <i>to break</i>
fermi <i>to close, shut</i>	ŝanĝi <i>to change</i>
fini <i>to finish</i>	turni <i>to turn</i>
kolekti <i>to collect, gather</i>	veki <i>to wake</i>
komenci <i>to begin</i>	vendi <i>to sell</i>
movi <i>to move</i>	

Example: Mi vendis mian aŭton. Tiu ero bone vendi*ĝ*as.
I sold my car. *That item sells well.*

12 To make an intransitive verb transitive, we add the suffix **-ig-** (*to make, cause*):

La akvo jam bolas. Mi boli*g*os la akvon.
The water is already boiling. *I'll boil the water (cause it to boil).*

La balono krevis. La knabo krevi*g*is la balonon.
The balloon burst. *The boy burst the balloon.*
(caused it to burst).

La patrino sidis sur la seĝo.
*The mother was sitting on
the chair.*

Ŝi sidigis la infanon apud si.
*She sat the child by her (caused
it to sit).*

Here is a list of common verbs which in English can be either transitive or intransitive, but which in Esperanto are all intransitive, requiring **-ig-** to make them transitive (**por transitivigi ilin!**):

boli *to boil*
bruli *to burn*
ĉesi *to stop, cease*
daŭri *to continue*
droni *to drown*
halti *to stop, halt*
kreski *to grow*

krevi *to burst*
pasi *to pass (by)*
pendi *to hang*
sidi *to sit, be sitting*
soni *to sound*
sonori *to ring*
stari *to stand*

Example:

La bildo pendis sur la muro.
The picture hung on the wall.

Mi pendigis la bildon en la salono.
I hung the picture in the lounge.

Teksto: Diversaĵoj el la tuta mondo

Grupe Trinki

La konduto de alkoholtrinkantoj rilate al iliaj ĉirkaŭuloj povus esti konata per la sanga grupo, laŭ esploro farita de la firmao Asashi Breweries Ltd., la unua japana bierfabrikisto. La esploro, farita pri specimena grupo el 2464 personoj, montras, ke la A-sangaj personoj atentis pri siaj ĉirkaŭuloj. La B-sangaj personoj male, ignoras siajn ĉirkaŭulojn, kiam ili trinkas alkoholon. La O-sanguloj bone rilatas al la aliaj dum ili trinkas. La AB-sanguloj estas duvizaĝaj: ili povas bone rilati al iuj ĉirkaŭuloj kaj indiferenti al aliaj.

(el *Monato*)

Japana Rifuzo

Antaŭ multaj jaroj verkisto proponis novan verkon al japana eldonista firmao. La eldonistoj resendis la manuskripton, kun letero: "Ni trovas vian verkon bonega. Sed se ni presus ĝin, Lia Imperia Moŝto legus ĝin kaj, leginte, li ordonus, ke ni neniam presu ion malpli bonan. Ĉar tio malhelpus, ke ni eldonu ion ajn dum almenaŭ dek mil jaroj, ni devas, kun profunda bedaŭro, resendi al vi la manuskripton."

La Origino de la Bildkarto

Kvankam poŝtkartoj jam ekzistis de la jaro 1861, la bildkarto ŝajne ne "naskiĝis" ĝis 1889. Kiam, en tiu jaro, oficiale malfermiĝis la mondkonata turo Eiffel dum la Ekspozicio de Parizo, poŝtkartoj eldoniĝis kun bildo de la turo, kaj oni povis enpoŝtigi ilin ĉe la supro. Ekde tiam bildkarto estis popularaj, kaj la kolektado de ili baldaŭ disvastiĝis tra Eŭropo kaj poste tra la tuta mondo, aparte inter la esperantistaro. Ĝis 1902 oni rajtis skribi nur la adreson de la ricevonto sur la dorsflanko de bildkarto, kaj iun mesaĝon oni devis skribi sur la bildon mem. Sed en tiu jaro Britujo permesis la dividon de la dorsflanko per linio, kun unu duono por la adreso kaj la alia por la mesaĝo.

Kontraŭ Terorismo

En 1978 viro eniris bankon en Kalifornio, portante suspektindan pakon. La bankoficistoj, timante, ke en ĝi estas bombo, rifuzis tuŝi ĝin, kaj la supozata teroristo tuj fulme elkuris, je la granda trankviliĝo de la oficistoj. Ekster la konstruaĵo, tamen, apudstaranto vidis la fuĝanton kaj, kredante ke li estas rabisto, tuj postkuris kaj kaptis lin. Li reirigis lin en la bankon, sed kompreneble ne sciis, ke la pako ja enhavas larmigan gason, kaj post du minutoj ĝi eksplodis. Nur post tridek minutoj la aero estis denove klara.

Urbega Saltego

Du londonanoj estis la unuaj personoj paraŝutintaj de la supro de la 449 metrojn alta "Empire State Building" en Novjorko. Oni estis dirinta al ili, ke tia salto estas neebbla pro la formo de la konstruaĵo, tamen unu el ili sukcesis surstratiĝi sendifekte, kaj rapide foriĝis, kun sia paraŝuto, en

taksio. La alia (fakte la unue saltinto) preskaŭ atingis la straton, sed liaj paraŝut-ŝnuroj trafis trafiklumojn, kaj dum li senpove pendis tie la polico arestis lin kaj akuzis lin pri danĝera konduto. Post lia aresto li konfesis, ke la sperto estis timiga, sed li sentis, ke la vera danĝero estas la risko esti trafita de aŭto je la surteriĝo, aŭ eble eĉ rabatencita.

“Majstro de la Enciklopedio”

Ĉu iu persono legis la tutan *Encyclopedia Britannica*? En la 19-a jarcento iu reĝo de Persujo (nun Irano) apenaŭ sukcesis plenumi tiun taskon; poste, li aldonis al siaj titoloj “Majstro de la Encyclopedia Britannica”! Sed legi la plej lastan eldonon, kun plena kompreno, estus preter la kapablo de unu homo. Ĝi ampleksas multajn volumojn, kun milionoj da vortoj!

Ejo por Perditajoj

Ĉiujare, la londona publiko postlasas proksimume cent kvindek mil objektojn en vagonaroj kaj busoj. La ejo en Baker Street, en kiu dudek kvin oficistoj mastrumas tiun grandan, kaj strangan, kolekton, enhavas amasegon de la plej diversaj objektoj, ekde okulvitroj, ombreloj, globkrajonoj k.t.p. ĝis falsaj dentaroj, ĉemizoj kaj futbalŝuoj. Krome, oni raportas, ke en unu ekzempla jaro la oficistoj ricevis dudek kvar mil “valorajn” objektojn, nome mansaketojn, monujojn kaj biletojn. En tiu sama jaro la plej neatendita perditajo estis la supra tabulo de ĉevalsalt-konkursista obstaklo!

Praktiko 15.4: Traduku anglan:

La turo Eiffel oficiale malfermiĝis dum la Ekspozicio de Parizo. La kolektado de bildkartoj jam disvastiĝis tra la tuta mondo. La unua japana bierfabrikista firmao faris esploron pri la konduto de alkoholtrinkantoj rilate al iliaj ĉirkaŭuloj. Leginte ĝin, li ordonus, ke ni neniam presu ion malpli bonan. Ni trovis vian verkon bonega. Oni certe opinios ilin pli kuriozaj. Tio malhelpus, ke ni eldonu ion ajn dum almenaŭ dek mil jaroj. La paraŝut-ŝnuroj de la unue saltinto trafis trafiklumojn, kaj la polico arestis lin dum li pendis senpove. Kiam la bankoficistoj rifuzis tuŝi la

pakon, la teroristo fulme elkuris. La oficistoj mastrumas multajn diversajn objektojn, ekde globkrajonoj ĝis falsaj dentaroj.

Praktiko 15.5: Traduku esperanten:

Having offered his manuscript to a publisher, he awaited (waited for) a reply. They call their son-in-law Petro. I found the place worth visiting. I want you to leave your hat behind. He ordered me to read the last edition. It is said that research by a Japanese brewery showed something about the conduct of alcohol-drinkers. The first picture-postcard was apparently published during the Paris Exhibition of 1889, and bore (carried) a picture of the Eiffel Tower. The arrested man had feared being hit by a car or even mugged. The boy refused to touch the food. Twenty-five officials look after a hundred and fifty thousand objects.

Praktiko 15.6: In each of the following sentences, the verb has been given in English. Write down the correct Esperanto form of each; then make sure you understand why the particular form is used in each case:

1. La laca infano (*closed*) siajn okulojn.
2. Trovinte la domon, mia amiko (*will ring*) ĉe la pordo.
3. Bedaŭrinde, la multekosta vazo (*broke*) kiam ĝi falis de la tablo.
4. La konstruaĵo ankoraŭ (*is burning*), sed oni esperas baldaŭ regi la flamojn.
5. Granda homamaso (*gathered*) ĉe la sceno de la akcidento.
6. La lignopeco (*split*) sub la bato de la hakilo.
7. Mi devas tuj (*change*) mian bibliotekan libron.
8. Bonvolu (*pass*) la salon!
9. Tiu viro (*is drowning*)! Helpu lin tuj!
10. La policano (*stopped*) la trafikon por ke ambulanco pasu laŭ la strato.

Dialogo: Universala Kongreso—Ĝis revido!

Estas la fina tago de la kongreso, kaj la kvar geamikoj ĉeestas la oficialan fermon. Dum ili atendas la komencon ili diskutas la okazojn de la antaŭaj tagoj.

Chantal Mi opinias, ke tiu koncerto hieraŭ vespere estis bonega, ĉu vi ne konsentas?

Rikardo Jes, mi ĝuis la tuton.

Klara La nivelo de ĉiuj distraj programoj estis tre alta, laŭ mi. Kompreneble, el preskaŭ tri mil partoprenantoj en la kongreso, devas esti multaj talentaj homoj.

Rikardo La tuta kongreso ja estis vera festeno de kulturo kaj de distraĵoj!

Chantal Kiun, el ĉiuj eroj, vi plej memoros?

Rikardo Ho, kia demando! Mi kredas, ke mi neniam forgesos ion ajn pri la kongreso!

Klara Tio ja estas malfacile respondebla demando; oni pensas pri la teatraĵoj, la pupteatro, la muziko...

Marteno ...la bankedo, la balo...

Chantal Ŝs! Jen la prezidanto kaj eminentuloj venas sur la podion!

(Sekvas la ferma ceremonio. Kiam nia kvaropo elvenas, ili ree babilas.)

Marteno Tre kontentiga fino al bona kongreso, ĉu ne?

Klara Jes, vere! Mi trovis la paroladon de la prezidanto bonega, kaj tre sprita. Sed tio, kion mi trovis plej impona, estis la transdono de la standardo al la reprezentanto de la venontjara kongreso.

Chantal Jes, tio estas tradicia ĉe la Universalaj Kongresoj.

Rikardo Nu, mi devos tuj iri por Andreo kaj Maria ĉe la Infana Kongreseto, sed tio ne okupos longan tempon. Mi sugestas, ke vi tri iru al nia kutima restoracio por la tagmanĝo, kaj rezervu sidlokojn por mi kaj la infanoj. Mi revenos rekte tien. Ĉu bone?

Marteno Tute bone. Ni certe povos okupi nin per babilado dum vi estos for.

Rikardo Do, ĝis baldaŭa revido!

Ĉiuj Ĝis!

(Rikardo foriras rapide al la vesto-deponejo, kaj la aliaj iras malpli rapide, babilante.)

Marteno Mi scivolas, ĉu ni revidos nin¹ en la venonta kongreso...

Klara Ho, tio bezonos multe da pripensado. Grava afero estas la kosto! Sed ekzistas ankaŭ aliaj eblecoj, eĉ se la U.K.² ne eblos al ni: Grezijono denove, aŭ vi povus viziti nin,—eble je la tempo de la Brita Kongreso, tiel, ke ni denove estus inter esperantistoj.

Chantal Tio estus bela! Aŭ vi povus veni al ni, aŭ ni ĉiuj povus viziti la Kulturatan Centron Esperantistan en Svislando.

Klara Mi ne aŭdis pri tio.

Marteno Ĝi situas apud la urbo La Chaux-de-Fonds, en bela montara regiono de Svislando. Ĝi kuŝas, se mi bone memoras la ciferojn, je 1100 metroj super la marnivelo, meze de la Ĵurasaj Montoj.³

Chantal Kaj ĝi havas gastejon konsistantan el sep domoj, kie esperantistoj povas loĝi, ĉu por ferii aŭ por studi, aŭ ambaŭ.

Marteno Oni ja parolas pri la “Esperanto-kvartalo” de la urbo La Chaux-de-Fonds, ĉar la domoj estas sufiĉe grandaj, kaj situas en vastaj ĝardenoj!

Klara Kaj kiam oni povas viziti la Centron?

Marteno Ĝi estas malfermita dum la tuta jaro.

Klara Do, tio certe meritigas pripensadon.

(Fine ili atingas la restoracion, kie Rikardo kaj la infanoj baldaŭ alvenas, kaj ĉiuj ĝuas bonan tagmanĝon. Fininte la manĝon kaj paginte la kalkulon ili eliras.)

Marteno Do, jam venis la horo por adiaŭi⁴ nin! Vi volas foriri preskaŭ tuj, ĉu ne?

Rikardo Jes, ni havas kajuton rezervitan sur la nokta pramŝipo, kie ni esperas dormi sufiĉe por povi veturigi la aŭton hejmen morgaŭ!

Marteno Ni ne foriros ĝis morgaŭ matene, sed ni devos ellitiĝi sufiĉe frue por trafi la unuan trajnon.

Klara Do, ĝis revido, karaj geamikoj, ĝis iam en la venonta jaro. Bonan vojaĝon, kaj alvenu sekure hejmen!

Ĉiuj Ĝis revido! Bonan Vojaĝon! Ĝis la venonta jaro! Ĝis!

1. *will see each other* (see the dialogue in chapter 13).

2. **Universala Kongreso**

3. *Jura Mountains* (stretching through France, Germany and Switzerland).

4 Although **adiaŭi** is fairly common, **adiaŭ!** is not very often used. Esperantists often prefer to use **Ĝis revido**. The expression varies, from **Ĝis la revido!** through **Ĝis revido!** and **Ĝis la!** to simply **Ĝis!**

Demandoj

1. Kiom da homoj partoprenas en la kongreso?
2. Kion la geamikoj ĉeestis hieraŭ vespere?
3. Kion opinias Klara pri la distraj programoj?
4. Kion Rikardo kredas, ke li longe memoros?
5. Kion Klara trovis plej impona en la ferma kunveno?
6. Kion faros la aliaj tri dum Rikardo iros por revenigi Andreon kaj Marian?
7. Kie en Svislando situas la Kultura Centro Esperantista?
8. Kiam la centro estas malfermita?
9. Sur kio Rikardo kaj Klara rezervis kajuton?
10. Kiam la kvar geamikoj esperas ree renkontiĝi?

Note: There are **Esperanto-Domoj** and Cultural Centers in a number of countries, which Esperanto-speakers can visit for holidays and/or study.

akuzi to accuse, charge

alkoholo alcohol

ampleksa extensive;

ampleksi to comprise, cover

aresti to arrest

atenti to pay attention

balo ball, dance

bankedo banquet

banko bank (financial)

bildkarto picture-postcard

bileto (bank) note;

biletujo wallet

boji to bark

cifero figure, digit

ĉapelo hat

ĉemizo shirt

ĉevalo horse; **ĉevalsalt-konkurs**

obstaklo show-jumping fence

difekti to damage;

sendifekta undamaged, unharmed

disvastiĝi to be spread (widely)

dorsflanko reverse (side)

duvizaĝa two-faced

eldoni to publish; **eldono** edition

enpoŝti to mail

esplori to explore, investigate;

esploro research

falsa false

festeno feast

finfine eventually, finally

firmao a firm (commercial)
fojo a time, occasion;
 trifoje three times
foriĝi to get away
fuĝi to flee
fulme like lightning
futbalo soccer
 usona futbalo American football
gaso gas
ignori to ignore
impona imposing, impressive
indiferenta indifferent;
 indiferenti to be indifferent
jarcento century
kalkulo bill
kajuto cabin
Kalifornio California
kolekto collection
kolera angry
konkurso competition, contest
konstruaĵo building
krome in addition
kvaropo quartet
kvartalo district (of a city)
larmo tear (drop);
 larmiga gaso tear gas
lasi to leave; **postlasi** to leave behind
ligno wood
majstro master (craftsman); maestro
male on the contrary
malhelpi to hinder, prevent
mansaketo handbag
mastrumi to look after
meriti to deserve
mesaĝo message
moŝto* (general title)
neatendita unexpected
nome namely

Novjorko New York (city)
 Novjorkio New York State
objekto object, article
obstaklo obstacle
oficisto official
okulvitroj (eye)glasses
ombrello umbrella
ordoni to (give an) order
paraŝuti, paraŝuto parachute;
 paraŝut-ŝnuroj parachute lines
perditaĵoj lost property
Persujo Persia
plenumi to fulfill
plori to weep, cry
po at the rate of, @
podio podium, platform
polico police;
 policano police officer
populara popular
postlasi to leave behind
poŝtkarto postcard
pramŝipo ferry
preter beyond, past
proksimume approximately
pupteatro puppet theater
rabi to steal by force or threat;
 rabisto robber
rabatencita mugged
reirigi (re-ir-igi) to take/send back
rilati to relate, refer;
 rilate in relation to
risko risk
scivoli to wonder (want to know)
senpove helplessly
situi to be situated
solena solemn, formal
specimeno specimen
standardo (official) flag

streĉiga causing strain, stressful
supro, supra top
surstratiĝi, surteriĝi to land
ŝnuro rope, line, cord
ŝŝ hush! shh!
ŝteli to steal; **ŝtelisto** thief
tabulo board, plank
taksio taxi
talenta talented
terorismo terrorism;
 teroristo terrorist
timiga frightening

tradicia traditional
trafi to hit (the mark), catch (train etc.)
trafiklumoj traffic lights
trajno train (= **vagonaro**)
tuko cloth (for particular purpose)
 naztuko handkerchief
 bantuko towel
 buŝtuko napkin
tuŝi to touch
vagonaro train (railway)
vestodeponejo cloakroom

* **moŝto** is a general honorific title: **Via moŝto**. The rank can be indicated by an adjective: **Via reĝa moŝto** *Your Majesty*; **Ŝia princina moŝto** *Her Royal Highness*, etc.